

La Bela Mondo

II^a volumo

(januaro ĝis julio 1909)

Redakcio:

D^{ro} Albert Schramm, Dresdeno

Dresdeno

F. Emil Boden

1909.



Malsataj bestetoj.

Kanteto.

Ho, vi panjo, al vi diru,
Ke mi knabon ne altiru!
Kaj mi amos lin sen limo
Ĉu ĝi estas ia krimo!



Ĉu ĝi estas abomeno
Kisi knabon ĝis la sveno,
Vi ne scias kia ĝuo
Sin alpremi sen la bruo.



Dio amon ja ordonas
Kaj Li al ni ne pardonas.
Ho Li juĝos nin severe
Se ne amos ĉiuj vere.



Tiam prave la infero
Nin atendos post la tero.
Kaj konjektas vi nature,
Ke mi timas ĝin terure.



Por animon mian savi
Mi do kelke devas havi!
Kaj mi amos knabojn vere
Dolĉe, ĝue kaj sincere!

Kars (Rusuĵo).

Antono Vjecorkjeviĉ.



De la ĉevalo sur azenon.

De Fritz Reuter.

(Fino.)



Um unu bela mateno, kiam Peterwardein nenion malbonan atendis, la kapitano sidigis sur la nova veturilo kaj per helpo de l' malsaĝa ĉevalo li prenis la direkton en la fenestron de sinjorino kolonel'edzino, kiun li frakasis per la timono. Tio kaŭzis ne malgrandan spektaklon, kaj la oficiro, kiu devus esti la adjutanto de sinjoro kolonelo, sed kiu estis fariĝinta adjutanto de sinjorino kolonel'edzino, tiu ĉi venis eksteren kaj demandis, ĉu la diablo sidas en li. „Ne“, respondis la malgranda kapitano, „en mi ne, sed en la fiĉvaloj.“ — Kaj ili parolis pri tio ankoraŭ pli multe, ĝis el la interparolo fariĝis traktado kaj fine propono je interŝanĝo. La adjutanto estis ankaŭ unu el tiuj, kiuj bone sciis gvidi tiajn aferojn, kiu sciis aranĝi, ke ne venu io malbona al la ŝnuro, se li devas konduki hundojn*); kaj nia malgranda ĝibeta kapitano ricevis anstataŭ sia veturig'kaleŝo kaj la du ĉevaloj, grizblankĉevalon, kiu certe estus bona ĉevalo, se ĝi estus antaŭe tia, kia ĝi devus esti malantaŭe.

Tiun ĉi grizblankĉevalon mi konis tre bone, en pasinta jaro mi alportis ĝin kune kun aliaj ĉevaloj el Bukovino. Se en la ambaŭ ĉevaloj de la malgranda kapitano loĝis unu malsaĝa diablo, do en tiu ĉi grizblankĉevalo loĝis dek furiozantaj diabloj kaj fajromanĝantoj. En la rajdejo ĝi kune kun la sablosakoj per ĉiuj kvar piedoj je unu fojo eksaltis en la aeron, kaj plu ĝi taŭgis por nenio, ol stari en stalo, manĝi avenon kaj disbati al la servistoj la tibiojn. — Nu bone! ĉi tiun grizblankĉevalon mia ĝiba kapitano ricevis anstataŭ la kaleŝo kaj la du ĉevaloj kaj tuj li ankaŭ sidigis sur ĝi, forlasis Peterwardein kaj rajdis inter kampoj. La dek diabloj en la ĉevalo rajdis kun li, sed dormantaj; la grizblankĉevalo paŝetis laŭ la vojo kiel la maljuna ĉevalino de skribisto Block. — La kapitano rajdis pensante je nenio. Jen aperas ĉasisto akompanata de hundo kaj nia malgranda kapitano ĵus meditas pri tio, kial tiu ĉasisto tie ĉi iras kaj kial la hundo tie ĉi iras, kaj ĉu la hundo iras kun la ĉasisto aŭ la ĉasisto kun

*) popoldiro.

la hundo kaj imagis al si tiun ĉi cirkonstancon. Ĵus kompreninte ĉion — jen la dek diabloj en la grizblankĉevalo frotas al si la okulojn, ekvekiĝas kaj — baŭc — mia malgranda ĝiba kapitano kuŝas en la fosaĵo.

„Kai de tio, mia filo“ diras onklo Matis al mi „de tio . . .“ — Kai mi pensis, ke nun venas tiu fatala moralo kaj kliniĝetis. — „Ne“, diris li „ankoraŭ ne, la historio ne estas ankoraŭ finita . . .“ — De tio mia filo devenas la enigmo: Kiam kunvenas monto kaj valo? Je kio oni ricevas respondon: Se ĝibulo falas en fosaĵon.

La fripona grizblankĉevalo kuregis en rondo ĉirkaŭ la loko, kie kuŝas sinjoro kapitano kaj elbatis per postaj kaj antaŭaj piedoj, spiregis kaj blekegis kaj la dek diabloj en ĝi tenis la vostonj rekte supren. — Mia malgranda kapitano — kiom li povis — kolektis siajn ostojn, elrampis el la fosaĵo kaj kolerege li forŝiris de la ĉasisto la pafilon kaj kriis: „Atendu kanajlo, ni ankoraŭ ne disiĝis!“ kiel diris la meleagro al la lumbriko, kiam ĝi baraktis ĉirkaŭ la beko, kaj li volis mortpafi la ĉevalon. Sed la ĉasisto haltigis lian brakon kaj petis, ke li indulgu la beston; ĝi estas ja nur senprudenta estaĵo kaj ne sciis kion ĝi faris, kaj kiam la malgranda kapitano blasfemis, ke li ne volas plu vidi la fiĉevalon, la ĉasisto rediris, ke li tion ne bezonas, ĉar li mem volus preni kun si la ĉevalon, se la kapitano volus anstataŭ ĝi preni la hundon kaj tiamaniere li efektive kvietigis lin. Tiel la interŝanĝo estis konsentita. Ĝis hundo li jam venis pro sia amo je novaĵo kaj la interŝanĝemo, sed ankoraŭ pluen li venos. Mia malgranda kapitano komprenis de ĉasado ne pli multe ol bovino scias pri dimanĉo. Sed pro la brunkolora hundo li fariĝis entuziasma ĉasanto, vestis paron da grandegaj botoj kun tibiingoj, tintis kaj kraketis dum tuta mateno per la ĉano de l' dutuba pafilo kaj antaŭ la okuloj de l' tuta skadro li trapafis kun granda bruo la rondon de sia ĉapelo kaj tiam li tute fiere iris ĉasi perdrikojn.

En tiu tempo mi estis serĝento, kaj estis kvazaŭ patrino por la skadro, sed mi tenis firme la monsaketon kaj povis regadi sinjorojn la oficirojn per antaŭpago kaj pro tio ili invitis min iafoje al ĉasado, kaj mi estis sufiĉe malsaĝa por kuri kun ili, ĉar mi havis nenion plu de tio ol lacajn piedojn. Do nia malgranda kapitano kaj mi iris kune, sed tiom singardema mi estis, ke mi lasis lin antaŭiri tri paŝojn, ĉar mi pensis: mia tibikarno kaj kio troviĝas super ĝi, ne estas lia ĉapelrando.

La kapitano vokis la hundon, fajfis, kraketis per la fingroj, karesis ĝin, batis ĝin kaj tiris ĝiajn orelojn, pelis ĝin serĉi kaj postulis, ke li alportu ĉasaĵon, kaj tiamaniere agis kun ĝi, ke eĉ anĝela hundo estus perdinta la paciencon kaj prudenton.

„Ponto“ fine tiel konfuziĝis, ke ĝi iris, se ĝi devus stari kaj stari, se ĝi devus iri, kaj sinjoro kapitano ĉiufoje matltrafis, pafante dekstre aŭ maldekstre preter la ĉasobjekto kaj „Ponto“ ĉiam estis kulpa je tio; fine li volis ĝin mortpafi.

Sed mi kompatis la beston kaj diris: Sinjoro kapitano, la hundo estas ankoraŭ juna, ĝi ankoraŭ ne laboris sufiĉe, donacu al mi la hundon, mi donos al vi anstataŭ ĝi tiun ĉi pipon. Vidu, sur ĝi estas pentrita la fama urbo Krivitz en Meklenburg, tie ĉi maldekstre troviĝas la preĝejturo kaj tiu ĉi punktita loko estas la vinkulturejoj.

Li havis grandan kolekton da pipoj — kaj tion mi sciis. Sur iaj troviĝis Vieno, Budapesto kaj Triesto — kaj kiom da urboj ankoraŭ, mi ne scias, sed Krivitz li ankoraŭ ne havis tie, tial tio estis io nova por li — kaj li interŝanĝis.

Ni iris do hejmen kaj li fumis el sia nova pipo. Kiam ni alvenis je pordego de Peterwardein tiklis kaj iĝis min io interne, ke mi devis diri: „Sinjoro kapitano, ĉu vi scias, el kio vi fumas?“ — Li senkomprene rigardis min kaj diris: „Nu, el pipo.“ — „Ne“, mi diris, „el vitra kaleŝo kun kvar ĉevaloj kaj lakeo antaŭe kaj lakeo malantaŭe.“ — Kaj tiam mi klarigis al li tiun tutan interŝanĝan negocon. Jen li ekprenis la vitran kaleŝon kun lakeo antaŭe kaj lakeo malantaŭe, la kvar ĉevalojn, la veturigkaleŝon kun la malsaĝa ĉevalo, la grizblankĉevalon, la junan hundon kaj la pipon kun la urbo Krivitz kun ĉiuj ĝiaj vinkulturejoj kaj ĵetegis ĉion sur ŝtonon, vokante: „Tiam mi ankaŭ ne volas tiun ĉi bagatelon!“


Tiel li vivis plu, ĝis fine li ne havis eĉ bagatelon por ĵeti ĝin sur ŝtonon, kaj tuta lia malfeliĉo devenis de sia amo je novaĵo kaj sia interŝanĝemo.

Mia maljuna patrinfrato, onklo Matis, leviĝis kaj kiam mi denove kliniĝetis — pro la moralo — tiam li diris: „Nu, tiun ĉi fojon mi indulgos vin; sed rigardu atente la fiobjektojn, kiujn vi ricevis anstataŭ la bela kuniklo, kaj kio koncernas la idon de la melhundo, je tiu ĉi okazo memoru la proverbon: Tion kio post-sekvas mordas la lupon.“ — Tion dirinte li foriris el la ĝardeno. —

Jen mi staris rigardante miajn trezorojn kaj konsciĝis, ke mi estis naivegulo, kaj de tiu horo mi ne plu interŝanĝis. Sed la amon je novaĵoj mi ne povis tiel rapide dekutimiĝi — tro — tro longe mi konservis ĝin. — Multe da malsaĝaĵoj elrampis el tiu ĉi ovo. —

Nun — tiel mi pensas — ĝi forlasis min; kaj se premas min la novaj botoj, aŭ la nova surtuto estas maloportuna, aŭ turmentas min la novaj vizaĝoj, tiam mi dezirus ree sidi sub la maljuna pomarbo kaj aŭskulti la malnovajn historietojn; mi dezirus ree ricevi „memoraĵon“ de onklo Matis, kaj nun mi certe pli multe atentus ĝin.

Tradukis Ella Scheerpeltz.



Kerkira.

De Paul Bünemann, Patras.

(Fino.)

2. Vizito de „Pondikonisi“.



ion fari? nun estas la demando.

La kapitano antaŭe ĉiam ĝentila, rifuzas al ni sufiĉan tempon por viziti la faman landdomon Achillion^{*)}). Lin petas kaj dekfoje ree petegas du junaj rusaj kunvojaĝantinoj, — li firme rifuzas eĉ al tiuj ĉi ĉarmulinoj la bezonotan pluan 1½ horojn. Rapide ni interkonsilas kaj danke akceptas, ke afabla juna greko nin kondukos, seppersona inter-nacia ĝevizantaro.

Kvin minutojn li devas marĉandi kun la barkisto, bona antaŭsigno; pli rapide estas kun la du veturigistoj: jam ni rapidas tra la parte tre modernaj, parte mezepokaj, tre mallarĝaj, movad-plenaj stratoj, kie la butikistoj elstarigas ĝis stratmezo siajn plej diversajn aĵojn. Nin premas la koroj, kiam ni vidas la birdovendistojn, kiuj kunligas la vivajn kompatindajn bestojn ĉe la piedoj kaj ilin portas en la manoj aŭ super la ŝultroj, la birdoj pendigante la kapojn malsupren.

Rapide ni alvenas sur la kamparan vojon, preterpasas riĉajn kampodomojn; „Ĉu ni tamen iras al la Ahilion?“ „Ne, tio ja estas neeble; ni veturas al Pondikonisi.“ „Kio estas tie ĉi?“ „Vi vidos ĉiuj baldaŭ, kaj mi klarigos.“ Preterflugas la sennombraj olivarboj; postkuras knaboj oferantaj por kvin letoj (2 sd.) plej freŝajn, belajn, el la kampoj florojn; altiĝas iomete la strato; — jen, ni haltas, elveturiliĝas.

Ho, glorega, belega naturo; en kia bildo vi vin metas antaŭ ni! Ĉu vere estas detere tiu harmoniaĵo? Kun la pero de la okuloj nia animo ĝuas la mirindan aspekton; ni eĉ ne demandas „kio estas?“ Por niaj belosentoj sufiĉas plene la nura vido de tia bela mondero.

De alta deklivo preskaŭ sub ni ondas la ĉielblua maro kaj vasten etendas maldekstren ĝis kie ĝin tuŝas la dia bluaĵo de l'ĉielo; dekstre trankvilas golfeto kun torfmarĉaj bordoj.

Sed tenas speciale niajn okulojn la du insuloj tie malsupre; sur la antaŭa vidiĝas blanka domaro; ĵus for de l' bordo ĝi estas,

*) elp. „Ahilion“.



Ahilion.

kaj ligata al tiu ĉi per malvasta ŝtondigo; estas la nuna nomata „Mus-insulo“; la trankvilaj domoj sur ĝi entenas monaĥojn; ho, la feliĉuloj, laborante tie for de l' brua mondo, proksime al bela naturo!

Pli granda belegajo tamen estas la alia insuleto, jen meze de l' golfo antaŭ ni; ĉe l' bordo kelkaj fiŝkaptistdomoj, kun blankaj muroj kaj ruĝaj tegmentoj; sur ilin brilas vivplena sunlumo. Malantaŭ la domoj sin altiĝas cipresoj, graciaj kaj foliaroriĉaj; en nemovanta severeco ilia malhela verdo refortikigas en ni seriozajn sentojn, pri l' devo ĉiumomenta, — ĉar la morto eĉ en plej belaj ĉirkaŭaĵoj estas ĉiam proksima, kaj nia vivo ankoraŭ ne estas plenumita. Tie sub la cipresaj branĉoj nevelkantaj dormas eterne la monaĥoj de l' Musinsuleto.

Mallaŭte oni nun transdiras la nomon de tiu alia: „Insulo de l' Mortintoj“, oni nun memoras la diron, ke la fama Boecklin prenis tiun ĉi Kerkira'an insuleton kiel motivo por sia ĉarmoplena samnoma pentraĵo; kvankam Boecklin neniam estis sur Kerkira, mi kredas, ke tamen la diro estas prava.

„Insulo de l' Mortintoj“, — ni restas senmovaj, senparolaj; ĉu ni preĝas. ĉu ni pensas nur, mi ne scias; sed iele tuŝite larmoj venas al miaj propraj okuloj; kisi mi dezirus tiun ĉi sanktan teron. Venas la penso, kiom vane senpripensaj homoj laboras; ilia sola celo ŝajnas esti la tombo. Tiaj vivis antaŭ ni kaj longe ankoraŭ vivos post ni, sed same ĉiam estas la naturo mem. Ĝi laboradas konstante, ĝojigante nin en multdiversaj manieroj; ĉu ni fine lernos de ĝi, ke ni devas pli esti parto de ĝi; ke ni konsideros niajn farotaĵojn; ĉu ni fine taŭĝe dankos la naturon por ĝiaj donacoj, ekzemploj, per sama konstanteco de volo kaj faro? Predikas tiu bildo al nia impresigebla animo pli ol povas diri mil konsolantoj; ni uzu la kapon por nobla pripenso, la manojn por nobla faro.


Nin vokas iu; hodiaŭo estas ankoraŭ por ĝui kaj lerni, por fortigi nian volon; morgaŭo devos vidi komencon de rea brava laboro por multaj jam inter ni. Al reveturo oni nin revokas; lastmomente ni rigardas dankplenaj kaj fortplenaj; ni tiam enveturiliĝas.

Mallongan halton ni faras ĉe la reĝa greka kampodomo „Monrepos“*), kies ĉarmajn ĉirkaŭantajn aleojn ni trapromenas,

*) elp. france „Mon repos“ (trad. Ripozo mia).

kies preskaŭ ĉiujn ĉambrojn ni trairas, ĝojante ke en tiu domo al reĝo eĉ estas eble, feliĉe vivi kiel riĉa, sed modesta burĝo; de la parkbordo, super la pontono, ni ĝuas lastan aspekton laŭlonge la ĉarmaj bordoj de tiu belega insulo, sur la urbon kaj fortikajon Kerkira, kaj tiam — — —

Tiam la fiakroj rapidas al la urbo; ni refreŝiĝas per glaciaĵo, skribas la neeviteblajn bildpoŝtkartojn, hodiaŭ ĝoje sendatajn;



Insulo de l' Mortintoj.

ni reenŝipiĝas, kaj jam dum ni vespermanĝas, malaperas la suno trans la gracie ĉarmaj montlinioj.

Sed la tago estis tiel bela, — ni ne povas tuj disiĝi; ĝis frua horo matene ni sesope ĝoje interparoladas, dum preterglitas tiu senkompara terpeco, kies belegan siluetan figuron montras ĝis noktmezo la arĝenta lunlumo al ni.

La morgaŭo alportos laboron; ni estas pretaj; ni nun sentas pli forte ol antaŭe, ke laboro ne estas malbenataĵo; la naturo igis nin pli taŭge verigi nian propran apartenon al ĝi; dank' al la hodiaŭ vidita „bela mondo“ ree montras sin al ni tiu devo-sento, kreskis tiu volkapableco, plifortigis tiu laboramo en ni, kiuj igas la vivon vivinda.



Migradoj de l' fabelo.



ur sabla dezerto de Arabujo malrapide moviĝas longa karavano. Super ĝi — sennuba ĉielo, ĉirkaŭe — senborda sabla maro. Malgaje treniras la kameloj; sur iliaj dorsoj dormetas brunhaŭtaj figuroj de beduenoj enlulitaj per ritma balanciĝado de l' brutoj. Je l' tagfino la karavano venas al oazo: ekbrulas la fajroj; garboj (aroj) da steloj, helaj, grandaj, tremlumantaj kvazaŭ brilantoj sur nigra tapiŝo, brulas kaj tremas en malluma suda ĉielo; la trinkigitaj kameloj, fleksinte la genuojn, kuŝiĝis kaj dormas. Sed la homoj ne povas dormi; ili sufiĉe jam dormetis dum la tago, lacigitaj de varmeĝo kaj lulado; ili interparoladas, sed novaj impresoj ne estas multaj: de kie ili povas veni en tia monotona dezerto? Kaj la nokto incitas la fantazion, elvokas revojn pri estonto, bedaŭron pri pasinto. Oni volas forflugi en landon kun malproksimaj mirindaĵoj, ien trans multajn landojn, en tridekan reĝnon, oni deziras ion malklaran: „alportu, mi ne scias, kion, iru, mi ne scias kien.“ En tia scenejo la fantazio ne sin ĝenas; la fabelo forlogas, terurigas la korojn, opa ridegado resonas en delikata aero ĉe la ridindaĵoj de l' fabelo, tremigante la kamelojn; la aŭdanto nevole ekĝemas, kiam la heroo de fabelo, bela reĝido, estas minacata de perfido kaj morto. La aŭdantaro longe memoros la fabelon kaj disportos ĝin ĉien, kien la vivo ĝin venigos.

En soleca vilaĝeto, tutkovrita de amasegoj da neĝo, el la forntuboj leviĝas kolonoj da fumo, ekstere — frostegas; kuri kaj ludi sur la strato estas malvarme kaj timige; la neĝa blovado forportos vin de l' domo. Eĉ la hundaĉoj, vilharaj vilaĝaj hundaĉoj sin kaŝas en hejmaj trairejoj kaj plende blekestas, je ĉiu bato de l' vento kontraŭ grizajn murojn de l' dometoj. La infanoj tamen ne enuas: ĝojon kaj plezuron ili havas ja hejme. Venis vilaĝa tajloro, sidigis sur benkon, demetis botojn, kiel decas al ĉiu honorinda tajloro kaj nudpiede eklaboris. Li promeniĝas dikan kudrilon sur maldelikata hejmfarita drapo kaj kunkudras per fortika fadeno simplecan kampulan vestaĵon. Dume li seninterrompe babilas: ĉikanas la mastrinon, per edifa tono li diras konsilojn por lo saĝa vivado kaj iafoje



Karavano.

rakontas fabelojn. Vilaĝa vaganta tajloro estas la plej bona konanto kaj disportanto de l' fabeloj, favorato kaj amiko de l' infanoj. Ne nur gebuboj — ankaŭ plenkreskuloj kolektiĝas ĉirkaŭ li, por aŭdi lian spritan fabelon, ridi je liaj ŝercaj sentencoj. Oni ripetas en la domo tiun viglan fabelon, oni disportas ĝin malproksimen de vilaĝo al vilaĝo, de lando al lando. Kaj jen montriĝas, ke ĝi estas la sama fabelo, kiu naskiĝis ie en Arabujo, longe vagadis tra la mondo kaj fine venis en iun vilaĝon de Orela (Orlova)¹⁾ gubernio. El tie ĝi iras ankoraŭ pli malproksimen, venas al Mordvoj²⁾, eĉ Ekstrem-Nordon al Laponoj³⁾. Sed la fabelo restas la sama; nur kelkafoje ŝanĝiĝas ĝia enhavo, alfarita al enloka vivado. Jen, ekzemple nia fabelo pri la vulpo, forŝteladinta ĉe avo de lia glitveturilo fiŝon post fiŝo, fiŝon post fiŝo. Kie do oni rakontas tiun fabelon! Oni ne scias de kie kaj kiam ĝi estis verkita. Oni scias, ke je l' sudo de Afriko la Hotentotoj rakontas la saman ruzaĵon de l' vulpo, sed ili ne

¹⁾ La rusa vorto „Orjoll“ estas la nomo de gubernia urbo kaj de l' Oaglo (birdo).

²⁾ ³⁾ Finnaj gentoj, antaŭslavaj loĝantoj de Rusujo, vivantaj ankoraŭ nuntempe.

konas la vulpon, kaj heroo de l' fabelo fariĝas ŝakalo. — Sur la insulo Java oni rakontas la samon, sed alimaniere: la vulpon tie anstataŭas leporo. Sed la leporo ne manĝas fiŝon, kompanse li ŝatas bananojn, longajn flavajn aciddolĉajn fruktojn. Jen la fabelo diras pri la leporo, ke li ŝajniĝis mortinta, sin kuŝis ĉe la vojo kaj kuŝas. Renkonten iras maljunulo. Li ekvidis malvivan leporon, ekĝojis kaj metis ĝin dorskorbon kaj en la korbo estis bananoj. La leporo komencis elĵeti bananon post banano, bananon post banano. Ĉion li elĵetis, elsaltis kaj forkuris, por manĝi la akiron. Ni trovas la saman fabelon, sed pli absurdan (kontraŭsencan), — kial do la maljunulo povis ne rimarki, ke lia ŝarĝo fariĝis pli malpeza? La fiŝveturigado — alia afero: la ĉevalo ne parolas; ĝi ne povis do diri al la maljunulo, ke la veturilo malpleniĝis.

Tiaj vagadoj de l' fabeloj tra la mondo estas tre ordinaraĵoj: oni devas nur esplori, kie povis aperi la fabelo, per kiaj vojoj ĝi ekmigris tra la mondo, kiu disportadis ĝin? Se oni komprenas ĉion tion, ofte okazas, ke komence la fabelo estis tute ne amuzaĵo,




Karavano.

sed oni ĝin rakontadis tute serioze, kun edifa celo, por instrui la homon pri tio, kio fariĝas en la mondo, kaj kiel li devas agi rilate al la homoj kaj bestoj. Iafaĵe trovinte la patrujon de l' fabelo, ni subite ekvidas en ĝi profundan sencon aŭ postsignojn de tiel antikva deveno, ke ni ne povas prezenti al ni ĝian komencon alie, ol antaŭ multaj miljaroj. Ni trovas ĉi tie postsignojn de l' primitivaj religioj de l' homaro, restaĵojn de tio, kiel la sovaĝuloj komprenadis la naturon kaj sin mem. Tial pri la fabelo interesiĝas ne nur infanoj kaj ne nur pro amuzo, sed ankaŭ grandaj poetoj kaj scienculoj: multe da belaj libroj estas skribitaj pri la deveno de l' fabeloj, pri ilia disvastiĝo kaj vivo. Amu la fabelon de via nacio kaj ĝin mem, laboru por ĝi — tiam, se ne mi, — niaj malproksimaj posteuloj ekvidos tiujn tempojn, pri kiuj rakontas niaj fabeloj ekfluos tra Rusujo laktaj riveroj en kiselaj⁴⁾ bordoj.

Prof. A. Pogodin.

(El la jubilea libro de l' revuo: „Juna rusujo“.)

⁴⁾ „Kiselo“ — speco de faruna kaĉo. rusa manĝaĵo.



Se vi havas ankoraŭ patrinon.

(Laŭ A. Träger).

Ankoraŭ posedante vi
Patrinon, kiel homo riĉa
Ekvoku ĝoje: „dank' al Di'!“
El multaj vi la plej feliĉa!
Patrinon posedante vi
Per amo ŝin flegatan iĝu,
Ĝis kiam sian kapon ŝi
Mortlacan pace dormkuŝigu!

Ŝi sin dediĉis de l' spirer'
Unua al vi zorgoplene,
Kuŝigis litten je l' vesper',
Kisante vekis vin matene.
Naskinta vin per dolorfort'
Forestis helpa ŝi neniam,
Se vi malsanis. Eĉ de l' mort'
Atakon ŝi rifuzis ĉiam.

Vin ŝi edukis je piec',
Instruis pri ekparoladi,
Instigis de l' fruinfanec',
Sinjoron Dion adoradi,
Faldante manojn. La patrin'
Forlasis vin neniafojon,
Fidela kiel gvidestin'
Gardante vian virtan vojon.

Se la patrinon la morthor'
Forrabis, vi ne feliĉigos
Ŝin. Sed la tombon viva flor',
Plantita teren, plibeligos.
Patrina tombo en la mond'
Al ĉiu estas grandsanktaĵo
Savriĉa, se la brua ond'
Ĉirkaŭas lin de l' malbonaĵo.

Pastro Lösche-Wurzen.

En la regiono de la „Rosengarten“ (Rozoĝardeno).



En, sub bluega suda ĉielo, en la feina distrikto de la Dolomitoj^{*)}, kie en benita klimato maturiĝas figoj kaj vinberoj, unuigante italan fruktriĉecon kun la poezio de la „Etschgau“ (Eĉgaŭ), jen altiĝas la monto „Rosengarten“, la „Laurinsburg“. Tie, ĉe ĉiu paŝo legendo kaj historio murmuretas en la orelon de la migranto strangan sciigon el delonge pasintaj tagoj.

La dentoj de la Rosengarten apartenas al la plej admirataj kaj vizitataj Dolomitoj de la suda Tirollando. Similaj al gigantaj fortikaĵoj ili stariĝas je la horizonto. Miljara batalado de la elementoj ilin parte dispecigis, tiel, ke kvazaŭ paftruoj kaj murrompaĵoj fariĝis. Vualo de fabela brilo ĉirkaŭas la Rosengarten, unu el ĝiaj plej famaj priskribistoj, Heinrich Noë ĝin nomas: „la Orfikano mondanimon, nevideblan, neatingeblan kaj misteran!“

Apud la Rosengarten, en iama legenda tempo, Laŭrino, reĝo de la malgrandeguloj batalis kontraŭ la gigantoj Dietrich kaj Wittiches pro la posedo de Simhildo, fratino de Dietlieb von Steier. La kombato daŭris ĝis la rompo de la sorĉa zono de la malgrandegulo kaj ĝis la detruo de l'regno de la rozoj.

Ankoraŭ hodiaŭ oraj floroj de l' feliĉo estas florantaj en la „Gartel“ (ĝardeneto) videbla sur nia bildo malsupre de la pinto.

La „Gartel“ nur estas alirebla al bonsortuloj, ĉar ĝi estas gardata de la „sanktaj fraŭlinoj“ el la legendo. Oni bone komprenas, ke la homidoj nur kun adora timo kaj respekto suprenrigardis el iliaj vinberejoj kaj fruktarbetoj al la eternaj altaĵoj, kiuj vidis aperi kaj malaperi sennombrajn gentojn. Nur en nia maltempo kuraĝaj vojoserĉantoj enpenetris en la regionon de la elfoj por meti la piedon sur la dentojn de iamaj koralorifoj.

Nur la moderna epoko de la turismo kaj de la vojaĝemeco forpelis iom post iom la fantomojn kaj monstrojn el la Rosengarten. Luksaj hoteloj troviĝas tie, kie iam staris la sorĉaj

^{*)} Speco de kalkŝtono, nomo de tirola montaro.



Rosengarten (Rozogardeno).

ĝardenoj kaj kasteloj. Rifuĝaj dometoj prezentas gastigan tegmenton en la samaj lokoj, kie iam la malaperita regno de la malgrandegulo estis kuŝanta. En bone prizorgitaj vojoj kaj vojetoj la internacia vojaĝantaro tramigras la regionojn, kie en la tagoj de la legendo la fantomaj rajdantoj interbatalis. La kulturo kun ĝia delikateco kaj perfekteco ankaŭ tien penetris,



Monumento de Walter von der Vogelweide.

kie vivo kaj kreskado ĉesas, la malmega riskemeco de la turismo estris dezertojn apartenintaj iam sole al la ĉamo kaj la aglo.

Kara leganto, antaŭ la ĝuado de la montegara mirindaĵo, bonvolu restadi ankoraŭ momenton en la ebenaĵo. Sekvu nin, ni petas, en la urbeton Bozeno, la faman restadejon de sennombraj fremduloj. Jam antikva kronikisto skribis: „Tiel longtempe kiel ekzistos Tirola lando Bozeno ĉiam estos ĝia centro!“ Tiu ĉi opinio estas rajtigita por la favora situacio de Bozeno, ĝia fruktodona kaj malsevera klimato, kaŭzanta la bonstaton de

la urbanoj, kaj pro la noblaj formoj de la pejzaĝo. Ĉie la vizitanto ĝuas la aspekton plej belan de homa laboremece, en benegata distrikto kuŝas belegaj vinber- kaj fruktĝardenoj. Tie ĉi kreskas kaj prosperas la nobla vino „Bozenero“ jam ŝatita en antikvaj tagoj de la germana poeto Walter von der Vogel-



La „Batzenhäusel“.

weide. Ankoraŭ hodiaŭ „Bozenero“ apartenas al la plej bonaj „ĝutoj“, estiĝantaj en germana lando sub itala ĉielo. Al la kantisto Sinjoro Walter oni starigis 1889 belan monumenton, ĉefverko de la tirola skulptisto Heinrich Natter.

Bozeno, la plej suda germana urbo en tirola lando kuŝas ĉe la enfluo de la Talfer en la Eisak. Ĝi montras duone italan kaj germanan karakteron. Fama estas la „Laubengasse“ kun ĝiaj malvarmetaj arkaĵoj, mallarĝa, sed pura kaj agrabla strato,



La „Lauben“-strateto.

1363 ĝi apartenas al la Habsburgidoj kaj de tiu tempo komencas ĝia kultura ekflorado, Bozena fariĝis komerca centro.

Perdinte per novaj senperaj komercovoj tiun ĉi specialan karakteron Bozeno aliflanke akiris novan famon per la multiĝo kaj kresko de la vojaĝemeco kaj per novaj komercaj entreprenoj, precipe per la kulturado de fruktoj kaj fruktaĵoj.

Antaŭ ĉio la turismo alportis famon kaj gloron al la bela Bozeno kaj al la najbara kuracloko Gries.




Lavistinoj en Bozeno.

kaj la „Batzenhäusel“ (Bacenhäusel). Ankaŭ la aspekto de la lavistinoj estas interesa, itale estas la lavomaniero en la strato kaj per malvarma akvo, germane la uzado de lignaj anstataŭ ŝtonaj kuvoj.


Multnombraj estis la estroj de la bela regiono dum la pasintaj jarcentoj. De la jaro

Ambaŭ urboj estas mirinde favoraj kiel elirlokoj al la dolomitoj kaj glaciintermontoj, ili fariĝas la centro por la sen-nombruloj kunvenante ĉiujare el ĉiuj direktoj pro ĝuado de



Heinrich-promenejo.

la naturo. La klimato de la distrikto Bozeno-Gries estas mirinda, la kreskaĵoj per suda karaktero surprizas la vojaĝanton. Tiun ĉi agrablecon la distrikto dankas al la favora



Terpiramidoj.

benegata teritorio. Gries certe estas la plejmilda kuracloko en germana lando. Kiel belaj estas la montoj salutantaj el la malproksimo! Antaŭ ĉio la „Rosengarten“ rigardanta en la fenestrojn de la kuracgastoj kaj ardanta en grandioza fajra feaĵo kiam jam molaj, densaj ombroj kovras la valon de la Eĉ.

La ĉirkaŭaĵo de Bozeno-Gries ne havas ion similan. Ĉio, kion la eterne bela naturo povas prezenti al ni,

situacio de l' montoj. Ili ĉirkaŭas vastan valon je tri flankoj, malfermiĝinte nur al okcidento, kie la Eĉ estas preterfluanta. Kaj ankaŭ tie la giganta „Mendelwand“ (Mendelmuro) kontraŭe altiĝante, protektas la paradizon je ĉiu ventego.


La saman oportunan situacion kiel Bozeno havas la aerkuracloko Gries. Kiel agrabla estas dum la malfrua aŭtuno la dolĉa aero de tiu ĉi feliĉa regiono. Estas vera paradizo, tiu ĉi riĉa, fruktodona, floranta,




Kostumo en la Sarn-valo.

jen estas videbla. La rifoj de la Rosengarten altiĝas kiel stonigitaj fulmoj, mallumaj pinioj kaj legendumaj muroj kaj kasteloj ornamas la deklivojn, vinberarkaĵoj montras la riĉecon de la valo. La fremduloj, alvenintaj el ebenaj landoj trovas plenan plenumon de siaj deziroj, ili kun ĝojo vizitas la belajn allogajn lokojn. Tre bela ekzemple estas la Erzherzog (arĉduka)-Heinrich-promenejo en Gries, ornamita de palmoj, cipresoj, figuoj, mirtoj kaj agavoj.

La meza montaro apud Bozeno, — la plej bela de l' tuta Tirolo — estas neelŝerpebla je beleĝaj temoj, pruvata per senombraj pentraj skizoj el la lando de l' vino kaj de la malnovaj kasteloj. Tuta libro pri tio estus kunmetebla. Ni nur rapide skizas kelkajn liniojn. Jen la „Ritten“, monto de kiu plej bela perspektivo sin prezentas. Rampado al la „Ritterhorn“ (korno de l' Ritten) ni varme rekomendas. Tie oni trovas la „Terpiramidojn“, famaj pro iliaj strangaj formoj. Estas kolonoj portantaj




Kastelo Ried.




Kastelo Reineck - Sarnthein.

sur la pinto ŝtonon, kiu per ĝia malmoleco kontraŭstaris al la dispecigado per aero kaj akvo.



Sarnthein.

Neniu vojaĝanto forgesu la viziton de la bela, ombra „Sarn-tal“ (Sarnvalo). Ĝi havas dekunu horan longecon kaj prezentas



Karersee - Hotelo.

al niaj okuloj sennombrajn belecojn. La kastelo Runkelstein estas la plej fama de la lando, tie „Konrad der Vintler“ iam verkis siajn „Floroj de l' virto“, ĝi estis je la sama antikva tempo ornamita per pentraĵoj el Tristan kaj Isolde de Gottfried von Straßburg. La ruinoj Ried, Rafenstein, Fingel kaj Wangen, la malluma Maknerkessel (Maknerkaldrono), kaj la kruda „Johanneskofel“ estas la plej petrindaj objektoj de la vojo apud la Talfer, ĝis la somerfreŝejo Sarntheim, kronita per la soleca kastelo Reineck.


La Eggenvalo.

Proksime de la stacio Kardaŭn ĉe Bozeno malfermiĝas la porfira intermontaĵo de la Eggenvalo, kun la el ĝi suprenĝvidanta „Dolomita-Strato“, fama pro senĉesaj kaj ŝanĝoplenaj vidindaĵoj. La ŝoseo estas malfermita la multforman alpan mondon ankaŭ al personoj, kiuj deziras konservi sian senlacigan kutimon. Kompreneble ili ne trovos la mirindaĵojn de la kruta vojo, sed ili atingas en oportunaj veturiloj la ĝigantan Karersee-Hotelon. Vera surprizo en tiu ĉi alpa regiono! Kuŝante sur velvete mola alpotero ĉe la malsupraĵo de la Rosengarten kaj de l' Latemar, neniu alia el la tirolaj fremdulejoj al ĝi estas komparebla. La imperiestrino Elizabeto, delikatsenca amikino de la naturo, travivis grandan parton de la somero 1897 en la Karersee-Hotelo.

Sur tiu ĉi altebenaĵo plaŭdetas la revema „Karersee“ (Karerlago). Supren altiĝante al la nuboj la krudega Latemar, disŝirata per neĝaj findoj, kronita de pintuma diademo. Alia bildo el la „Mondo de la Dolomitoj“! Ni nomas al vi la „Tiersertal“ (Tirservalo), sorĉa vorto por ĉiuj vojaĝantoj, alkondukitaj unufojon per ilia bona sorto. Ĉar senpere ĝi enkondukas lin en la ŝtonegan belecon de la Rosengarten. Sankta meditado vin kortuŝas, vidante la ŝtonegan konstruaĵon superverŝitan de purpuro dum la sunsubiro, la dentoj tiam similas al ardaĵ kamentuboj. Niaj bildoj montras la plej fantaziajn formaĵojn de la Dolomitoj, la „Riesenfinger“ (Ĝigantaj Fingroj) kaj „Das gespreizte Mandl“*) (La disstariĝinta vireto.)! Supre de la „Vajolett-hütte“ sin montras la „Winklerturm“, Turo de Winkler, la plej sovaĝa el la ŝtona sekvantaro de la reĝo Laŭrino.


*) „Mandl“ estas dialekta esprimo de „Männlein“, oni kredis vidi viron disstariĝinte la krurojn.

Migru nun, kara vojaĝanto, al alia parto de la Dolomitoj!
Se vi volas viziti la popolojon de la Ladinoj pro la admirado





La „Vajolett“-domo.

de ĝia demona ŝtonegaro, mi petas vin, vizitu la „Grödnertal“
(Grednervalo). Gröden fariĝis fama per la tri restadejoj de la



La valo de Gröden.



La „Hasel“kastelo.

turistoj St. Ulrich (1336 m), Christina (1423 m) kaj Wolkenstein (1563 m), tre ŝatataj kiel somerfreŝejoj. La sportoj ski kaj rodel (neĝkurado kaj montglitveturado), ankaŭ dum la vintro allogas gastojn al la interesa distrikto kun la stranga baldaŭ malaperinta dialekto de l' ladino! —

Jen la fino de nia ekskuro, estas tempo reveni en la ebenaĵon, ni adiaŭ diros al la urbo de Walthero kaj al la dolomitoj. Pro tio ni supreniradas de Bozeno al la ruino de la kastelo „Haselburg“. Ĝiaj muroj estas superrampataj de heredo, vastan rigardon ĝi permesas super la perspektivo de la distrikto de Eĉ kaj Ejsak.

Tie ni enigas niajn memorojn de la vojaĝo en la fajran vinon de Magdalena, rigardante la riĉkoloran pentraĵon de la valo ni en revo denove travivas la belajn horojn

„en la regiono de la Rosengarten!“

M. Hankel.



Sub la meznokta suno.

De la norvega aŭtoro Erik Lie.



La fiŝkaptistaj dometoj ĉe la bordo de la golfeto estas ŝlositaj kaj silentaj, kaj sub iliaj torfaj tegmentoj dormas lacaj homoj.

La modestaj betuletoj — tro malgrandaj por kaŝi la rompitaĵajn fenestrojn kaj la difektitajn pordojn de la dometoj — — sonĝas, sonĝas, ke ili estas tiel riĉaj je oro kiel la spegulaĵaj bildoj de ili, kiuj dancetas sur la brilantaj, plaŭdantaj ondetoj.

Sur bastonoj kaj stangoj pendas retoj kaj retegoj, multepezaj je marsala fluidaĵo, kaj etendiĝantaj en larĝaj faldoj, kvaŭzaŭ ripozantaj post la laboro de la tago.

Boatoj, ligitaj per ŝunroj kaj ankroj, malpuraj je ŝlimo kaj koto kaj kun skrapita eksteraĵo, balancas siajn fieretajn liniojn en ĉarma dancado sur la ondoj, dum la dolĉa, mistera nokta sunlumo ornamas la tutan pejzaĝon per ia ora krepajo.

Kaj ekstreme en la marbordo dormas la mevoj.

Kiam silentas ĉiuj voĉoj de la tago, kiam ĉiuj la laboremaj manoj ripozas, dum miloj da flugemaj sentoj migras tra la paca, sunplena nokto, — tiam la voĉoj de la naturo estas aŭdeblaj, kaj la montpintoj el sia altaĵo parolas per la murmurado de venteto vaganta.

Kaj la golfeto malfermas por la ondoj de la maro sian virgulinan lapon*).

El la dezerta glacia maro, kie regas ventegoj kaj sovaĝa vetero, la ondoj venis. Kaj ili sin ĵetas borden, ŝaŭmantaj super la ekstremaj insuletoj, disrompiĝantaj kontraŭ la nudaj ŝtonegoj.

Poste la senfortiĝitaj margiĝantoj en plaŭdetantaj, brilaj linioj eniras la fjordon kaj atingas la gulfeton ornamitan per betuletoj, kaj tie-ĉi la ondoj karese kizas la blankan bordon, longe ripozantaj, malrapide forirantaj.

Trad. Nils Ökland, Haugesund (Norvegujo).

*) Lapo = angl. lap, germane Schoss, skand. favu, france giron.



Bibliografio.

„La Bela Mondo“ raportas pri novaj verkoj nur, kiam la redakcio donace ricevis du ekzemplerojn. (Adreso: Dro Schramm, Dresden-Ständehaus.)

Oficiala gazeto esperantista. Organo de la lingva komitato kaj de la konstanta komitato de la kongresoj. Redakcio kaj administracio 51, rue de Clichy, Paris. Jara abono: 5 frankoj.

La numero 7 de tiu ĉi oficiala gazeto enhavas la oficialajn dokumentojn kaj regularojn pri la oficialaj institucioj de Esperanto. Estis tre laŭdinde, ke la redakcio reprenis tiujn ĉi dissemiajn kaj malfacile troveblajn kaj por Esperanto tre gravajn dokumentojn. Kun granda ĝojo ni povas sciigi niajn gelegantojn, ke la redakcio de la oficiala gazeto intencas poste eldoni tiujn ĉi dokumentojn en apartaj broŝuroj, kiuj kostos po 0,25 centimojn. Tiuj ĉi broŝuroj rilatos al: 1^e Lingva Komitato, 2^e Konstanta komitato de la Kongresoj, 3^e Esperantista Centra Oficejo kaj Oficiala Gazeto. Laŭ nia opinio estas morala devo de ĉiuj esperantistaj grupoj subteni tiun ĉi oficialan ĵurnalan abonante ĝin ne nur en unu, sed en kelkaj ekzempleroj.

Časopis Českých Esperantistů. Oficiala organo de bohemiaj esperantistoj kaj de Centra Asocio „Bohema Unio Esperantista“ (B. U. E.). Adreso: E. Kühnl, Praha II. 2023. Dittrichova ul 7.

Tiu ĉi organo de niaj bohemiaj amikoj enhavas nun literaturan aldonaĵon „Legolibro de bohemiaj Esperantistoj“. En la unua numero de tiu ĉi jaro ni legas la romanon „Avineto“, tradukaĵo de unu el plej bonaj bohemiaj verkoj. Estas tre salutinde, ke ni nun povas legi ankaŭ bohemiajn rakontojn, romanojn, fabelojn k. t. p. Ni estas tre dankemaj al la redakcio por tiu ĉi riĉigado de nia literaturo. La Bohema Unio nun kolektas kaj sole akceptas adresojn por la pluaj numeroj de la tiel nomata „Faukner-adresaro. Skribu do al la redakcio en Praha.

Belga Esperantisto. Monata revuo redaktata de Léon Champy, Fr. Schoofs, van der Biest-Andelhof, Jer. van Laere kaj Oscar van Schoor kun la kunlaborado de multaj aliaj belgaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Antverpeno. Presejo de Joz. Buerbaum, Avenue Moretus 60. Abonprezo por Belgujo Sm. 1.50, por Eksterlando Sm. 1.80.

La reformemuloj ne havis multe da sukceso en Belgujo. Iliaj klopodoj nur naskis momentan dubon kaj haltigon de propagando por nia Zamenhofa Esperanto. La nova ĵurnalo „Belga Esperantisto“ montras, ke la grava plimulto de la belgaj esperantistoj tute ne konsentas forlasi nian Zamenhofan lingvon, sed restas fidela al la fundamento. Ĝi skribas: „For estas la tempo de senfinaj, malefikaj diskutoj kaj de malpaco!“ Ni kore salutas nian novan kunfraton kaj deziras al li longan vivon.

Esperanto, Grammaire et Syntaxe. Cours complet par A. Esselin. Paris, Librairie de l'Esperanto, 15 rue Montmartre, 102 paĝoj, prezo: 0,70 Sm.

The Esperanto Manuel, a complete guide to the International Language. by Margaret L. Jones. London, the British Esperanto Association and Liverpool, the Esperanto Office. 238 paĝoj; prezo: 0,75 Sm.

Du novaj lernolibroj por nia kara lingvo kaj ambaŭ bonaj verkoj! S^{ro} Esselin donas la plej gravajn partojn en pli grandaj literoj kaj la aliajn en malpli grandaj. Imitinda ekzemplo! Fraŭlino Jones donas multajn kaj belajn literaturajojn kaj ĝojigas per tiu ĉi fakto la glerantojn. Ni nur povas varme rekomendi tiujn ĉi du librojn.

Kristana Esperanto Kantareto. 11 kantoj kun melodionotoj. Eldoninto: P. Hübner, Mühlheim a. Rh., Friedrich-Wilhelmstr. 66, 0,50 M.

Dana esperantista amiko ebligis la eldonadon de tiu ĉi libreto donacante sumon da mono. Ĉi enhavas kelkajn kantojn, kiujn ni konas el „Esperantista Kantaro“ de Karl Jost, krom tio la kantojn, kiujn tradukis Hugo Marx por la esperantista diservo en la krucpreĝejo dum la 4^a kongreso. Ĉis nun ni nenie legis jenajn kantojn: La potenco de l' amo; Glor' al Jesuo; Bela estas la tero kaj Vesperkanto. La eldoninto de tiu ĉi kantareto estas la redaktoro de la gazeto „Dia regno“, kiu estas la organo de la Kristanaj unuiĝoj de junaj viroj. Ni deziras al li multan sukceson por ĉio, kion li entreprenas.

Frazaro de Henri de Coppet, profesoro diplomita de Esperanto. Kolekto de la Revuo. Francujo. Librejo Hachette kaj K^o 102 paĝoj.

La frazoj, el kiuj konsistas tiu ĉi bona frazaro, estas prunteprenitaj el la konversacilibroj, kiujn publikigis Guérin en Parizo. La sukceso, kiun havis la eldonoj de Guérin en diversaj lingvoj kaŭzis Coppet, traduki ilin Esperanton. Ni estas certaj, ke ĉiu, kiu uzas la libron, estos kontenta.





Alia sono sonas,
Foriru nun viret'!
Printempo nun alvenas
Vekiĝas nun bestet'.



Kanteto.

„Mallaŭte, mallaŭte pia melodio!“

Kanto pia
melodia
supreniru al radia
stelaltaĵo!
Adoraĵo
mia sonu al firmaĵo!

Vin, senlima
Disinjero,
petas miaj man' kaj koro:
ĉe l' homaro
kun bonfaro
staru via anĝelaro!

(Laŭ Kind.)

Pastro Lösche, Wurzen.



Al la muziko.

(Schober.)

Vi kara art' en multaj ĝrizaj horoj,
Ĉirkaŭis nin de l' viv' sovaĝa rond';
Vi tiam donis pacon al la koroj,
Salutis nin el pli beleĝa mond'.

Do se ekĝem' el Via harp' elfluis,
Dolĉeĝa, pura, sankta ton' de Vi:
En malfermitan ĉielon ni forflugis,
Vi kara art', pro tio dank' al Vi.

Marie Weiner, Dresden.



Unua vespero.

(Andersen.)



Ln la hieraŭa nokto — tio ĉi estas la propraj vortoj de la luno — mi glitis tra la klara Hinduja aero. Mi speguligis min en la Ganges: miaj radioj penadis penetri tra la densa plektaĵo de la maljunaj platanoj, kiu arkaĵigis, kiel la ŝelo de la testudo. Jen venis el la densejo hinda knabino, malpeza kiel la gazelo, bela kiel Eva; estis io tiel aera kaj tamen tiel riĉa de vivpleneco en tiu filino de Hindujo! Mi povis vidi la pensojn tra la delikata haŭto. La dornaj lianoj disŝiris ŝiajn sandalojn kaj tamen ŝi rapide paŝis antaŭen; la rabbesto, kiu venis de la rivero, kie ĝi estis estinginta ĝian soifon, pretersaltis timeme, ĉar la knabino tenis en la mano brulantan lampon; mi povis vidi la freŝan sangon en la delikataj fingroj, kiujn ŝi tenis protektante antaŭ la flamo.

Ŝi proksimiĝis al la rivero, metis la lampon sur la fluon kaj la lampo naĝis malsupren. La flamo flagris kvazaŭ ĝi volus estingiĝi, sed ĝi tamen brulis, kaj la nigraj, brilegaj okuloj de la knabino sekvis ĝin, rigardantaj animplene malantaŭ la silkaj franĝoj de la okulharoj: ŝi sciis, ke, se la lampo brulis tiel longe kiel ŝi povis vidi ĝin, vivas ankoraŭ ŝia amato. Sed se ĝi estingiĝis, tiam li estis mortinta. Kaj la lampo brulis kaj flagris kaj ŝia koro brulis kaj flagris; ŝi malleviĝis en la genuojn kaj preĝis. Apud ŝi en la herbo kuŝis la malseka serpento; sed ŝi pensis nur pri Brama kaj pri sia fianĉo. „Li vivas!“ ŝi ĝojegis, kaj de la montoj resonis: „Li vivas!“

Trad. Prof. Dr. Lederer, Prag.



Impresoj de maro.



Diuno de jaro esti sur ŝipo, eble ŝajnus duonjara ekskurso, kaj tamen tio signifas travivi ses longajn monatojn en societo de homoj havantaj diversajn edukojn, tute kontraŭstarantajn opiniojn, diferencajn sentojn kaj karakterojn, unuvorte vivi en societo de homoj reciproke fremdaj. Komence homo provas trovi en tiu ĉi dezerto tamen animon almenaŭ iom proksiman, li serĉas, frapas tie, frapas tie ĉi, sed de ĉie sonas malplena resonado, malkompreniĝo. Restas nur fermi sian koron je cent seruroj kaj vivi, aŭ pli bone vegeti. Tago post tago la homo kutimas al senanima vivo, ĉar li nur tiel plej malmulte malhelpas al sia ĉirkaŭaĵo kaj al si mem. Nur iam animo en ĝiaj katenoj ekribelas per vulkana forto kaj tiam estas malbone al la homo. Multego da energio amasigita en interno volas eljetiĝi eksteren, aliformiĝi je aĝo, korpo tremiĝas, kapo batas senvivajn murojn de kabino, sed ĝiaj metalaj plataĵoj nur malforte resonas, ke oni povus supozi aŭskulti internan sonoradon, apartenantan al tiu malfeliĉa animo. For de tie ĉi, en la mondon — sed oni estas alforĝita al tiuj kelkaj kune fortikigitaj plataĵoj!

* * *

Terure estis al mi en la koro, precipe kiam proksimiĝis Pasko kaj kun ĝi tie ekstere, sur tiu mallarĝa flava strio, kiun mi vidis el ŝipo, burĝonis ĝaja printempo. Se sukcesis al mi por kelkaj horoj elveni el abomena ventro de la ŝipo sur fortikan teron, kaj mi vidis klare denove naskiĝantan vivon, mi enflaradis la bonodoron de tero, aŭskultis zumadon de burĝonanta arbaro, tiam ŝajnis al mi, ke la naturo disĵetadas ĝiajn belaĵojn sur la tero ju pli malŝpareme, des pli malvaste kaj obstine ĉirkaŭprenis nin nia griza grandegulo.

Fine venis Pasko. Tiam disiris kiel amaso da hirundoj tiuj feliĉaj, kiuj ricevis forpermeson. Sur la ŝipo restis nur kelkaj teduloj kaj en daŭro de la festoj ili fariĝis ankoraŭ pli tedaj. Mi apartenis al ili. Silente ni faradis nian servon kaj se ni estis devigitaj resti ĉiam sur la ŝipo, plendo estis por ni sola amuzaĵo.

Mi havis sur muro de mia kabino kopion de bildo de pentristo Uprka „La dimanĉa mateno“, kun blankiĝaj nebuloj, kiuj tiel mole kovris sukoriĉajn verdajn herbejojn. Tiujn ĉi nebulojn elspiradis dum nokto la tero. La klara suna lumo rebriliĝas kaj rompiĝas en milaj gutoj per briletaj koloroj. La odoro de herbejo, arbaro, maturiĝanta greno kuniĝas en ravanta spiro de la vekigita naturo. Antaŭ „La dimanĉa mateno“ mi genufleksadis kaj mia preĝo estis senfina vico da rememoroj je tiu ĉi provinco kaj ĝia popolo.

Pasis Pasko kaj tiuj feliĉuloj devis reveni. La servon oni plenumis kiel ordinare kaj iom da maldolĉeco malaperis el koro.

Unufoje malfruan vesperon mi suriris sur ferdekon por enspiradi la aeron kaj freŝiĝi de ekvido la stelan ĉielon. Mi iradis malrapide ĉirkaŭ dormema gardo, grandaj pafilegoj, murmurantaj ventoliloj kaj fine mi malproksimiĝis de homoj. Mi forkuris de homoj, ĉar mi vidis ilin ĉiutage centfoje, milfoje. Mi alvenis pli proksime al la naturo, propre al la malvarmetiga maro, kiu tiel forte allogis min. Mi venis al stango por la flago. Kia estis mia mirego, vidinte tie ĉi ankaŭ homevitulon. Li nur revenis de la forpermeso kaj videble sin trovis per pensoj en alia mondo. Tio estis signojunkro Kurz, antaŭ nelonge veninta sur la ŝipon, juna, bela homo kun esprimo de revado en vizaĝo. La tuta aperaĵo faris impreson kiel homo tre sentema. Li sidis sur fera ŝpinilo, ĉirkaŭ kiu oni bobenumas ĉenojn, kaj medite rigardis sovaĝan akvoturniĝon de ondoj ŝaŭmigataj per ŝraŭbo. Mi staris longan tempon ĉe li; mian estantecon li ne rimarkis.

— „Ĉu vi estas tiel pripensema,“ mi lin demandis mallaŭte?

— „Mi petas vin, kiu ne estus pripensema,“ li ekĝemis. „Dek belegaj tagoj plenaj da potencaj impresoj pasis kiel sonĝo kaj nun premas min ree tiu terura enuo de nia ĉiutaga vivo.“

„Mi tute kredas. Estas kruele nun veni tien ĉi. Jen, sur la tero ĉio burĝonas kaj ni estas dum vivo entombigitaj. Mi ĝin ankaŭ timas. En la plej proksima okazo mi deziras forveturi Italujon, kaj mi ne scias, kiel mi fartos post reveno. Kaj kie vi do estis?“

— „En St. Martin en la franca Riviera.“

Malrapide ni komencis pli vivan interparoladon. Mi sciigis, ke li kunvenis tie kun ia skulptisto loksida en Londono kaj kun lia fratino. Entuziasme li rakontis precipe pri ŝi. Je li efikis

ŝia anima beleco, sed antaŭ ĉio tiu trankvila sentrudema ĉarmo de inteligentaj virinoj, liberigita de ĉiu vulgara koketeco. Kun ŝi, kiu havis plenan komprenon por la arto de sia frato kaj por la maloportuna marista vivo, sur bordo de trankvila maro, kie la aero estis saturita de ĉarma bonodoro de violetaj kampoj, li travivis multon da belega tempo, varmegaj momentoj, plenaj da potencaj ekscitoj animaj. Li amasiĝis al si multe da impresoj, de kiuj li volis vivi ĝis la venonta forpermeso.

Ni parolis longan tempon. Ju pli longe, des pli multe malgrandiĝis malkonfido inter ni. Mi vidis, ke mi fariĝis pli sciigema, ĝis fine malaperis lasta ombro de singardemeco kaj komencis interŝanĝo de niaj animoj. Ni eksilentis, al ni estis malĝaje, sed tamen bone. La ŝipo kun malforta bruo dissulkigis tremantan akvoplataĵon. Sub ni dum luna lumo brilis suproj de ondoj, kiel ili estus surŝutitaj de arĝento; en malproksimeco la arĝentumaj akvoj kuniĝis en larĝan strion, kiu en horizonto finis per fajrera obla linio. Ĉirkaŭe estis trankvilo interrompata nur de egaltempa fajfado de ŝraŭbo kaj bruo de maŝinoj. Paco estis en la naturo, paco estis en niaj animoj.

Mi ĝojis silente, fine trovi en tiu ĉi dezerto homon, kiu pensas. Mi ĝojis je nova animo, animo pli interesa por mi, ĉar ĝi elkreskis en sufoka atmosfero militista, kie kripliĝas sento kaj prudento venas sur eraran vojon. Mi sentis, ke tiu ĉi homo feliĉe trapasis tra la rifoj de militista vivo kaj apartenas al si mem. Mi estis scivola ekkoni tiun manieron, per kiu li prilaboris serion da demandoj, kies solvado efikis al mi turmenton.

Sub ŝipestra ponteto eksonis naŭ frapoj je sonorilo. Meznokto suprenflugis super ni kaj tiam ŝanĝiĝis gardoj kaj sekcioj. Kurz, kiu devis ankaŭ preni gardon noktan, malrapide leviĝis, ĵetis sur sin servan signon kaj paŝo post paŝo ni ambaŭ iris antaŭen.

— „Nu, nun mi devas forlasi vin. Mi iros dormi“ — mi diris. — „Certe vi ne supozas, kiel mi ĝojas, ke ni tiel interparolis. Venu iam al mi, ni babilos ree. Jes? Adiaŭ!“

— „Bonan nokton!“

Mi iris malsupren al baterio, estante klinigita mi subrampis dormantajn maristojn. Kiam mi ektuŝis ian piedon pendantan el mato, tiam eksonis profunda ekĝemo kaj la piedo entiras reen. Malantaŭe iu laŭte dormeĝis, sed alie oni aŭdis nur pro-

porcian spiradon de multaj dormantoj kaj el ekstero akvan bruon. Ĉe plafono de tiu ĉi viva katakombo balanciĝis malĝoje malhela lumo.

Pasis kelkaj tagoj, mi malofte nur vidis Kurz'on. Nur dum tagmanĝo; sed tiam ni malmulte parolis. Ni eĉ ne partoprenis en komuna interparolado. Ŝajnis, ke ni ambaŭ ne povas priparoli pri tiaj ĉiutagaj aferoj, pri kiuj oni parolas dum ŝipa tagmanĝo.

Unutage post vespermanĝo mi sidis en la salono apud piano kaj ludis ion, kio ŝajnis esti melodio de Lohengrin. Tiam alvenis al mi servisto kun sciigo de Kurz, ke mi vizitu lin. Mi malsupreniris lian kabinon. Fumante cigaredon kaj trinkante teon ni baldaŭ debatis pri Boecklin, kies kelkaj kopioj pendis en la kabino, pri moderna arto, ĝia celado, tendenco kaj rimedo. Ni alvenis ankaŭ al Tolstoj kaj lia opinio je seksa vivo.

— „Ĉasteco, severa pureco estas fundo de pli bona vivo,“ — diris Kurz. — „Nur animo pura estas kapabla tremi per sopiro je bono, nur pura animo komprenas la bonon kaj faras ĝin. La pura homo vidas ĉirkaŭ li nur homojn purajn, kaj li ne povas fari malbonon.“

„Domaĝe, ke trovis sin nur sola Tolstoj, kiu venis prediki evangelion de pureco. Cent, mil Tolstoj povus murmureti, prediki, tondri al ni ĉiuj en orelojn la religion de pureco.“


„Min Tolstoj terure ekskuis,“ — li diris mallaŭte. — „Mi travivis en mia vivo epizodon, kiu min rekte estus pereiginta, se mi ĝin estus rigardinta per okuloj de Tolstoj.“

— „Ĉu mi povus sciigi, kio ĝi estis?“

— „Ho, tute ordinara historio, kiu havas multajn similajn. Se ĝi interesas vin, mi diros al vi mian historion.“

— „Mi tre petas vin.“

(Daŭrigota.)




La reĝa seĝo proksime de Stubbenkammer sur la insulo Ruegen.

De Pastro B. Lösche.



La reĝa seĝo — kia vorto belsona, kiel multeloga! Jam en frua infaneco ĝi ofte aŭdita plenigis min da sopiro neeldirebla! Kaj multajn, tre multajn jarojn ĝi min turmentis per ardega espero, rigardi la teran paradizon. Nun mi estas vidinta vin, nepriskribebla dia mirlaboraĵo! Neniam mi forgesos la horojn korĝojigintajn, tiel riĉajn de gravaj travivaĵoj! Ĉu ne la impresoj en la viran animon faritaj eble estas pli profundaj ol la en infanan animon faritaj? Mi vidis vin, reĝa seĝo, kiel matura viro, mi preparolos vian belecon kiel viro matura.

El la bluaj kaj smeraldaj ondoj elnaĝas neĝblankaj ŝtonegoj. Amaso da diversaj konkoj kaj multkoloraj ŝtonetoj ornamas mozaike la molan sablon, sur kiu la piedoj ŝtonaj firme kaj ne-moveble staras apogante la reĝan seĝon. Jes, eĉ Germanujo havas siajn naturmirindaĵojn. Jen, ni rigardu la nordan Afroditon



La granda „Stubbenkammer“.


naskiĝinta el la mara ŝaŭmo! La diino belega de l' antikveco malaperis de longe, sed la kretaj ŝtonaltaĵoj sur tiu-ĉi insuleto, prikantitaj de plibelaj nordaj legendoj, ellevis el la profundo de l' maro la plej ĉarman trezoron, la germanan altprezan perlon, la reĝan seĝon. Pro tio la naturo tiuregiona, kiel dankema principino liberita el la ĉirkaŭprenaĵoj de la akva dio, ornamis la ĝigantojn ĉielen altceladantajn, per verdaj kronoj de l' venko. Ili elrigardas sur altega trono tra la senfina mardezerto. Ĝin venkis ilia forto, ilia forto la perlon forrabis al la akva tombo. Ili spegulas sin de supre en la supraĵo de la travideblaj ondoj, ili enrigardas la malferman koron de l' maro. Ĝoje la suno plektas orajn kaj fajrajn rubandojn inter la branĉojn folioriĉajn de la kverkoj kaj faĝoj. Kiel fiere la ŝtonegoj movas la kapojn kovritajn per la verdaj ĉapeloj de l' miljaraj arboj! Ho, tiu-ĉi arbaro! Ĝi estas sankta preĝejo! Sur muskaj tapiŝoj staras la neĉirkaŭpreneblaj trunkoj kiel kolonoj apogantaj inde, kviete, pacience la verdan monstran arkajon. La vento ludas la orgenon, sorĉanta dolĉajn himnojn per melankoliaj akordoj, la maro bruas per basa voĉo malproksime retonante la eĥon. La sonorila birdetkanto akompanas la melodiojn kormovantajn. Mi kuŝis meze da arbaro ĉe la bordo de l' mallaŭta, sekretplena nigra laĝeto. Ĝi estas la nigra okulo de la ĝiganto ŝtona. Larmoj falis tra la vangoj, dum mi envidis tiun okulon. La Hertalaĝeto! Kia mira bildo en la grandega kreaĵpentraĵejo dia, kiu estas surskribita per la bibliofrazo: „la ĉieloĵ gloriĵadas la honoron de l' Sinjoro Dio kaj la tero preparolas la verkojn de liaj manoj!“ La blua ĉielo kisas la nigran okulon je orradia buŝo. Mi faldis la manojn, ĉar mia koro deziris adori la Grandan, Unuan, Potencan, Ĉiopovan, kiu kreis la belan mondon el malgrandega polvereto; kiu aldonis al la homo, tiu-ĉi polva kreaĵo, la sencon, senton, animon; kiu estas des pli alta kaj granda, ju pli suben li mal-supreniras mezen da la vivantaro, por diri al la homa vivemeco: „vivu, amu, ĝoju, ĝis kiam mi ree disrompos vin!“

Subite min vekis knaba demando el mia piega sonĝo: „ĉu estas permesata al mi, vin sciigi pri la Hertalegendo? Tri rakontaĵoj kostas nur kvin pfenigojn!“ Kia abomeninda intermiksaĵo de l' idealismo kaj materialismo! Al tia poezio tia prozo! Legendoj, sanktaj rememoraĵoj de longe pereintaj generacioj, de longe pasintaj epokoj — vendeblaj por kelke da malpuraj kupro-

moneroj! „Ĉu vi ne malplikarigos ankoraŭ la dekduon? Foriru, fibubo, vi malsanktigis la sanktejon, la naturan preĝejon. Tie-ĉi estas nenio ol la domo de Dio! Foriru! Nia sinjoro Jesuo ankaŭ forpelis la moninterŝanĝantajn avidulojn el la templo! Silentu do, vi babilema sentaŭgulo, vi avara malgrandegulo, jen ricevu dek pfenigojn por rapidege forlasi min! Tie-ĉi neniu ol la naturo mem kaj sole estas rajtigita paroladi!“ Mi ekrigardis senprokraste post tiu okazaĵo grandan tombon, kiu estas la ripozejo de prahomoj. Ĝin ĉirkaŭstaris arbegoj ŝirmante per malhela ombro la honorindan spacon.


Sub tiu-ĉi monumento, kovrita de filikoj, dormas anoj de popolo malnova. Ili ne sonĝas pri la dandeco kaj malhardeco de niaj samtempoj kun jakoj, kolumoj, lakŝuoj kaj manumoj. Ili sonĝas pri vira forteco, vereco kaj fideleco, pri hejmo kaj agada morala.

Ilia patrujo estis ilia feliĉo. Iliaj loĝejoj estis lignaj dometoj, ilia urbo estis la mallaŭta arbaro, ilia honoro estis la kuraĝeco, la familio estis ilia plej kara posedaĵo. Neniu fremdulo eniris la bordon de l' insuleto senpunite. La kaptitaj mizeruloj devis tiri la sanktan veturilon de la pastrino de la diino Herta ĝis la sangplena oferejo ĉe la lago, en kiun la mortigitaj homoj estas suprenigitaj, por ke neniu el ili perfidu la misterion de la terura diservo sub la folia tegmento de la arboj ĝigantaj, sub la vasta, suna, blua, gaja ĉielendo! Tamen



Stubbenkammer.

la diino malaperis, ŝi devis forkuri pro la malgranda nigra kruco en la mano de simpla pala monaĥo, kiu timiĝis la arbaranojn per sia okulo pacplena, kiu frakasis per hakilo la plej sanktan kverkon uzante ĝian lignon por konstrui kapelon al Sinjoro Jesuo. Kaj ĉiuj dioj forkuris svene. Eble ili sin ĵetegis de la altaĵo ŝtona en la profundan maron, forlasante sur la tero la fulmtondron, fajron, ventegon kaj ĉiujn eblajn naturajn fortilojn. De tempo al tempo ili laŭtigas ilian koleron en la subaĵo, tiam la




Neĝblankaj ŝtonegoj.

brujaj ondoj frapas la bordon, akvon kaj sablon ĵetante kontraŭ la reĝa seĝo, kaj forrabante de ĝia altaĵo branĉojn, florojn, kretajn pecojn, per kiuj memoriloj ili ĝojigas la foririntajn diojn. Silentu do, vi dioj pereintaj, la malgranda kruco venkis la grandan mondon! Kiel granda estas la forto de l' unua vorto de kruco tiu-ĉi! Ĝi superstaras la tutan homaron kaj ĉiujn diojn. Kial devis forkuri la dioj pro la kruco? Ili ne povis doni al la teranoj la unu necesan por vivadi, la korpacon! Jesuo estas la paco. Li estas la insulo meze da maro ribeligita, la insulo meze da ĉiuj zorgoj, eraroj, malĝojoj, suferoj, malamikaĵoj, la insulo, kies bordon ĉiu eniru senpunite, ĉiu migrulo, ĉiu mizerulo; la insulo, kies altaĵo prezentas al la batalantaj animoj la kronon de l' venko, nek verdan, nek velkontan, sed eternan, la kronon

de l' vivo. Jesua paco estas la reĝa seĝo sur la mondo. — Poste mi laŭlonge de l' bordo promenante ekvidis velobarketon, en kiu kelke da infanoj volis ekiri la maron. Mirante pri tia petolema farado mi demandis fiŝkaptiston maljunan, kiu siajn retojn purigis, ĉu la danĝero mara ne estis tro granda al la infanoj? „Jes, se iu ajn sensperta ŝipisto tenas la direktilon!“ Proksime de tiu-ĉi viro boato kuŝis sur bordsablo, ĝi estis fenda. Denove alirante la fiŝkaptiston mi ekdemandis lin, kio estis la kaŭzo de la boatdifektaĵo. „La kulpo koncernas la senspertan direktiliston“ respondis la maljunulo. Okaze de tiuj mallongaj respondoj mi ekpensis, ke la vortŝparema viro estis prava. Ĉar la sorto de ĉiu ŝipo dependas plej ofte de ĝia direktilisto, eĉ la ŝipo grandega de la tuta mondo sur la oceano de la tempo. Tial ni bezonas direktiliston, kiu sidiĝis pli alte ol sur la reĝa seĝo ĉe l' marbordo. La Sinjoro regnanta tronas sur la ĉiela reĝseĝo kaj faras ĉion bonege.

Enirante la vaporŝipon por hejmen veturi forlasanta tiun-ĉi belan kaj mirplenan regionon, mi memoris la neforgeseblan alvokon de la princo Schoenaich-Carolath: „ni ekprenu la manon de l' ŝipestro de Nazareto!“ Jes, ni serĉu kaj ellevu la trezoron el la profundo de la vivadmara, por aliformi la vivdramajon en vivĝojon, kaj ni ekprenu la manon de l' ŝipestro de Nazareto elnaĝante el la ondoj kaj suprenirante al la dia reĝseĝo, kie la venkintoj estas ornamotaj per eterna krono. Tiu-ĉi mano ankoraŭ neniun forlasis. Kaj ni invitu la pacon, la reĝon de l' vere feliĉa mondo, sidiĝi sur la reĝan seĝon en nia koro! Adiaŭ, mia bela insuleto, vi perlo, vi altpreza ŝtono inter la belaĵoj de nia tera hejmo, vi sankta preĝejo mem plenigita kaj min pleniginta per la paco Jesua kaj per hejma sopiro!





La kapelo.


(De L. Uhland.)

En la valon la kapelo
Elrigardas de la mont',
Sube la paŝtisto juna
Kantas ĉe l' herbejofont'.

Kun funebra sekvantaro
Sonas plende sonoril'.
Jen, silentas la junulo
Aŭskultante en trankvil'.

Supren morto la valanojn
Vokas el la tera ĝoj'.
Ankaŭ al paŝtisto sonos
Tombohimnoj iafoj'.

Pastro Lösche, Wurzen.



Haveno kaj mara stacidomo de Barcelono.

La kongresurbo Barcelono.

Kelkaj esperantistoj en la komenco de niaj ĉiujaraj kongresoj, esprimis la ideon, ke Esperantista Kongreso devas okazi ĉiam en ne tre granda urbo, ĉar tiel — ili diris — la tuta urbo interesiĝas pri la afero kaj la esperantistaro vere dum kelkaj tagoj regas en ĝi.

Laŭ kia maniero ŝanĝiĝis la tempoj! Tiu diro klare montranta la timemecon de niaj unuaj pioniroj, jam ne plu devas ekzisti: kontraŭe, la grandaj urboj de la landoj, kiuj centralizas ĉiun movon, ĉiun ideon, ĉiun agon, devas esti elektitaj kiel esperantaj kongresurboj. Ili, kvazaŭ koro sangon sendanta, sendas ankaŭ la urban vivon en la vilaĝojn de l' lando, kiuj nepre devas turni sian atenton al la aferoj, kiuj en la centra urbo havas lokon.

Do, la elekto de Barcelono kiel nunjara Esperantujo estas vere laŭdinda.

Du ĉefaj motivoj estis por ĝia elekto atentindaj. Unue la graveco de Barcelono kiel urbo, kaj due la forteco de la esperanta movado en ĝi okazanta.

Pri la unua vidpunkto ni nur diros, ke Barcelono estas la plej grava urbo el la hispana ŝtato, kaj la plej popoloza; en ĝi troviĝas agrable kunmiksitaĵo la moderneco de

la grandaj promenejoj kaj ĉarmantaj konstruaĵoj, kiuj karakterizas la modernajn

metropolojn, kaj la pleninteresaj restaĵoj de la mezepokaj

tempoj, de tiuj tempoj, kiam Barcelono estis la ĉefurbo de la Kataluna-Aragona Kon-

60; la nombro de grupoj kaj societoj estas multnombra, kaj oni kalkulas la barcelonajn esperantistojn po milojn.



Monumento de Kolombo.

federacio, kiu, en konstanta atakado kontraŭ la tiamaj Italaj respublikoj, fariĝis dum kelka tempo mastrino de l' Mediteraneo.

Cetere, ĉiu konas kiom povanta estas la esperanta movado en nia urbo; la kursoj, kiuj en la novembro monato estis 26, altiĝis nune ĝis ĉirkaŭ



Universitato.

Ĉiu barcelona samideano dankas do decidon okazigi la 5^{an} en Barcelono; sed, ĉiu samideano barcelona, deziras ankaŭ




Barcelona katedralo.

premi kiel eble plej da manoj dum la kongresaj tagoj. Tial, alilandaj samideanoj, venu kaj vidu; nur tiel Eperanto venkos!


D-ro H. Bremon y Masgraü, komitatano de la Va.

* * *



Tibidabo.

D-ro Bremon afable sendis al ni kelkajn bildojn de Barcelono, kiujn ni prezentas al niaj ĝelegantoj kredante, ke multaj el ili havos intereson pri tio. Ĉiu kiu vizitas la grafan urbon Barcelonon, konsentas, ke ĝi estas vere raviga. Multaj antikvaj konstruaĵoj, grandaj placoj, senfinaj promenejoj ornamas la urbon. Tute imponanta estas la katedralo kaj la universitato. Tre belaj ornamoj de Barcelono estas la ĉirkaŭaĵoj, kiuj similas al tiuj de Dresdenu. Fama, famega estas la monto Tibidabo, de kies supro oni povas admiri la senkomparan panoramon, tiel vastan, ke ĝi etendiĝas de la neĝblankaj siluetoj de la pintoj Pirineaj ĝis la ombroj de la Balearaj insuloj, videblaj dum klara vetero. — Karaj ĝelegantoj ŝparu, ŝparu monon, por ke vi ĉiuj povu viziti la Barcelonan kongreson!



Esperantistaj policanoj.




Hispana policano.

Kiel antaŭ la kvara kongreso 24 Dresdenaj policanoj lernis fervore nian karan lingvon, nun ankaŭ en la urbo de la kvina, nombro de hispanaj policanoj studas Esperanton. Kelkaj el ili jam korespondas kun iliaj kolegoj en Dresdeno. Estas granda ĝojo por ni, ke ni povas prezenti al niaj gelegantoj unu el tiuj ĉi policaj samideanoj, nome sinjoron Fructuow Corral. Vivu la esperantistaj policanoj en Barcelono, kiuj volas helpi la ĝekongresontojn!



La Berlina gazetaro raportis pri Esperanto kaj policanoj la jenon:

„Kiel oni sciigas nin el la Hago, la registaroj interrilatiĝis pri enkonduko de Esperanto kiel internacia polica lingvo por la informa eksterlanda servo. En Dresdeno, Vieno, Budapesto, Stockholmo, Kopenhago, Parizo kaj Barcelono la policanoj uzas Esperanton jam oficiale.“ Bone, bone! Ni fosu nian sulkon!



Esperanto kaj florbatalado.



ere, la Esperantistoj de Nizza (Nicao) tre bone sciis kunigi utilaĵon kun agrablaĵo. Tute ne atendite kaj plene surprize la ĉiujara Florbatalado tiun fojon la 18^{an} de februaro prezentis ion tutan novan. Solene traveturis la „Promenade des Anglais“ (promenejon de la angloj) kvarĉevala veturilo, antaŭata de du rajdantaj kondukistoj. La ensidantoj, altrangaj ĝesinoroj, — ĉiuj fervoraj Esperantistoj — havis blankajn vestojn, la bruston ornamis verda stelo kaj la ĉapelon granda verda banto. La du rajdantaj kondukistoj ankaŭ estis blanke vestitaj, verda stelo sidis fronte sur la alta ĉapelo.

La veturilo bonguste kaj riĉe estis ornamita per floroj. La kvar radoj similiĝis verdajn stelojn, je la malantaŭa parto de la veturilo stariĝis stelo plektita el verdaj kaj blankaj floraĵoj, je la antaŭa parto flaĝetis standardo kun verda stelo, klare montrante al la alestantoj la celon de tiu ĉi veturilo.

La vidiĝo estis belega. La vidantaro sur la tribunoj kaj ankaŭ la piedirantoj unuvoĉe esprimis sian ĝojegon. La elvoko: „Brave, brave“ longtempe daŭradis.




Esperanto-veturilo dum la florbatalado.

La ensidantoj de la florveturilo havis kun si provizon de miloj da malgrandaj bukedoj, ĉiu el ili estis ĉirkaŭvolvita per presa folio surhavanta la „tutan Esperanton“. Senĉese la bukedoj estis ĵetataj inter la publikon kun la elvokoj: „Vivu Esperanto, vivu la verda stelo.“ La publiko ĉion tre vive respondis, ne laciĝinte bombardumi la veturilon per floroj. Preskaŭ neniu alia konkuranto atingis tian gloron. La Esperanto-veturilo estis la unua, kiu ricevis la honoran premion: tre bele pentritan standardon. Kompreneble tiun ĉi tagon kaj la sekvan-tajn oni multe parolis en la urbo pri Esperanto. La celo do bonege estis atingita. La ĉi tieaj gazetoj superis unu la alian per laŭdegoj. La fotografistoj, kiuj centfoje fotografis la veturilon dum la pasado, vetbatalis per siaj poŝtkartoj ĝin prezentantaj, ili postulis po 50 ct. kaj 1 fr.

La sekvo de tiu ĉi Esperanto-reklamo estis, ke jam la alian tagon multaj personoj sin anoncis, dezirante lerni Esperanton. Ni devas konfesi, ke la ideo tiamaniere reklami estis tute genia!

Eugène Motard.



La floroj.

De Franz Karl Ginzkey.



Hejmveturo el Hütteldorf*) dum dimanĉa vespero. Feliĉe mi akiris loketon en vagono de la urbfervojo. Sed tio okazis preskaŭ sen ia klopodo de mi, ĉar en tiu terura interpremado mi estis suprenŝovita kaj subite enpremita en vagonon. Estus povinta okazi ankaŭ io alia. Interne nun sidis spiregante la venkintoj kaj ree fariĝis „afablaj“. Mi konstatas, ke la multlaŭdita „afableco“ aperas nur tiam, kiam oni ne plu bezonas ĝin.

La delikataj, melankolie belaj sentoj, kiujn mi kolektis dum la migrado inter la ĉarmaj Hütteldorf'aj herbejoj kaj arbaroj, iom post iom paliĝis kaj fine frostremante mortis. — Kontraŭ mi sidis maljuneta, terure dika virino, kiu tenis grandan florbukedon sur la genuoj. Ĉielo! Kiel malbela estis tiu virino! Tio ankoraŭ mankis al mi, pensis mi. —

Tri voĉoj interparolis en mia brusto. „Abomene!“ diris unu el ili. „Ĉu devas ekzisti tiaj virinoj? Kiel kruela estas la naturo kontraŭ la plej sanktaj sentoj de l' viroj! — Ĉu ekzistas pli dolĉa adorado por vira koro, ol reve admirante pensi pri mirinde graciaj virinoj, niaj belegaj, karaj fratinoj sur la malhela vivvojo? — Kaj dum nia animo konstante sopiras pri rave entuziasmiganta beleco, — jen — naturo subite ŝovas antaŭ nian altaron tiel abomenan figuraĵon, kvazaŭ Dio-patro mem batus nin per fera pugno en la vizaĝon.“

„Vi hontu!“ diris dua voĉo. „Vi volas estis bona kristano kaj matura terpilgrimanto? Ĉu vi pensas, ke via iometo da mizera artisteco rajtigas vin tiel paroli? Se vi estus ekzemple kuracisto aŭ pastro, kiel vi starus antaŭ tiu ĉi virino, kiu eble bezonas vian helpon? Via humaneco staras sur malfortaj piedoj. Vi ne plu scias ami, vi suferis ŝiprompiĝon sur maro de amo al homaro!“

„Hahaha“, ridis la tria voĉo. Fratetoj, tiel enuigaj kiel hodiaŭ vi jam longe ne estis! Nur unu scias helpi en tia dilemo, kaj tio estas mi, la ĝajhumoro! Malbone vi komprenas

*) apud Vieno.

la diajn verkojn, se vi mezuras ilin per viaj ŝanĝemaj beleckomprenoj aŭ per via multlaŭdita homamo, kiu tiel ofte jam mizere pereigis. Dion komprenas nur, kiu scias forte ridadi. Pensu nur, tiu ĉi monstra amaso da „kolosa virinaĵo“ iam estis gracia, juna, ĉarma knabino, homfloro feinsimila. Ĉu tio ne estas komikega? Dum neĝa, petoliga, karnavala nokto ŝi sekrete eligis el ĝepatra domo, por bonemaskita ankoraŭ unufoje danci kun la nobela kaj bela amanto. Ankoraŭ unufoje ŝi volis ĝui feliĉon, sed meze en la ravo de l' danco ŝi prikantas kvazaŭ per viziona gajhumoro sian estontan sorton.“ Kaj la gajhumoro recitis du petolajn strofojn el valsa kanto, kiuj priskribas la estontecon de grasiginta, monstra rentulino. Tiam la gajhumoro ekprovis laŭte ridegi, sed ĝi ne sukcesis. Tro multe min malbonhumorigis la brua interparolado kaj kriado, la malagrabra grinrado de vagonara haltigilo, la malbonodora aero kaj ĉio, kio ankoraŭ ĉeestas dum tia hejmveturado. Kvazaŭ forviŝitaj estis la kvietaj, noblaj impresoj, kiujn mi eksentis dum lumanta somervespero en libera naturo, kaj jam la fantomo „grandurbo“ etendis kontraŭ mi siajn brulvarmegajn ungegojn. Plej multe kolerigis min la florbukedo en la mano de mia kontraŭsidantino. — Malklara, malame furioza kolero ekposedis min. Mi indignis pro tio, ke tiu groteska karikaturo de virino, tiu homa monstro, tenis en sia dika, ŝovitanta mano la odorantajn simbolojn de ĉio bela kaj delikata. Jam nun la malfeliĉaj floroj komencis suferi kruelan morton. Ĉiu el ili mallevis la helan, ĉarme koloran, veluran kapeton — turmentiga laceco tiris ilin malsupren. — Sed eĉ tiu suferado kaj mortado estis ankoraŭ plena je beleco kaj ĉarmo. Tiel scias morti la virinoj en Japanujo, ĉar tie beleco estas plej supera leĝo. Se ili sentas, ke la morto alproksimiĝas, ili per lastaj fortoj kunligas siajn piedetojn, por ke la agonio totano ilin ne malbelformu. Morti en beleco! Morti kiel la floroj! Ĉu ni scias kiam mortas la animo de l'floroj? Ĉu ili mortas en tiu momento, kiam ili por ĉiam estas disigitaj de hejma tero? Aŭ, ĉu ili mortas dum la varmega vojo, kiam la pugno de ilia mortiganto portas ilin hejmen? Aŭ, ĉu ili estas malvivaj nur ĝis tiam kiam ili palaj kaj velkiĝintaj estas forĵetataj de la sama mano, kiu — en trompema amo — deŝiris ilin dum antaŭa tago? Ho, florsorto! Sorto de ĉiu nedefendata belaĵo! — Tiel mi pensis, vidante la mortantajn florojn, kaj subite mi sentis, ke

mi estas ekster ĉio homa: mi sentis kvazaŭ la animo de l' mortantaj floroj estus transiĝinta en la mian, kaj ilia muta morto malvarme ekstremigis min. Ho bela, ho maldolĉa feliĉego, senti en si ĉion vivantan! Milojn da vivoj — ne nur homaj — vi vivas, sed vi mortas ankaŭ milojn da turmentigaj mortoj!

Mi frostotremis, kiam mi ekvidis la okulojn de la virino proksime antaŭ mi, kvazaŭ tra vualo. Ŝajnis al mi, ke ekbrilis en ili fajreroj de sovaĝa moko kaj besta malamego. Nun ŝi ŝajnis kompreni kiel abomena ŝi estas por mi. Kaj kiel se ankaŭ ŝi volus doni al mi signon pri sia malamo, ŝi kruele ridante, iom levis la bukedon kaj komencis deŝiri la kapetojn de la floroj, unu post alia, kaj ĵetis ilin antaŭ miajn piedojn.

Jen mi perdis la tutan konscion. Jam miaj fingroj ĉirkaŭpremis la dikan kolon kaj provis per ĉiuj fortoj sufoki la monsttron. Sed la aliaj homoj, kiuj kredeble pensis, ke mi estas frenezulo, penis detiri min de la virino, kaj subite mi ricevis surdigan ekbaton en la nukon kaj — vekigis.

Dank' al Dio! Ĉio estis nur sonĝo! Per la kapo mi estis ekfrapinta sur la dorsapogilo, kiam la vaĝonaro en Meidling tro subite estis haltigita. Do mi vekigis el tiu malbelega sonĝo. La virino ankoraŭ ĉiam sidis antaŭ mi, tenis la florojn en la mano kaj ridetis iom, rigardante en miajn dormemajn okulojn. „Vi estas laca, sinjoro, ŝi ekparolis, „jes, jes, tion kaŭzas la forta freŝa aero en la kamparo, por ni urbanoj ĝi preskaŭ estas tro forta.“ — Kaj kiam ŝi rimarkis miajn rigardojn al la floroj, ŝi iom pli mallaŭte aldonis: „Ha Dio, la kompatindaj floroj, ili preskaŭ jam mortis pro soifo. Sed kiam mi estos hejme, mi tuj metos ilin en akvon. Mia malfeliĉa, malsana knabineto, kiu neniam povas eliri, petis min tiel kore, ke mi alportu al ŝi florojn, — multe da belaj floroj mi alportu!“ — —

Jen, mi konsternite rigardis ŝin, ĉar ankoraŭ ĉiam mi vidis la fantomon de mia sonĝo. Kaj subite mi ekvidis en ĉiaj okuloj brilon, — kiu ŝajnis al mi pli sankta, pli granda ol tuta mia amo al arto kaj beleco, kiu plene malaperigis malbelecon kaj monstrecon — la brilon de patrina amo.

Kun afiably permeso de aŭtoro tradukis Ella Scheerpeltz.



Germana Florludo.



lorludoj en Germanujo? Jes, jes, kara leganto, ankaŭ tiaj ludoj ekzistas en la germana lando. La fondinto de la germanaj florldoj estas Dro Fastenrath. Li zorgis pri prezentado de florldoj en la famekonata urbo Köln. Kaj li ne restis sola. Allogita per la florldoj en Köln kaj per la hispanaj „Iochs florals“ la sperta muzikverkisto Aŭgusto Ludwig kreis „Germanan Florldon“. Tiu ĉi verko aperis ne nur en germana, sed ankaŭ en hispana lingvo. Oni ludis ĝin ofte en Germanujo, Hispanujo, Meksiklando kaj Ĉilujo. Floranta vivo montriĝas por okuloj kaj oreloj, por animo kaj



Aŭgusto Ludwig.



Lasta sceno de la „Germana Florludo“.

spirito. Kaj ne estas mirinde, ke Aŭgusto Ludwig fariĝis baldaŭ fame konata.

La florludo de Ludwig estas scena danco por 12—14 florkostumitaj inoj. Ne la muziko akompanas la dancon, sed la danco akompanas la muzikon. Estas vere arta verko. La movadojn la verkisto plifaciligis per ringoj flore envolvitaj. Unue sin prezentas florreĝidino solene paŝante. Sekvas galanto, violo, konvalo, ruĝa dianto, ruĝa konvolvulo, akva rozo, trikoloreto, liljo, rozo, miozoto, kaj cejano. Ĉiuj venas aparte, ĉiuj sin montras ĉarme, muziko kaj vortoj kaj movadoj tute respondas al iliaj nomoj, pentrindaj estas la grupoj, kiuj baldaŭ fariĝas, pentrinda antaŭ ĉio la lasta sceno, se ĉiuj estas kune kaj formas ĉarman kaj belegan fingrupon; neforgesebla aspekto!

Aŭgusto Ludwig vivas nun en Dreseno kaj estas tre ŝatata muzikverkisto. Eble ni vidos en Barcelona lian „florludon“!



Granda Vendredo.



Ho, Granda Vendredo! Funebro altega
Preneĝas la kreon; kaj larmoj doloraj
Ŝveliĝas el arboj, herbejoj multfloraj —
El ŝtono, kaj rok', kaj dezerto sablega.

La maroj, riveroj ondiĝas plendante;
Kaj nubaj vualoj kovriĝas la sunon —
La stelojn brilantajn de l' ĉielo — la lunon;
Kaj sentas vivuloj dolor' malĝajante.

Funebras la ter' — ĝi ja iam gastigis
Savinton, kaj estis de l' estro regata;
Ribelis do, kiam li estis batata,
Kaj oni lin krime al kruco najligis.

Ekscitis ĝin ĉio en sankta timego —
Subite la templa kurten' disŝiriĝis;
La rokoj, la tomboj tremante fendiĝis,
Kaj vekis mortintojn la voĉ' de l' tondrego.

Sed poste ĉi' estis trankvila sur tero —
Savinto ripozis ja en la terkoro!
Ĝi gardis lin kun funebranta fervoro — —
Kreaĵo silentas en sankta kolero.


En paska mateno do — laŭ la divorto —
Savinto kreviĝis la tombon gardantan;
Venkanta la mortopotencon regantan —
La reĝo, regant' super vivo kaj morto!

La suno de l' pask' jam penetras beleĝe
La nubojn malhelajn de l' Granda Vendredo — —
Triumfas l' espero, kaj l' amo, la kredo —
La morton Difilo ja venkis gloreĝe!

Hermany.

T. E. K. A.

T. E. K. A. Kio estas tio? demandas multaj kun miro. T. E. K. A. estas la grava Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio, kiu ĵus eldonis belan jarlibron por la jaro 1909 kun la portreto de la honora prezidanto D^{ro} L. L. Zamenhof*¹). Ni ĉiuj devas



L. L. Zamenhof

kore danki al D^{ro} Thalwitzer-Kötzschenbroda, ke li ne timis la penadon kaj riskis eldoni tian jarlibron. Tre grava estas tiu ĉi

¹) Laŭ tiu ĉi portreto (plej nova fotografajo de la artista fotografisto James Aŭrig) nun aperis poŝtkartoj: 1 p = 0,5 Sm., 10 = 0,25 Sm., 100 = 2 Sm., 500 = 8 Sm., 1000 = 12 Sm.; skribu al H. F. Adolf Thalwitzer, Kötzschenbroda-Dresden.

libreto, ĉar ĝi klare montras al nekredemuloj, ke jam multaj kuracistoj estas esperantistoj en multaj lokoj. La nomaro enhavas la nomojn de 415 kuracistoj kaj 14 studentoj de medicino, kiuj ĉiuj estas anoj de la T. E. K. A. Krom tio ni legas en ĝi antaŭparolon de nia kara majstro, kiu prave diras, ke la kuracisto havas antaŭ si ĉiam nur homon, kiu bezonas lian helpon, kaj ke li ne demandas, al kiu gento aŭ lando la kuracato apartenas, ke estas tute necese, ke medicina helpo konu neniam lingvajn barojn. Tre interesaj estas la raporto pri la ĝisnuna laboro de la T. E. K. A. kaj la sciigo pri Esperanto kaj la Ruĝa Kruco. Tre grava kaj dankinda estas la artikolo pri medicina terminologio esperantista de Dr^o Uhlmann-Huttwil.


Karaj gelegantoj, aĉetu tiun ĉi libreton, montru ĝin al ĉiu skeptikulo, por ke li vidu, kiom da kuracistoj el la tuta mondo jam estas esperantistoj. Ĝi kostas broŝ. 0,4 Sm.



Ĉebanko Esperantista.



Por ekprovadi la praktikecon kaj praktikeblon de ĉekoj esperantistaj antaŭ ol definitive decidi pri la aranĝo de banko esperantista kaj ĝia funkciado nia fervora samideano Ĉefeĉ starigis en septembro 1908 provizore regularon kaj malfermis kelkajn kontojn. Post kvinmonata ekprovada tempo, la esperantista ĉebanko kaj ĝia funkciado estas nun **definitive** pridedicita kaj praktikeble aranĝita. La nova regularo ĵus aperis. La ĉebanko celas unue la faciligon de la pagoj inter la diversnaciaj esperantistoj kaj komercistoj, kaj due, prepari la vojon por la ĝenerala akcepto kaj enkonduko de internacia monunujo. Por ke la banko utilu al la esperantistaro estas necese, ke oni povu pagi per ĉeko eĉ la plej malgrandajn sumojn, kiel ekzemple la abonon de iu gazeto, la koston de instruiloj, propagandiloj, k. t. p., kaj ke la ĉefaj librovendistoj, eldonistoj, asocioj, k. t. p. akceptu la esperantistajn ĉekojn en pago por siaj kalkuloj. La ĉebanko esperantista baldaŭ publikigos la nomaron de la konthavantoj, firmoj kaj privatuloj, kiuj akceptas esperantistajn ĉekojn. Kiu havas intereson por tiaj ĉekoj, skribu al: „Ĉebanko Esperantista, Merton Abbey, London, S. W.“



Esperanto

kiel oficiala interkomprenilo.

La ĝenerala direktoro de la Internacia ekspozicio de arto, laboro, nutrado kaj higieno en Bologna dissendas cirkuleron tre gravan esperante skribitan, kiu estas tiel grava kaj interesa por ĉiu samideano, ke ni volonte presas ĝin laŭvorte. La enhavo estas la jena:

Altestimata Samideano!

La subskribinto havas la honoron, prezenti la Programon kaj la Regularon de la unua Internacia kaj Ĝenerala Ekspozicio, kiu uzos oficiale Esperanton kiel sola lingvo por la interrilatoj kun Eksterlanduloj, kiuj intencos partopreni al ĉi tiu paca vetbatalo de Arto, Industrio kaj Laboro.

La entuziasmo, per kiu oni ĉie akceptis la simpatian kaj utilan iniciativon, la helpo jam certigita de ĉiuj Italaj Asocioj de Publika Asistenco kaj tiu de la Honora Komitato konsistanta el la plej eminentaj urbanoj, donos vivan konfidon por la sukceso de la Elmontro, kiu rezultos nepre tre grava, se la Esperantistoj multe kunkursos kun siaj produktaĵoj aŭ verkoj al tiu festo, kiu sub la insignoj de Verda Stelo kaj de Verda Kruco, havas celon samtempe praktikan en la sfero de l' komerco, kaj moralan en la teritorioj de l' bonfarado kaj de l' internaciismo. Plie mi nepre konfidas, ke ĝi bonege taŭgos, por ke Esperanto jesigu, antaŭ la skeptikuloj, la dubantoj kaj la hezitatoj, sian aĝeman ekziston eĉ sian triumfan progresadon, kaj definitive trenos kaj kuninvolos la registarojn en sian jam ne plu kontraŭstareblan fluan.

Mi povas malkaŝe garantii, ke la produktaĵoj, la ellaboraĵoj kaj la verkoj ĉiulandaj, prezentitaj sub la egido de Esperanto, estos ne nur senpartie sed eĉ simpatie taksotaj de la kompetenta Juĝantaro de ĉiu fako, kaj la Esperantistoj estos ŝatataj kiel la plej gravaj kunlaborantoj por la prospero de l' Ekspozicio. Mi atentigas la konkursantojn pri la N. 25 de la Regularo, aldona, ke la artikoloj priskribantaj la individuajn elmontrojn kaj la fabrikojn de la produktaĵoj povos esti presitaj indiferece en


esperanto, itale aŭ en ambaŭ lingvoj. Mi tute ne bezonas vin atentigi pri la 7^a Kategorio, kiu rilatas Esperanton.

Konsuloj, Delegitoj aŭ Subdelegitoj de l'Universala Esperanta Asocio, ĉiuj Oficejestroj kaj Klubestroj, fine ĉiuj apartaj kaj izolitaj sindonemuloj al la Esperantista sento kaj afero havas vastan kampon en kiu dissemi; ili devas klopodi per tutaj siaj fortoj por partoprenigi multajn kaj ĉiuspecajn Firmojn al tiu ĉi vere internacia konkurso. Fine, kara Samideano, mi vin petas, por ke vi bonvolu anoncigi nian Ekspozicion en kiel eble plej granda nombro de internaciaj kaj naciaj ĵurnaloj, sendigante numeron al la Direkcio. Sendube la elmonro de amaso de la plej malsimilaj ĵurnaloj de la tuta terglobo, kolektitaj dank' al neŭtra lingvo, formos ne lastan kaj malŝateblan kuriozaĵon kaj logaĵon de la Ekspozicio.

Kun forta konfido kaj frata internacia manpremo mi vive antaŭdankas kaj korege salutas Vin.

Bologna, 10. Decembro 1908 a.

G. Castagnone
Ĝenerala Direktoro.





Bibliografio.

„La Bela Mondo“ raportas pri novaj verkoj nur, kiam la redakcio donace ricevis du ekzemplerojn. (Adreso: Dro Schramm, Dresden-Ständehaus.)

Espero Katolika. Internacia monata gazeto. Redakcio: Paris, 10 Rue Béranger.

Kun granda ĝojo ni povas sciigi niajn gelegantojn, ke Espero Katolika denove aperos kaj reokupos en la esperantista gazetaro la honoran lokon, kiun ĝi depost kvin jaroj tiel merite okupis. Ĝi nun estas publikigata de redakcia komitato. La abonkosto por unu jaro estas: por Francujo 4 frankoj, por eksterlando 5 frankoj.

Turgenev, J. Versaĵoj en prozo. El la rusa lingvo tradukis Kabe. (Literatura kolekto de „Libroeldonejo Esperanto“. „El slavaj aŭtoroj“.)

Nova libro de D-ro Kabe! Ni ne bezonas diri, ke ĝi estas bona. Ni nur atentigas la samideanojn, ke ĝi estas tre rekomendinda por kursoj, ĉar ĝi enhavas multajn malgrandajn rakontetojn, kiujn oni volonte legos.

Kanto de triumfanta amo, de Ivan Turgenev el rusa lingvo tradukis D-ro Andreo Fiŝer. Paris, Librairie de l' Esperanto, 15 rue Montmartre. 30 paĝoj; prezo: fr. 0,60.

Nia kara samideano D-ro Fiŝer el Tiflis, kiun jam konas niaj gelegantoj, tre bone tradukis tiun ĉi noveleton de la fama verkisto Turgenev. Ni nur povas rekomendi al ĉiuj ĝesamideanoj tiun ĉi libreton.


Aladin aŭ la Mirinda Lampo, el „Mil kaj unu noktoj“, trad. Major general Georges Cox, London 133/36 High. Holborn M. C. 60 paĝoj. 28 Sd.

Jam antaŭ kelke da tempo tradukis nia samideano Cox unu el la rakontoj el „mil kaj unu nokto“, nome „Ali Baba kaj kvardek rabistoj“. Multaj ĝesamideanoj tiam tre ĝojis pri tio. Tial ni nur povas saluti la novan libron. Ĉar la traduko estas bona, ni esperu, ke baldaŭ aperu pluaj fabeloj.




Avizo.

En la antaŭa kajero de nia revuo ni bedaŭre forgesis citi la nomon de l' tradukinto de la artikolo: „Migradoj de l' fabelo. Tial ni plezure sciigas niajn gelegantojn, ke nia ŝatata samideanino fraŭlino Anna Ŝarapov, Kostroma (Ruslando) faris la tradukon.



Arnold Böcklin.



Ree vesperigás!

Ree vesperigás!
kun la vivantar'
pace ripoziĝas
kampo kaj arbar'.

De la ŝtonaltaĵo
nur la riveret'
al malproksimaĵo
fluas kun bruet'.

Nek ĝin kvietigas
vespersonril',
nek ĝin ekdormigas
la noktmeztrankvil'.

Ĝin similas koro
mia dum vivad'.
Nur el difavoro
Venas pacrestad'.

(Hoffm. v. Fallersleben.)


Pastro Lösche, Wurzen.



Aŭdas la mallaŭta sent'
dolĉan sonoraĵon.
Sonu, de l' printemp' kantet',
en malproksimaĵon.

Malproksimen ĝis la dom'
inter ĝojoj floraj,
sonu, kanto, al la roz'
kun salutoj koraj.

(H. Heine.) Pastro Lösche, Wurzen.



Impresoj de maro.

(Fino.)

— „Mi ne tedos vin per klarigo de mia edukado hejme. Ĝi estis tre zorga, almenaŭ laŭ kutimaj opinioj de burĝaraj familioj. Kompreneble kiam mi nun rigardas mian infanecon, tiam ŝajnas al mi, ke oni faris el mi ĝentilan pupon, tre agrablan por la mondo, kiu ne faris malbonon, sed ne de ĝia propra volo — ĝi mem eble faradus sufiĉe — sed nur por tio, ke ĝi havus neniam ĝian volon. Mi tute aĝadis sub influo de miaj gepatroj. Foje miaj gepatroj ekkonis, ke estus bone, se mi iros maristan akademion. Kaj nature ne venis al mi ideo, ke mi ne devus tien iri. Tiel mi venis akademion.“

— „Ĉu vi estis tiam malkontenta?“

— „Malfacile vi prezentos al vi, kion signifas, esti kvar jarojn en akademio. Oni ŝtopas en ni multon da objektoj realaj, militistaj kaj maristaj. Je ĉio ni ekflaras, nenien eniras, nenion plene komprenas kaj kia sekvo? Grandega duoneco. Jam en la akademio ĝi komencas turmenti, pli malfrue, kiam ni forlasis la akademion, ni sentas ĝin pli multe kaj en maljuneco, se ni mem dume ne enlaboras, atendas nin alkoholo kaj prostituado.“

— „Sed kiel tion ĉi oni povas kompari je disvolva memkonscio, kiun, kiel ŝajnas, mi ofte rimarkis ĉe viaj kolegoj?“

— „Vi bone rimarkis. Sed tiu ĉi forte disvolva memkonscio ne fondiĝas je efektivaj scioj, spertoj kaj nobleco de animo kaj koro, unuvorte je vera pleneco de la vivo. Ne! tute ne! Kontraŭe mi pensas, ke la instruistoj mem sentas ilian propran duonecon kaj volante forigi de ni ilian suferadon, ili turnas sin al rimedo certe malĝusta. Anstataŭ fari el ni virojn, ili ekkaptas pli oportunan edukadan metodon. Dum unua jaro ili komencas enbati en ni ideon pri superhomo. Nature tio ĉi tre bone taŭgas al la antikva opinio pri plialtiĝeco de militista profesio.“

„Entute manko de klero kaj kora nobleco. Anstataŭ unua — superhomo — anstataŭ sento por moraleco — instruado pri oficira honoro. Tion bonan, kion la junaj knaboj alportis el hejmo, tie ĉi estas sufokita. Ili ĵetis sin je flankaj vojetoj, sur kiuj ili vidas iradi iliajn majestajn modelojn. Superflua ĝuado da alkoholo kaj veneraj malsanoj estas io, per kiu ili povas fanfaroni.“

„Inter tiajn homojn mi do venis, juna, malsperta, malsaĝeta, penetrita per solidaj principoj de miaj zorgemaj gepatroj. Dio sola scias, kiel fariĝis, ke mi restis tute pura malgraŭ potenca influo de mia ĉirkaŭaĵo. Laŭ mia opinio tion efikas precipe tiu dependeco je la gepatroj kaj senfina respekto antaŭ ili. Mi vivis trankvile en soleco, admirinde bone diferencante instruadon de miaj mastroj kaj principojn de miaj gepatroj.“

„Tiel pasis kvar jaroj en la akademio kaj mi fariĝis kadeto. Certe vi ne supozas, kia fiero plenigas la bruston de nova kadeto, kiam li forprenis mallongan spadeton kaj unue aligis veran longan sabron, tutan origitan, kun la barba Poseidon kaj graciaj nimfoj sur la sabrokorbo. Kadeto sonĝas pri admiralaj steloj, ĝojas je metaloj, revas pri venkitaj bataloj, kies imago lin tiel ebriiĝas, ke li forgesas mizeron, en kiu li vivas.“

„Kiel kadeto mi restis kelkajn monatojn en staciaj ŝipoj en la centra haveno. Ĝi estis enua vivado sen laboro, sen penso, nur ŝajna farado de la servo. Miaj kamaradoj vivis rapide novan vivon pli liberan, ol tiun en la akademio. Tie kaj tie ĉi ia drinko, tiam eksceso sur strato, malgrandaj aventuroj estis preskaŭ ilia ĉefa laborado.“

Li momente silentis kaj ekmedite li ludetis kun arĝenta tabakujo, kiu kuŝis sur la tablo. Sed subite, kvazaŭ li rememorigus, li daŭrigis en sia rakontado.

— „Post duonjaro mi venis sur misian ŝipon, kiu devis veturi Londonon al festo de ia reĝina jubileo. Sur la ŝipo estis dek kadetoj. Fieraj, povi fine fari la servon sur maro, ni pelis avide al laborado. Ni postenis, staradis sur la ŝipestra ponteto, observadis proksimiĝantajn ŝipojn, lumturojn; en havenoj ni veturis en boatoj k. t. p., tamen vi konas la vivon de kadetoj. En entuziasmo ni ne sentis maloportunecon de pendantaj litoj, nia malgranda manĝoĉambro, kie ni sidis nun unu kun la alia, ŝajnis al ni esti la plej perfekta loĝejo sub la suno. Eĉ ni ne sentis terure trompataj de kuiristo per manĝaĵo. Ĝi estis unua vojaĝo, unua servo sur la maro. Ni ĉiuj atendis malpacience ian eksterordinaran komplikecon, ni ĝojis je fremdaj havenoj kaj maristaro, je Londono, ĝiaj festoj — fine Portsmouth. Kiel mi revis pri tiu grandegulo inter ĉiuj urboj. Mi tralegis multe da libroj pri Londono, trastudis dek gvidlibrojn kaj fine

mi trovis min inter la plej marista nacio. Kelkaj oficiroj difinitaj al nia akompano atendis nin."

„La kadetojn okupis tri mondkonantoj kaj trenis nin tra la senfina, griza urbo. Kvankam ni konas nur iom la anglan lingvon, ni sufiĉe bone interkompreniĝis."

Kurz por momento eksilentis kun videbla ekscito.

— „Antaŭ forveturo kunprenis nin niaj akompanantoj ien en klubon. Tie oni aranĝis por nia honoro grandegan drinkadon. Oni trinkis vinon, brandojn de ĉiuj gustoj, trinkis por nia sano, trinkis por la sano de niaj gastantoj. Per nehoma kriego ni proklamis honoron al angla maristaro kaj ili al la nia. Ni ĉirkaŭprenis unu la alian estante vestitaj duone de angla duone de nia uniformo. Ĝi estas tio, pri kio oni skribadas en ĵurnaloj kiel pri fratiĝo de du maristaroj. Ebriigitaj ni ŝanceliĝis nokte sur stratoj de la senfina urbo — kaj iris en teruran bierejon. Kontraŭ kio mi defendis min kelke da jaroj fariĝis nun. Hontigita, pereigita, per scio de mia kulpo, mi forŝanceliĝis sur straton. Ni venis al Thames; mi plej volonte ĵetiĝus en la malhelan akvon, kiu devis nin forporti."

„Ni revenis sur la ŝipon. Detruigita anime, malsanigita korpe mi vojaĝis pluen. Malaperis iluzioj de unua servo sur la maro, forkuris ĝojo de nia laborado; forfluis entuziasma gajo de niaj amuzajoj en la manĝoĉambro. Mi perdis puran animon, perdis respekton antaŭ mi mem. Post duonjaro mi revenis malsana el la vojaĝo. Mi vizitis multajn kuracistojn — kaj ĝis nun mi ne estas sana."

Li silentis. La ŝipo kelkfoje forte eklulis, la teo elŝprucis el la glasoj kaj disverŝiĝis sur la tablon. Sed Kurz tion ne rimarkis. Li sidis melankolike meditanta kaj mi ne volis interrompi lian pripenson per ia malsingardema vorto. Subite li leviĝis kaj kun vizaĝo tute ŝanĝita, kun ardantaj okuloj li diris, pli bone li kriis.:

— „Prezentu nun al vi mian situacion. Mi bone sentas ne esti sana kaj mi kunvenis kun ŝi: Ŝi estas pura, nobla, majesta kaj mi estas malklariĝita de malpura koto, kaj volus diri al ŝi, ke mi ŝin amas. Mi rigardis ŝin kiel sanktulinon, volis ĵeti min sur genuon kaj ektuŝi la randon de ŝia vesto, mi volis ĉion diri al ŝi, volis en ŝin, en ŝian animon, trovi por mi novan repurigon. Sed vermo de mia kulpo, la peko, kiu min bruliĝis kiel signo de Kaino, konvulse kunpremis miajn lipojn. Mi silentis, sed en mia interno

ĉio ribelis. Ŝi vidis, kio fariĝis en mi kaj ŝiaj nigraj dolĉaj okuloj tiel rigardis min per neelparolebla afableco. Ĉiu ŝia rigardo ŝireĝis ankoraŭ pli kruele mian koron.“

„Fine ni disiris. Ŝi restis, mi forveturis malĝoje reen. Mi iradas je posteno, inspektas kaj instruas, sed ĉiu tiu tedeco kaj senspiriteco de nia vivo, la tuta mia ĉirkaŭaĵo malrapide, sed efike mortigas en mi la lastan fajreron de humaneco“ — —

Mi eliris eksteren. Mia kapo bruliĝis, mi ne vidis tra kio mi iris kaj surpuŝis korpojn de la dormantaj maristoj. En la kabino mi ĵetis min sur mian liton kaj larmoj eniris miajn okulojn.

Ekstere zumis la akvo, frapis flankojn de la ŝipo kaj la ŝraŭbo ritme fajfetis eterne egalan melodion. Momento post momento ekbruis la direktilo, la ŝipo kliniĝis, sed post nelonge ĝi denove naĝis trankvile pluen.

S. D.



Sur Volga.

(El la novelo „Foma Gordeev“ de M. Gorkij.)



rapide kuras laŭfluen bela kaj forta „trmako,“ trenŝipo de l' komercisto Gordeev, kaj ambaŭflanke de ĝi malrapide moviĝas renkonten la bordoj de l' potenca belulino Volga: la maldekstra, tuta surverŝita de sunlumo, sterniĝas ĝis la rando de l' ĉielo, kvazaŭ luksa, verda tapiŝo, kaj la maldekstra levigis en la ĉielon mem siajn krutegaĵojn kovritajn de arbaroj kaj rigidiĝis ripozante.



Volga ĉe Saratov.

Inter ili majeste etendiĝis larĝa rivero. Senbrue, solene kaj nerapideme fluas ĝiaj akvoj en konscio de sia nevenkebla forto; la monteca bordo reflektas en ĝi kiel nigra ombro, kaj de maldekstre ĝin ornamas per oro kaj verda veluro la kadroj de sablaĵoj kaj vastaj herbejoj. Tie ĉi kaj tie, sur la altaĵoj kaj herbejoj vidiĝas vilaĝoj; la suno brileĝas sur la vitraĵojn ĉe la fenestroj de l' „izboj“ *) kaj sur flavajn pajlajn tegmentojn; la krucoj

*) Domoj de rusaj kamparanoj.

de l' preĝejoj radias meze de l' arbverdaĵo; maldiligente turniĝas en aero la grizaj flugiloj de l' mueliloj, la fumo el la kamentuboj de l' uzinoj (fabrikoj) leviĝas al la ĉielo per densaj, nigraj volvaĵoj.

Aroj da infanoj en bluj, ruĝaj kaj blankaj ĉemizoj, starante sur la bordo, akompanas per laŭtaj krioj la vaporŝipon rompintan la trankvilecon de l' rivero kaj el sub ĝiaj radoj al la piedoj de l' infanoj kuras ĝajaj ondoj kaj plaŭdas sur la bordon. Jen amaso da infanoj sidigis en boaton, kaj ili rapideme remas al la mezo de l' rivero, por balanciĝi sur la ondoj kvazaŭ en lulilo. El la akvo rigardas la suproj de l' arboj; iafoje aretoj da arboj estas dronantaj pro superakvigado kaj staras meze de l' akvo, kiel insuletoj. De l' bordo



Volga ĉe Kostroma.

alvenas ĝemego: aŭdiĝas malĝaja kanto: „O—e . . . o—o—o eŝĉo—o razok!“ (O—e . . . o—o—o anko—o—raŭ foj—on! *)

*) Ne tiom multe, kiom antaŭ la vaporŝipoj, tamen ĝis nun ankoraŭ sur rusaj riveroj oni uzas kontraŭfluan tiradon de komercaj ŝipoj per trenŝnuro, kies unu fino estas fiksata al la ŝipmasto kaj la alia trenata de homoj aŭ de ĉevaloj. Je tiaj okazoj la homoj helpas al si per kanto, esprimanta intencan streĉiĝan korppenadon: „o—e . . . ankoraŭ fojon ni tiros.“



Ĉambrego de l'unua klaso sur la vaporŝipo. Imperiestro Aleksandro IIa de l' S-to „Kaŭkazo kaj Merkurij“ sur Volga.

La vaporŝipo preterkuras la flosojn, subakvigante ilin per ondaro. La traboj moviĝadas pro la frapoj de l' surkurintaj ondoj, la flosistoj en marbluaj ĉemizoj malfirme staras sur siaj piedoj, rigardas al la vaporŝipo, ridas kaj ion krias.

Vastokorpa belulino „bjelana“ *) iom malrekte sekvas la riveron; la flava tabularo, per kiu ĝi estas ŝarĝita, brilas, kvazaŭ oro, kaj malbrile reflektas en malklara printempa akvo. La pasaĝera vaporŝipo iras renkonten kaj fajfadas — laŭta resonado de fajfo kaŝiĝas en la arbaro en la fendegoj de l' monteca bordo kaj mortas tie. Meze de l' rivero interbatalas la ondoj de ambaŭ ŝipoj kaj batas iliajn bordojn, kaj la ŝipoj balanciĝadas sur la akvo. Sur la deklivo de l' monteca bordo etendiĝas verdaj tapiŝoj de aŭtunaj semitaĵoj, brunaj senkulturaj kampoj kaj nigraj — plugitaj por printempa semado. La birdoj kiel punktetoj flugadas en ĉiuj direktoj super la kampoj, kaj malkonfuze vidiĝas sur blua kurteno de l' ĉielo la brutaro sin paŝtas apud la bordo, — ĝi ŝajnas kvazaŭ ludilo de malproksime; la figureto de paŝtisto staras, sin apogante sur bastonon, kaj rigardas al la rivero.

Ĉie — brilo de akvo, ĉie — vasteco kaj libereco, gaje verda estas la herbejoj kaj afable — klara blua ĉielo; en trankvila

*) La plej granda el rusaj riveraj ŝipoj.

movado de l' akvo sentiĝas detenita forto; en la ĉielo super ĝi radias la malavara suno de majo, la aero estis tutplena de dolĉa odoro de koniferoj kaj de freŝa foliaro. Kaj la bordoj ĉiam iras renkonten, karesante la okulojn kaj la animojn per sia beleco, kaj ĉiam novaj bildoj aperas sur ili.

F-ino A. Ŝaraŝov, Kostroma.



Se mi estus imperiestro.

Frato iris kun sia fratino en la arbaron, por serĉi berojn por la malsana patrino. Sur la vojo ili babildis unu kun la alia. La knabo diris: „Se mi estus la reĝo aŭ eĉ la imperiestro, mi estus tre feliĉa! Mi nur portus multekostajn vestojn. Ĉiam mi manĝus panon kun butero, kaj ĉiam mi trinkus la plej bonan vinon. Multaj el miaj amikoj fariĝus miaj servistoj kaj devus servi min! Dimanĉe ni elveturas en la plej bela vaĝono!“

Post longa silento la fratino diris: „Se mi estus principino, mi alvokus la kuraciston al nia patrino, por ke li ŝin kuracu. Plue mi donacus multe da mono al nia malriĉa najbarino, por ke ŝi baldaŭ fariĝu kontenta. Poste ni loĝus kune en dometo, kaj tie ni pasigus nian vivon.“




Vizito al L. N. Tolstoj

4^a aprilo 1908.



La jaro 1891^a en multaj gubernioj de Rusujo estis tre malfavora por la grenrikolto, kaj la loĝantaro suferadis pro malsato. La sekvanta jaro estis iom pli fruktodona, tiel ke en Rjazana gubernio du jarojn sinsekve la loĝantaro bezonis helpon.

Aŭtune de l'jaro 1891^a L. N. Tolstoj veturis en Dankovan distrikton de ĉi tiu gubernio kaj komencis aranĝi komunajn man-



L. N. Tolstoj.

ĝejoj en la vilaĝoj, kie regnis la malsato. Lia edzino presigis alvokon pri la helpo; li mem skribis vicon da artikoloj pri la graveco de la racia helpado al la malsatantoj. En diversaj lokoj de Eŭropo kaj Ameriko fondiĝis la komitatoj por helpo al la malsatantaj rusoj: krom mono el Ameriko oni ricevis ankaŭ grenon. El diversaj partoj de Rusujo multaj personoj estis alveturantaj, por partopreni je l' helpado al la malsatantoj, meze de kiuj troviĝis ankaŭ tifuloj.

Miaj fratino kaj frato laboradis tiucele en la Dankova distrikto, kaj mi estis devigita alveturi tien el Svisujo por la julio de l' jaro 1892^a. En ĉi tiu jaro oni havis jam bonan rikolton, kaj la helpintoj pretiĝis forveturi. Tiumonate foje okazis, ke mi pasigis la nokton en la bieno de Rajevski, ĉe bordo de Dono. Tie tiutempe gastadis L. N. Tolstoj, kaj mi aŭdis lin dum konversacio.

Mi ne estis sufiĉe atentema pro la zorgoj pri grava malsano de mia frato. Tamen en mian animon profunde enfalis jenaj vortoj de Tolstoj: „Ĝi tute ne similas al volapjuko; la lingvo Esperanto efektive promesas la eblon de vera vivplena reciproka komunikiĝado inter diversaj gentoj de l' terglobo.“


Pri tiuj vortoj mi rememoris nur, kiam Ĝeneva kongreso montris al mi, kio estas Esperanto. Mi rapidis aliĝi al Ĝeneva grupo kaj fine de l' vintro mi legis en unu el ĝiaj kunvenoj mian tradukprovon de l' unua ĉapitro el la romano „Reviviĝo“ de L. N. Tolstoj.

En la jaro 1907^a la sorto alvenigis min Rusujon. Traveturante ĝin, mi vizitis la maljunan filozofon kaj konvinkigis, ke al li ne estis eble sciigi pri la disvastiĝado de Esperanto en la mondo, sed ke li ĝojas pri ĝiaj sukcesoj kaj tre bone povas ĝin kompreni, dank' al sia granda kono de l' verkoj kaj homoj diverslingvaj. Li mem tralegis laŭtvoĉe en esperanto parton de l' 5^a ĉap. el la Evangelio laŭ Mateo, tradukita de Leipcigaj esperantistoj.

Pasiginte la vintron en Kostroma arbaro, mi ricevis tie leteron el Peterburgo kun propono de l' societo „Espero“, por ke mi demandu L. N. Tolstoj'on kiujn el liaj verkoj li deziras vidi esperantigotaj por lia jubileo. En marto mi veturis rusajn ĉefurbojn, por konatiĝi kun la tiea aĝado esperantista, kaj la 22^{an} de marto mi pasigis en Jasnaja Polana. Mi deziris ĉeesti la 16^{jaran} jubileon

de l' societo „Espero“ en Peterburgo, — tial spite la malbonaj sciigoj pri la farto de L. N. Tolstoj mi tamen veturis al lia tula bieno.

En lia domo mi komunikis pri la motivo de mia vizito al la edzino de l' filozofo. Ŝi promesis al mi, ke mi povos paroli kun li, kaj mi atendis, malfermite la „Unuan Legolibron“ de Kabe ĉe la paĝoj, kie troviĝas la traduko de l' fragmento el la verko de L. N. Tolstoj „Pensoj de l'saĝuloj, nome, pri la perfekta ĝojo de Francisko el Assizo.“ (p. 62). Eniris la filozofo per malfortaj paŝoj, kun bluiĝintaj lipoj, sidigis sin en seĝegon apud mi, prenis la libron kaj volis legi li mem. Sed tiuokaze al mi ŝajnis pli bone, se mi mem laŭtvoĉe kaj malrapide tralegos tiun ĉi



Tolstoj rajdanta en la bieno de Tula.

citaton, kies sencon bone klarigas la realeco de l' vivo. Mi deziris, ke li sciu, kiel la esperantistoj povas lin traduki. Post lia manĝo mi sciigis al li la komision de l' societo „Espero“. Li diris, ke al li estus plej agrable, se oni tradukus la „Kristanan Instruadon“ kaj la „Instruadon de Jesuo por la infanoj,“ kiun oni estis tiam pretiganta por presado.

Plie, li esprimis la deziron, ke la esperantistoj traduku el Kant.

Multe interparoli aŭ profiti de lia parolado mi ne povis, ĉar tiutage oni tre timis pri lia farto. Mi ĝojis, ke dum mi estis atendanta la forveturon tiuvespere, — lia farto ĉiam pli rebo-



Leo Tolstoj iranta al sia bieno.

niĝis kaj je l'adiaŭo li estis jam multe pli vigla. Mi havis kun mi unu numeron de l' „Japana Esperantisto.“ Atendante mi skribis rusan tradukon de l' artikolo el tiu ĵurnalo pri la signifo de Esperanto por la Japana nacio kaj lingvo kaj donis ĝin al L. N. Tolstoj.

La saman tagon mi aŭdis ne nur la filozofon, sed ankoraŭ lian paroladon koncerne lia rilato al la solenado de lia 80 jubileo, projektita de l' rusa societo: ĝin aŭdigis la fonografo de Edison, kiun ĝia elpensinto mem estis sendinta, kiel donaco al L. Tolstoj.

Ĝi estis la lasta memorinda tago, kiam mi povis persone vidi kaj aŭdi nian filozofon. Mi ne scias, ĉu mi estas ankoraŭ vidonta lin, sed mia animo neniam lin forĝesas.

F-ino Anna Ŝaraŝov, Kostroma (Ruslando).



La tero same kiel la aero kaj suno apartenas al ĉiuj kaj ne devas esti privata propraĵo. Por ke la tero fariĝu havaĵo de ĉiuj, estas necese, ke la homoj konfesu la pekecon de l' terpropraĵo.

Leo Tolstoj.



Vivante meze de l' homoj ne forgesu tion, kion vi eksciis en soleco. Kaj en soleco pripensu tion, kion vi eksciis dum viaj rilatoj.

Leo Tolstoj.



Mi iris min bani. Mirinda aŭtuna mateno — kviete, varme, — verdaĵoj, odoro de foliaro. Kaj la homoj, anstataŭ ĉi tiu admirinda naturo kun kampoj, arbaroj, akvo, birdoj, pestoj, aranĝas por si en la urboj alian artefaritan naturon kun kamentuboj, palacoj, lokomobiloj, fonografoj.

Leo Tolstoj.



Leo Tolstoj.

Rugevit'*)

El grafo A. K. Tolstoj.

Mez' la antikvaj kverkoj altiĝante
Insulon nian ĉiam gardis li;
Fidele ni honoris lin konstante,
Sepkapa staris ĉirkaŭrigardante
La Rugevit' — la nevenkebla di'.



Leviĝis fum' de liaj sanktaltaroj,
Memoris ni pri lia dimerit';
Li ofte vidis sur rompitaĵoj
Da mortigitaj malamikoj arojn,
Minaca di' — la glora Rugevit'.



Se furiozis maro, la profunda,
Sub glavon do rapidis ĉiu ŝip';
La siajn gardis li de l' mort' kaj vundoj;
Kaj konfidema aro da hirundoj,
En liaj barboj nestis ĉirkau lip'.



Kaj pensis ni: „vort' pastra estas vera:
Se malamik' ofendos lin sen pi',
Ekvivis li, kaj kun rigard' fajrera
Sep glavojn tuj surlevos en kolero —
La Rugevit' — la ofendita di'.



*) Rugevit' estis idolo de la loĝintoj sur la insulo Rügen, de la slavoj-
vendoj. En la jaro 1168 Rügen estis venkita de la dana reĝo Valdemar Ia, kiu
enkondukis tie la kristan religion. Li estis pranepo de l' rusa princo Vladimir
Monomak.

Ni tiel pensis, sed fatal' deziris
 Nin submetegi al alia sort':
 Memoras ni: matena vento spiris,
 Kaj kontraŭ Rigen malamik' veliris
 Kun granda ar' kaj potencega fort'.



Pranep' de l' rusa iris Monomako:
 Armeon estris princo Valdemar';
 Minacis al ni la sentima brako
 De Valdemar', pranep' de Monomako,
 Norvega princ' kaj reĝ' de l' Danaar'.



Kaj Valdemar' terura post batalo
 Jarmiron princon venkis en milit',
 Memoras ni: kiele laŭ signalo
 Sub la sonor' de malamika ŝtalo
 Falegis teren nia Rugevit'.



Kaj dekkvar bovoj de l' plugilo venis,
 La grandan pezon de la kverka di'
 Sub skurĝa fajf' sur kamp' apenaŭ trenis,
 Klininte kornojn vaporante penis,
 Dum sonis de la Danoj laŭta kri'.



Kun kruco en la mano, — mez' pastraro, —
 Glav' enpikite, supreniris ĝin
 Sven, episkop'; kiele sur la ĉaro
 Ĉefkomandant', — sur dio, al la maro,
 Ordonis li, ke oni trenu lin.



Kaj al la bordo kuris ni kun ploro,
 Gemaljunuloj, vir', virin', infan',
 Ĝemeĝis ĉiuj. Kun malĝoj' en koroj,
 „Leviĝu di'!“ ni kriis kun doloro:
 „Frakasu Danojn via sankta man'!“



Sed ne leviĝis li. Je rok' ĝiganta
 Ŝaŭmante, kie bruas la alflu', —
 De la krutaj' ĵetitan, falegantan
 Ekkaptis ondoj lin; kaj turnegante
 Fortrenis ili lin kun plaŭda bru'.




Tiele naĝis for de nia lando
 Kaj venĝi sin ne povis tute li.
 Ekregis nin mireĝo kaj demando:
 „Do kie la diec', potenco ĝranda,
 „Ĉu Rugevit' ne estis vera di'?“



Post kiam pasis for la timekscito,
 Forflugis am' je li el nia rond';
 Disiris ni dirante en medito:
 „Nin ne savinta, naĝu, Rugevito,
 „La kverka di'; vin portu blua ond'.

El la ruso lingvo tradukis Romano Frenkel, Enisejsk.



La varmega tago.

Tago estis varmega tiel, ke la sufokeco en la aŭditorio ŝajnis esti preskaŭ neeltenebla. Tial la studentaro decidis, demeti la jakojn kaj kolumojn. Enirinte la profesoro instruis la aron de l' lernantoj ĝis la fino de l' leciono kutimamaniere, kvazaŭ ilia senorda tualetto estus senvalora al li. Sed kiam la sonorilo de l' vestiblo eksigis la instruadon, la maljuna sinjoro sekretkonsilanto, kiel eble plej afable, alparolis la junularon: „Tre estimindaj sinjoroj, vi estas senigintaj vin de diversaj vestaĵoj, kaŭze de la sufoka varmo de tiu-ĉi somertago. Mi estus farinta certe la samon tre volonte, se ne mia grandega altestimo je vi, plej honorindaj sinjoroj, estus malpermesinta al mi tionfari. Adiaŭ!“

Pastro Lösche, Wurzen.



Popolkanto.

(H. Heine, muzikigita de Fr. Abt.)

Mi vidas vin en ĉiu floro
kreita laŭ printempa ord',
mi aŭdas vin en ĉiu sono
mallaŭte de la harpa kord'.

La steloj skribas vian nomon,
min via bild' sur ĉiu voj'
ĉeestas kiel kamerado
kaj kiel sola koroĝoj'.

La tutan mondon mi forgesis,
feliĉo mia estas vi;
min kuŝigante, liten, fermas
vin en animon preĝan mi.

Vi estas ora sun' de l' koro,
la sonĝo dum la malhelaĵ';
por vi mi tuj adoras Dion
je la unua fruruĝaĵ'.

Pastro Lösche, Wurzen.



Friedriĥroda antaŭ 20 jaroj kaj nun.

Mia karulino!




Vi deziras aŭdi mian juĝon pri la aerkuracloko „Friedrichroda in Thüringen“, kie antaŭ nelonge estis fondata Esperantista grupo.

La ĉarma loko apartenas al la duka lando Sachsen-Coburg-Gotha, kaj antaŭ pentekosto la tria germana Esperanto-Kongreso okazos en Gotha, la ĉefurbo de la lando. Eble ankaŭ Friedriĥroda estos vizitata. Vi deziras scii, ĉu ĝi estas rekomendinda por pli longa restado. Mi do rakontos al vi mian 20-jaran sperton, en formo de malgranda artikolo, eble taŭga por la „Bela Mondo“. La titolo estos Friedriĥroda antaŭ 20 jaroj kaj nun.

Tre vivan memoron mi konservas de la unua impreso de l' ĉarma urbeto. Fervoje ni alvenis en bela junia vespero al Reinhardsbrunn, balzama abiodoro nin alblovetis, la radioj de la vespera suno origis la hotelon „Waldhaus“ (arbardomo) kaj ĝian belan parkon.

Baldaŭ ni enveturis Friedriĥrodon, preterpasinte la Vilhelmo-placon tiam ankoraŭ uzata kiel blankigejo ĝis la hotelo Wagner apud la foirejo, al ni rekomendita.

Mi estis ravata, ĝuante de nia balkono en la dua etaĝo la plenan perspektivon super la urbon kaj la montojn. Maldekstre apud la „Gottlob“ tiam troviĝis nur 4 vilaoj, ni tuj decidis tie lupreni loĝejon, kvankam plej belaj vilaoj alloge nin salutis de la „duka vojo“. Efektive ni trovis agrablan loĝejon kaj afablajn gegastigantojn en vilao tute proksime de la arbaro.




Foiro.



Friedrichroda.

Baldaŭ ni konis la belegajn arbarpromenejojn. Tre malofte tia riĉeco kaj malegaleco estas trovebla en somerfreŝejo! Tri semajnojn oni povas pasigi en Friedriĥroda, ĉiutage entreprenante alian belan 3—4-horan ekskurson. Neforgeseblaj estas al mi la belaj veturadoj de tiu ĉi unua somero! Ankaŭ multaj malgrandaj promenadoj, kies celo estas bona kafostacio, sin trovas ĉe Friedriĥroda; pri tio ĉiu prospekto donas sufiĉan informon.



Ĝardenego ĉe Friedriĥroda.

Sed mi deziras citi la plibonigadojn efektivigatajn per la magistrato kaj la banadministracio. Largaj stratoj, elektra lumado, bona trinkakvo k. t. p. estas troveblaj. Malgraŭ ĉiuj novaĵoj, kaj tio estas rimarkinda, la karaktero de la banloko ne multe ŝanĝis, ankoraŭ hodiaŭ senĝena kaj simpla vivtenado tie regas.

Sed unu afero multege pliboniĝis, nome la muzikaj prezentadoj.

En iama tempo muzikkomprenantuloj preferis eviti la aŭdodon de la koncertoj ĉirkaŭirante la muzikejon en vasta rondo,

kaj nun la muzikludado fariĝas komuna allogaĵo. Ĉiusemajne sinfoniaj koncertoj en la halo de la „Kurhaus“ (societa domo) kun malgranda enirpago ankaŭ estas multnombre vizitataj.

Tre malofte mi trovis eĉ en plej grandaj banlokorkestroj similan bonegan kaj egalvaloran ludadon. De la jaro 1903 la estro de la muzika vivo estas plene edukita en muzika artisto, ĉiujare li alportas novan incitaĵon el Leipzig, de sia vintra



Kuracdomo.

agado ĉe la filharmonia orkestro, riĉa kaj ŝanĝplena ĉiam estas la muzika programo. Estas dezirinde, ke la juna fervora kapel-estro Paul Pirrmann el Leipzig longtempe estros la muzikan vivon de Friedrihroda, ĉar bona muziko estas vera aligilo, ĝi ja ankaŭ havas sanigan karakteron, ĝi kvietigas kaj feliĉigas la animon. Rimarkinde estas, ke la Esperantistoj, kiuj tre ŝatas la muzikon, trovos multe da kontentigo en Friedrihroda. Pri


loĝejoj la loĝa komitato donos plej bonan sciigon. D-ro Wanke, Gartenstr. 14, direktoro de nervokuracejo volonte korespondos esperante.

La kuracejon Wanke, la pension Willweber kaj la hotelon „Herzog Alfred“ mi povas rekomendi per propra sperto.

Ĉiu gasto povas aranĝi sian vivon en Friedriĥroda laŭ gusto, ĉiam la restado estos agrabla. La loko ankaŭ estas tre taŭga por postkuracado de Kissingen kaj Homburg, ĝi freŝigos kaj fortigos la vizitantojn.

Tial grandurbanoj ne povas elekti pli taŭgan lokon kiel Friedriĥroda por sia ripozo, ankaŭ Esperantistoj tie tre bonfartos, ĉar ili trovos samideanojn!

Amikino.



Böcklin.

De Ola Hansson.

I.




ra la pina arbaro juna virino rajdas sur unukornulo, tiu ĉi stranga besto fabela. Estas vaporplena tagmeza horo dum somera sezono; kvankam tie interne regas malvarmeto kaj verda malhelo malgraŭ ĉio, sed inter la trunkoj penetras la tago tiel blueta, ke ĝi ŝajnas esti preskaŭ blanka. La besto malrapide paŝas antaŭen sur la vojeto simila al aleo, tuj ĉe la rando de l' arbaro; la kapon ĝi tenas supren levitan, kaj la grandaj helaj okuloj serĉas atente preskaŭ senmove, rekte antaŭ si; ŝajnas, kvazaŭ tiu ĉi stranga besto irus en duonsongō aŭ subaŭskultus kaj aŭdus ion, kion ni ne aŭdas. Kaj tio sama okazas kun la juna virino. Ŝi estas forte konstruita, miriĝe forte, kaj havas vizaĝon preskaŭ larĝan kaj malmolan; sed la okuloj rigardas senmove antaŭ si, tute kiel la okuloj de l' besto, duone malfermitaj pro teruriga streĉiĝo, duone dronigitaj en la demanda enpensiĝo. Forta, preskaŭ potenca supra parto de l' korpo portas sur si la dense alpremiĝintan veston el ĝazo, tiel malpezan kaj travideblan, ke ĝi povus egale esti nur ombro de verda lumo sur la blanka haŭto; tio estas la dudekjara virgulinino, kiu ĵus estas vekigonta por la vivo de l' virino kaj en ia tago somera, en ia horo tagmeza sonĝas siajn virgulinajn revojn. Ĉio estas silenta, mallaŭta, tre mallaŭta: oni aŭdas nur la malpezan paŝadon de l' stranga besto, kiu somnambule portas sian junan sinjorinon inter la malvarmetaj, malhelverdaĵoj mondoj de ŝiaj revoj belegaj, kiam dume la bluetiganta, hela tago somera de l' vivo silente staras ekstere kaj ŝin atendas. Kaj en ĉio estas trankvilo: en la paŝado de l' fabela besto, en la sintenado de la revemulino, trankvilo en la songo kaj en la tago mem — aŭ eble ĝi estas plejgrandaparte en tiu ĉi briliganta, helega bluaĵo de la ĉielo ĉiutaga, kiu ĉirkaŭas la verdan ludadon de revaj mallumoj.

Multaj jaroj trapasis, kaj en malfrua vespero staras virino sur marbordo ĉe la piedoj de vilao. Post la ventego fariĝis silento vespera. Aroj da nuboj per longaj zonoj trairas ankoraŭ la ĉielon, sed la maro jam trankviliĝis. La krepusko falas en la aero; la ŝtupoj kondukantaj al la vilao kaj la marmoraj kolon-

aroj brilas per duobligita blankeco. La virino staras sola, kaj estas tiel malgranda, ke ŝi ŝajnas perdiĝi en la fono; ĉar ankaŭ samtempe ŝajnas, kvazaŭ ŝi estus personiĝo de tiu ĉi fono. Kaj ŝi havas sur si vestojn nigrajn kaj blankajn; ŝi portas netravid-eblan nigran veston, kiu falde kaj malpeze falas laŭlonge de l' fleksebla, belkreska, delikata talio teren, kaj vizaĝo ŝia blanka kun duobligita blankeco aspektas kiel brilado el inter punta tuko, kiu ĉirkaŭas ŝian kapon. Ŝi staras tute sola, apogita kontraŭ la roka muro, kiam krepusko kaj silento ekraĝas ŝin mem. La silento de nokto kaj la trankvilo post ventegoj, kiuj egale longe super ŝi traflugadis, kiel super la cipresoj kontrastantaj per longa silueto de la griza spaco tie supre, ĉirkaŭ la vilao. Egale longe? — — — Jes, egale longe; ĉar kiel ŝi unue, tiel same miloj da virinoj staris kaj ankaŭ tiom da ili estos starantaj, solaj kaj enpenŝiĝintaj, kun pala vizaĝo kaj en nigraj vestoj, je certa horo vespera de sia vivo sur la marbordo ĉe la piedoj de la vilaoj, kiam ĉirkaŭ ili kaj en ili la krepusko ĉiam pli profunde enfalos, kaj la vento al la nokta kuŝiĝos ripozo, al la ripozo en la naturo kaj al ripozo en la animo post longaj fulmotondroj, kiuj super ili, trakuris, super la unu kaj super la alia kaj super ili ĉiuj, dum centoj da jaroj, kiuj jam trapasis kaj kiuj ankoraŭ venos tute tiel same kaj ŝi staras antaŭ ni, tiu ĉi virino en nigra vesto ĵetika kvazaŭ turniĝe ĉirkaŭ ŝia talio kaj disblovita sur la tero, tiu ĉi unu virino kun kapo mallevita, super kiu la ventego verŝajne egale longe trakuradis kiel super la nigraj cipresoj tie supre, super tiuj ĉi ventbatitaj cipresoj, kiuj nun teren kliniĝas.

Kaj ree multaj jaroj pasis, kaj la homo tiel malproksimen jam trairis dum sia mallonga marveturado tra la vivo, ke lia boato jam, jam estas alvenonta en la nepenetreblajn krepuskojn de „La insulo de l' mortintoj“. Meze de la maro, kiu probable de jarcentoj kuŝis tie ĉiam en tia sama trankvilo, etendiĝas deklivaj, sovaĝaj muroj rokaj, plenaj je fendoj, similaj al kavoj tombaj kaj plenaj je ŝirmoj, kvazaŭ akvofaloj, kiuj de jarcentoj per unutona sia bruo plifortigas ankoraŭ pli multe la regantan tie ĉi silenton. Ekster tio ĉi la spaco pleniĝita estas per la pezaj nuboj, de unu flanko trapenetros eble ia zoneto luma, sed tion oni ne diferencigos en tiu ĉi ĥaoso nepriskribebla. Sed la interno de l' insulo; kien ajn la okulo atingos, estas la nepenetrebila, plena mallumo. El tiu ĉi mistera fundo elkreskas longaj, mal-



„Insulo de l' Mortintoj“, laŭ kiu pentris Boecklin la famekonatan pentraĵon.

dikaj cipresoj; kaj al la tuta nigraĵo, al la ambaŭ blankaj, brilantaj kolonoj, kiuj ŝirmas la eniron, naĝas malrapide kaj senmurmure boato; en ĝi staras homo envolvita de la piedoj ĝis la kapo en la larĝan blankan tolon, kun la kapo mallevita, staras rekte kaj turniĝinta estas al tiu ĉi nigraĵo, kiu lin baldaŭ ensorbos, kaj la signo post li malaperos, kvazaŭ li neniam estus ekzistinta, sed tiu ĉi morto estos tiel trankvila kiel trankvila estas la maro, kiel trankvila estas la naĝado de l' boato, kiel trankvilaj estas la senmovaj cipresoj, dronantaj en tiu ĉi sama trankvileco serena, kiu ripozas super la tuta pejzaĝo de „La insulo de l' mortintoj.“

Kaj tia estas la historio de homaj sezonoj, tio estas de nia vivo. Tute ĉe fronto, sur la ambaŭ bordoj de l' rivereto, kiu silente fluas tra la herbejo, kovrita per herboj kaj floroj inter heliĝanta verdaĵo kaj brilaj koloroj de varmega somera tagmezo, sidas du infanoj tute nudaj, ludas ĵetante florojn en la rivereton kaj alrigardas, kiel ilin la akvo forportas. La fonon de l' pentraĵo okupas la portalo de la putro, el kiu la akvo elfluas per la sinksa kapo kaj falas en la rivereton, — ĝi staras en la mezo, ĉar tio estas la de l' vivo neniam sekiĝanta putro. Ĉe la dekstra flanko

sur la unua plano staras juna virino ĉirkaŭvolvita per la malhelblua velono, blua kiel la ĉielo priŝutita per steloj kaj kiel la espero; ŝi turnis sin duondorse al juna kavaliro en la kasko kaj en la brile-ruĝa kapoto, kun la suprenlevita lanco, kiu brave sidas sur la ĉevalo, kaj en la dua mano ŝi tenas la floron. Kio estas post la portalo, tion vi ne divenos, oni vidas nur la pejzaĝon kaj horizonton, sed oni sentas, ke tio estas la pejzaĝo kaj horizontoj de l' vivo kaj ke de ili revenis tiu maljunulo, kiu en silenta kaj profunda enpensigo sidas tie alte sur la portalo de la puto, kiam dume post li vidiĝas profile sur la fono de l' ĉielo somera la groteske-fantazia figuro, havanta rektan liniojn anstataŭ korpo kaj la kvar aliajn ortangule kurbitajn liniojn anstataŭ la manoj kaj piedoj kaj svingas super li la grandegan falĉilon. Sur ĉiuj ĉi figuroj kuŝas tamen la plej profunda trankvilo; sur la infanoj, kiuj en senkonscia senzorgo ĵetas en la silentan kaj travideblan rivereton la hele-brilantajn florojn; sur la juna knabino, kiu staras kaj atendas, atendas, mem nesciante kion, sed atendas la vivon; sur la juna homo, kiu sidas rekte kaj senmove, kiel rekte kaj senmove staras lia ĉevalo, kaj ŝajnas, kvazaŭ li la aŭdon streĉus al la mondo depost la portalo, al la vivo, al kiu li nun ekvojaĝos; sur tiu ĉi maljunulo, kiu ĵus de tie revenis, kaj nenion alportis el tiu tuta vastaĵo krom la silenta, profunda enpensigo, kiu en la brilaj koloroj respegulas ĉiujn bildojn: la bildon de la infano, kiu senzorge ĵetadis la florojn en la rivereton, la bildon de l' juna knabino, kiu staris kaj atendis ion, kion ŝi imagi al si ne povis kaj kio estis la vivo en formo de juna kavaliro vestita en ruĝa kapoto; sed li ŝin ne rimarkis kaj konstante nur turnadis la okulojn al la mondo depost la portalo kaj forvojaĝis por unue kiel maljunulo reveni kaj sidiĝi en la soleco kaj cerbumi sencele, kiel maljunulo, kiu eĉ nun ne scias, kiu post li staras kaj la falĉilon super lia kapo svingas, tiel same kiel li eĉ ne antaŭsentis, ke, kion li dum la tuta sia longa vivo serĉis vane, tio unufoje staris proksime de li ĉe la pordo kaj lin atendis. Kaj super ĉio ĉi etendiĝas la ĉielo tiel profunda, tiel varma, tiel blua, kia povas esti nur somere je la tria horo posttagmeze, kiam ĉio haltas kaj la spiron en la brusto haltigas, la ĉielo striita per tiu ĉi lanaj, blankaj nubetoj, kiuj, ŝajne inter tiu ĝenerala senmoveco ankaŭ dum sia kurado haltas kaj pendas en unu loko.

II.

Tiu ĉi trankvilo jen estas tiu homogeneco en la individualeco kaj la verkoj de Böcklin, jen signo de ambaŭ, jen tiu ĉi speciala trajto, kiu konsistigas ilian pozitivan proprecon kaj diferencigas ilin de ĉiuj aliaj. Estis jam en unu el la plej fruaj pentraĵoj de l' majstro, en la tolo, sur kiu juna homo kaj juna virino, Böcklin mem kun sia fianĉino, mano en mano paŝas tra la pejzaĝo; kaj post jaroj, simile al nobla viro, li akiris plion da bonodoro kaj plenforto tiel, ke en unu el la lastaj verkoj de l' pentristo-filozofo, „La kvar sezonoj de l' vivo“, la plej simpla kaj plej primitiva inter ĉiuj alegorioj estas plena da vivo kaj poezio.

Se ni per unu rigardo ĉirkaŭprenos la tutan riĉegan diversecon de Böcklin'aj pentraĵoj kaj kunigos ilin iamaniere por akiri la tutan kaj unuecan impreson, tiam ni ricevos ĵus la bildon kaj impreson de l' trankvilo, harmonio, ripozo.

Se ni ĉirkaŭprenos per la rigardo la tutan diverskoloran vicon de reprezentantaj spiritoj nuntempaj en la individualecoj kaj verkoj, tiam inter ŝanĝiganta diverseco de impresoj restos kaj gravuziĝos en ni unu nur komuna impresio — manko de rondiĝo, de fina pretiĝo, manko de tiu trankvilo, kiu estas tiel profunda kaj hela, ke ĝi ŝajnas, kvazaŭ oni jam ne bezonus ĝin ekposedi, sed kvazaŭ ĝi estus trankvilo de l' instinkto; — ĝi estas trankvilo kvazaŭ eligita el la vivo, kiu kune kun la tuta multnombreco de kontrastoj kuniĝas en unu sola individualeco; ĝi estas trankvilo, apartenanta al la malofta homo, kiu sciis jungi la tutan universon, kaj obeeme ĝin meti ĉe siaj piedoj kvazaŭ la sovaĝan beston, venkitan per la okuloj.

Kiel unua en tiu ĉi vico ŝajnas al ni Nietzsche. Li estas homo — la sola en sia tempo — kiu en fundo de sia plej interna vivo trairis la plej teruran el ĉiuj bataloj kaj la plej dolorigan inter ĉiaj ŝanĝoj de individualeco, kaj kiu pro tio ĵus venkis en si unu mondkomprenon, por ĝin anstataŭi per la alia. La ĝojo en la momento de plenumo de tiu ĉi ago eniĝis en la lirikon tiel grandegan, ke en la potencaj ĝiaj ritmoj oceanaj dronis tute ĉiu verkeco de la nuntempa periodo, kvazaŭ ĝi neniam estus ekzistinta. Sed en lia ĝojo mankas trankvilo, trankvilo de la vera venkinto. Li estas granda heroo de kulturo, sed por la batalo pro la homaro li pagis per la plej

terura el ĉiuj venkoj Pirrhus'aj al la individualeco mem, kaj pri tio li neniam forgesi povos kaj devos. En tiu ĉi belega himno triumfa estas ia disonanco, ĉar la individualeco, sur kiu li la himnon estis ludinta, estas rompita instrumento. Ĝi estas kanto de kantoj de malsanulo, kiu reakiras la sanon, kaj tiu kanto estas plena je ĝemoj kaj plendoj de resanigi periodon. Ĝi estas belega aŭtoapoteozo de homo-estro, tamen ĝi trovas sian resonon en la plej venĝema kaj plej embuska el ĉiuj venĝoj, en la venĝo kontraŭ sia propra elrio. La bildo de la universo trapenetris kaj eniĝis en la individualecon; la malnova bildo de l' mondo disfalis en pezoj, kaj la nova el ĝi ne eliris; sed la individualeco dume krevis. La verkeco de Nietsche estas kvazaŭ potenca kanto ĥora je la gloro de personeca trankvilo de Zarathustra; sed mem ĝi ne estas trankvilo. Li deziras esti tiu ĉi trankvilo, adoras ĝin, sopiras je ĝi, sed tia ne estas; li certigas, ke li ĝin havas; li scias, ke ne estas tiel, sed li zorgas atingi, ke li mem kaj la aliaj forgesu pri ĉi tiu manko. En la profunde kaŝita konscio de tiu ĉi manko tamen moviĝas nerimarkeble „ressentiment“, kaj la malkapablo de la kapto de la ĉiam forfluganta Dafne kondukas tiun apostolon fortan kaj vivplenan al la venĝema adorado de la malamikaj por la vivo kaj memmortigaj instinktoj.

(Daŭrigota.)



Grava Afero.

Konkurso de „La Bela Mondo“.

La eldonisto kaj la redaktoro de „LA BELA MONDO“ decidis malfermi konkurson.


KONDIĈOJ de la literatura konkurso:

- 1^e verki originalan novelon, rakonton aŭ artikolon ilustritan en prozo, kaj skribi ĝin plej legeble *nur* sur *unu* flanko de l' papero.
- 2^e sendi, per rekomendita poŝto, la manuskripton al la redakcio de „LA BELA MONDO“, *Dro Schramm, Dresden-Ständehaus*, antaŭ la 1^a de julio 1909.

PREMIOJ: La juĝantaro samtempe atentos la elegantecon de la stilo kaj la intereson de la teksto. Ĝi disdonos la sekvantajn premiojn:

1^a premio 50 M. (= 25 Sm.), 2^a premio 25 M. (= 12,5 Sm.).

La aliaj aŭtoroj de bonaj tekstoj ricevos ĉiu po dek markoj da libroj. La premiigitaj tekstoj estos enpresataj en „LA BELA MONDO.“ La redakcio konservos por si la rajton, enpresi, post korekto se bezone, la nepremiigitajn tekstojn.



Grava alvoko! Ekskurso al Skotlando.

Unu el la plej gravaj taskoj de la jam tiel altgrade utiliĝanta Universala Esperanta Asocio estas la aranĝo de araj ekskursoj de iu ajn lando al alia. La celo de tiaj vojaĝoj estas ne nur vidi fremdan landon en maniero kiel eble plej malmultekosta kaj komforta, sed ankaŭ konatiĝi kaj interamikiĝi kun en — kaj eksterlandaj samideanoj, cetere agrabla ekzercado en la uzo de nia bela lingvo.

Certe estos nombro da Esperantistoj en la nordaj landoj de Eŭropo, kiuj iukaŭze ne povas veturi al la kvina kongreso en Barcelono kaj tamen deziras pasigi la libertempon kun samideanoj en fremda lando.

Tial mi opinias renkonti la konsenton de multaj samideanoj per la aranĝo de ekskurso al la belega Skotlando. Ni uzos vaporŝipon de Hamburgo al Leith kaj veturos de tie al Edinburgo, kie ni estos bone akceptataj de la grupo. Sub afabla gvidado de skotaj amikoj ni vidos la famajn belegajojn de la lando, ankaŭ Glasgovon. Reveturo ŝipe de Leith. Eble nombro de la vojaĝantoj deziras vidi aliajn partojn de Britujo; tio estos aranĝota. Mi proponas uzi ŝipon elirontan el Hamburgo vendredon la 23 an de Julio. La reveturo okazos el Leith sabaton la 31 an de Julio, alveno la 2 an de aŭgusto en Hamburgo. La kostoj de la tuta ekskurso estos ĉirkaŭ 100 Sm (M 200.—), eble iom malpli. La partoprenontoj dezirantaj vidi Hamburĝon, estos tie ĉi bone gvidataj. Ĉie la de ni vizitotaj grupoj aranĝos festetojn.

Mi insiste petas, ke la partoprenontoj kiel eble plej baldaŭ sciigu min, por ke mi faru la necesajn difinitajn aranĝojn kun la ŝip-kaj hotelmastroj.

*W. A. Vogler, Hamburg, Rathausstrato 16.
Delegito de U. E. A.*



Grava afero.

Por montri al la skeptikuloj en Germanujo, ke oni povas ricevi per Esperanto multajn gravajn kaj interesajn sciigojn pri ia ajn temo, mi petas ĉiujn ĝesamideanojn en la tuta mondo, ke ili kiel eble plej baldaŭ skribu al mi pri la sekvantaj demandoj:

1. Ĉu la stenografia sistemo de Gabelsberger estas uzata en Via lando?
2. Ĉu ekzistas libroj de tiu ĉi sistemo kaj kiaj?
3. Ĉu Vi povus sendi al mi adresojn de stenografiistoj en Via lando?
4. Ĉu Vi ion scias pri la uzado de la stenografio en Via parlamento?

Ĉar mi volas publikigi serion da artikoloj en kelkaj gravaj germanaj ĵurnaloj pri stenografio en eksterlando, sciigante la legantojn, ke mi povas raporti pri tio dank' al Esperanto, mi estus tre dankema, se mi ricevus multajn informojn el eksterlando. Mil dankojn antaŭe!

*Dro. Schramm
bibliotekisto de la reĝa saksa
stenografia instituto en Dreseno, Ständehaus.*



Bibliografio.

„La Bela Mondo“ raportas pri novaj verkoj nur, kiam la redakcio donace ricevis du ekzemplerojn. (Adreso: Dro Schramm, Dresden-Ständehaus.)

García Moreno de pastro H. M. H. Bartels, tradukis Jolo. Joh. Luneman, v. d. Neerstraat 40, Hago (Holando). Prezo 15 c, 100 ekz 8 fr.

Oni intencas eldoni „Universalan Katolikan Esperantan Bibliotekon,“ kiu estos malkara kaj bona literaturo por katolikaj gesamideanoj. La libreto „García Moreno“ estas la unua volumeto de tiu ĉi kolekto. Samtempe ni atentigas niajn gelegantojn, ke „Espero Katolika“ denove aperas kaj ree okupos en la esperantista gazetaro la honoran lokon, kiun ĝi depost kvin jaroj tiel merite okupis.

Portugala Revuo. Órgão dos Esperantistas Portuguezes. Elirante ĉiumonate. Redakciejo kaj Administrejo: Rua do Rosario, 215 — Porto. Jarabono: 2 Sm.

Nun havas ankaŭ niaj portugalaj samideanoj ilian gazeton. Ni ricevis la du unuajn numerojn de la Portugala Revuo. Ni tre ĝojas pri la nova gazeto esperante ke baldaŭ kresku kaj floru nia afero en Portugalujo, kie ĝis nun oni tre malofte aŭdis ion pri nia kara lingvo.

La Pioniro. Ofic. organo de la soc. hung. esp. „Studentgrupo.“ Redakcio kaj administracio: Budapest VI. Nagymező-u 12. I/16. ĉe Jules de Bulyovszky. Jara abono. 1 Sm.

La Esperantista Studentgrupo en Budapest tre bele progresadas kaj nun eldonas „La Pioniron“ aŭtografe presitan. La enhavo de la tri unuaj numeroj estas tre interesa.

Esperanta Medicina Biblioteko. Dro. Jean Dardel. La tekniko de la termala kuracado ĉe Aix-les-Bains. Paris, A. Maloine, libreldonisto, 25 Rue de l'École-de-médecine. 8^o 24 paĝoj.


Tiu ĉi broŝuro pritraktas la termalan kuracadon en Aix-les-Bains kaj ĝiajn diversajn aplikojn. Ĝi estas ilustrita de multaj desegnoj, kiuj igas la tekston pli facile komprenebla. La libro estas bona propagandilo por nia afero! Montru ĝin al ĉiuj neesperantistoj.

Revista de Menorca. Publicación del Ateneo Científico, Literario y Artístico y Corporaciones y Sociedades con él federadas. Año XIII. Mahon. Establecimiento tipográfico de B. Fábregues, Nueva 25.

Tiu ĉi ĝrava gazeto enhavas nun specialan rubrikon por Esperanto sub la titolo: „Sekcio de Mahona Grupo Esperantista.“ Ni tre ĝojas pri tio.



Krepusko en haveno.




Kiam mia edzino kantas.

Laŭ Erik Lie.

Vi karulin', en nuba vesperhor
Ravigas min per via bela art',
Mi sentas min en tre feliĉa fart',
Kaj aŭdas vin anime kaj en koro.

Muziko ĉiam estas ja ĉarmeĝa,
Plejvole kiam vi kantadas ĝin,
Kaj sonoj dolĉaj ĉirkaŭiĝas min
En vespertempo, tiam pli belega.

Teo-Haugesund - Norvegujo.



Revoj.

De Olivia Ŝreiner.

I.

En malproksima mondo.



ur unu el malproksimaj steloj ekzistas mondo, kie okazadas io, kio malestas sur nia tero.

En tiu mondo vivis viro kaj virino. Ili havis unu saman laboron, ili dumlonge iris unu saman vojon kaj estis amikoj, — kio iafoje estas ebla ankaŭ ĉe ni.

Sed en la stela mondo estas aĵo, malestanta sur nia tero. Tie kreskas densega arbaro, kaj en la arbaro, kie la arboj ariĝas pli dense, interplektiĝante per la radikoj, kaj kie neniam brilas la suno, — altiĝas altaro.

Je l' tago ĉio estas trankvila ĉi tie, sed dum la noktaj horoj, kiam la lunaj aŭ stelaj radioj tremetas super la arbarojn, kaj malsupre reĝas mallaŭteco, — tiutempe, se homo penetros ĉi tien en plena soleco. falos ĉe la ŝtupojn de la ŝtona altaro kaj, malkovrinte sian bruston, ekvundos ĝin tiel, ke la sango gutas sur la ŝtupojn, — li ricevos ĉion, kion ajn li petos.

La viro kaj la virino iris mano en mano, kaj la virino deziris al li bonon. Unu fojon, je l' nokto, kiam la luno lumigis tiel, ke ĉiuj folioj sur la arboj brilis, kaj la maraj ondoj argentiĝis sub la lunaj radioj, — la virino eniris la arbaron sola. Tie estis mallume, la luna lumo faladis nur per malgrandaj makuletoj sur la malvivajn foliojn sub ŝiaj piedoj, kaj super ŝi la arbaraj branĉoj interplektiĝadis, kiel densa arkaĵo.

Ju pli profunde ŝi eniris la arbaron, des pli mallume fariĝis, kaj fine la luna lumo tute malaperis. La virino alproksimiĝis ĉe l' altaron, surgenuiĝis kaj komencis preĝi

Estis neniam respondo. Tiam ŝi malkovris sian bruston kaj vundis ĝin per kuŝanta apude akra ŝtono. Gutoj da sango malrapide falis sur la ŝtupojn, kaj la virino ekaŭdis voĉon:

— Kion ci serĉas?

Ŝi respondis:

— Estas homo, plej kara por mi en la mondo. Mi volus doni al li la plej bonan el ĉiuj bonaĵoj.

La voĉo demandis:

— Kiun?

La junulino diris:

— Mi ne scias. Tamen mi volas doni al li, kio por li estas la plej bona.

La voĉo elparolis:

— Ĉia preĝo estas ekaŭdita: li ricevos, kion ci petas.

Tiam la junulino levigis, forte alpremis sian veston al la vundita brusto kaj forkuris el la arbaro. Malvivaj folioj bruets sub ŝiaj piedoj. Post la arbaro, en malŝirmita loko, dolĉe blovetis milda venteto, kaj la apudborda sablo briletis sub la luna lumo. La junulino, kurinta laŭ la mola marbordo, subite ekhaltis. Tie, sur la akvo, io moviĝadis. Ŝi ŝirmis sian frunton per la mano kaj, rigardinte malproksimen, ekvidis ŝipeton, rapide glitantan sur la lumigata akvo al la malfermita maro. Iu staris en la ŝipeto je sia tuta kresko; la luna brilo malhelpis klare vidi la vizaĝon, tamen la staturon la junulino rekonis. La boato rapide malproksimiĝadis. Ŝajnis, kvazaŭ neniu ĝin direktis. Ĝi naĝis malproksime de l' bordo, kaj la tremetado de la luno malhelpadis klare vidi, sed la junulino estis preskaŭ certa, ke ankoraŭ iu sidis en ĝia malantaŭa parto.

Pli kaj pli rapide glitis la barketo sur la akvo, malproksimiĝante. La junulino adis kuri laŭ la marbordo, sed ne povis pli proksimiĝi al la boato. La vestaĵo, kiun ŝi tenis ĉe sia brusto, dismalfermiĝis; la junulino etendis la brakojn antaŭen, kaj la luna lumo ekbriletis sur ŝiaj longaj, disvolviĝintaj haroj.

Tiam apud ŝi aŭdiĝis murmureto:

— Kio okazis?

La junulino ekkriis responde:

— Mi per mia sango aĉetis por li la plej bonan el ĉiuj bonaĵoj! Mi estis portanta ĝin al li, sed li forkuras de mi.

La voĉo delikate ekmurmuretis:

— Ĉia preĝpeto estas plenumita. Tiu bonaĵo estas donita al li.

— En kio do ĝi konsistas? — malespere demandis la junulino.

La voĉo respondis al ŝi.

— En tio, ke li povu cin forlasi.

La junulino ekhaltis.

La ŝipeto malaperis malproksime, en la maro, malantaŭ la luna brilaĵo.

La voĉo mallaŭte elparolis:

— Ĉu ci estas kontenta?

Kaj ŝi respondis:

— Jes, mi estas kontenta.

La maraj ondoj kun longedaŭra kaj karesa murmureto plaŭdadis je la bordo ĉe ŝiaj piedoj.



II.

Donacoj de l' vivo.

Mi vidis dormantan virinon. Ŝi songis, ke la Vivo staris antaŭ ŝi, tenante en ĉiu mano po donaco: en unu — Amon, en alia — Liberecon.

Kaj la Vivo diris al la dormantino:

— Elektu!

La virino dum longa tempo meditis kaj fine diris:

— Liberecon!

Kaj la Vivo ekparolis:

Ci estas bone elektinta. Se ci estus dirinta:

„Amon“, mi estus doninta al ci la petiton, sed mi estus foririnta de ci por neniam reveni. Kaj nun alvenos tago, kiam mi revenos ĉe cin kaj alportos la ambaŭ donacojn en unu mano.



III.

Sekreto de pentristo.

Pentristo faris pentraĵon. Liaj aliaj kunfratoj havis pli riĉajn kaj pli helajn kolorilojn, kaj ili pentradis pli rimarkindajn pentraĵojn, — ĉi tiu do artisto pentris nur per ruĝaj kolortonoj, kaj ili ardis kaj fajre riĝis vivplene.

La popolo estis ravegata pri la pentraĵo.

Venis aliaj pentristoj kaj diris:

— Kie li prenas sian kolorilon?

Ili demandis lin, sed li ridetis kaj respondis:

— Mi ne povas ĝin diri al vi, — kaj daŭrigis sian laboradon, malalte klininte la kapon.

La pentristoj serĉis antikvajn receptojn pri kolorilkunmetado, mendis plej maloftajn kolorilojn el Oriento, tamen ili ĉiuj ŝajnis malbrilaj, malvivajaj.

Dume la pentristo adis labori. Liaj verkoj fariĝis pli kaj pli brilaj, vivplenaj, — sed la artisto fariĝis pli kaj pli pala.

Iun tagon oni lin trovis mortinta antaŭ la pentraĵo. Sciiginte pri la morto, la pentristoj sin ĵetis en lian malpleniĝintan laborejon, traesploris ĉiujn vazojn kaj fandujojn, sed trovis neniun tian kolorilon, kian ili mem ne havus.

Kiam oni estis senvestiginta la korpon je liaj maleternaj, dumvivaj vestaĵoj por kovri ĝin per mortkitelo, sur la maldekstra brustflanko oni ekvidis vundon.

Ĝi estis malnova vundo; verŝajne, ĝi truiĝadis ĉi tie dum la tuta vivo: ĝiaj randoj estis malnoviĝintaj kaj malmoliĝintaj; sed la Morto, metanta sur ĉion sian sigelon, estis kuntirinta ilin kaj ferminta la vundon.

Oni enterigis la pentriston, — tamen la homoj ĉiam adis demandi:

— El kie li havigadis al si la kolorilon?

Kaj okazis, ke la pentristo baldaŭ estis forgesita, sed lia verko restis vivanta.



IV.

Arlekeno kaj Venuso.

Kia mirinda tago! La vastega parko svenetas sub la ardanta rigardo de l' suno, kiel Juneco sub la rigardo de Amo.

Ĉio silentas, kvazaŭ ravita. Aŭdiĝas nek brueto, nek sono; eĉ la akvoj ŝajnas dormi. Ĝi estas senparola orgio de la naturo, tiel malsimila al homaj festoj.

Kvazaŭ penetritaj per iu senhalte pliiĝanta lumo, la ĉirkaŭaj objektoj brilas pli kaj pli hele; la floroj ŝajnas ludi per deziro

konkuri kun la ĉiela bluaĵo per la klareco de siaj koloroj, kaj la flugantaj super ili aromoj, videbliĝantaj en ĉi tiu arda aero, kvazaŭ timiano sin levas al la astro

Tamen meze de tiu ĝenerala ĝojegado mi ekvidis suferantan estaĵon.


Ĉe piedestalo de grandega statuo de Venuso, unu el memvolaj arlekenoj, devigataj ridigi la reĝojn, turmentatajn de pento aŭ enuo, vestita per multkolora ridiga kostumo kaj ĉapo kun tintiletoj, sidis kurbiĝinta, sin apoganta al la piedestalo kaj levanta al la senmorta diino siajn larmlenajn okulojn.

Tiuj okuloj diris:

„Mi estas la plej lasta, la plej izola el homoj, senigita je amo kaj amikeco, pli senhejma kaj orfa, ol la lasta besto! Sed dume mi ankaŭ kapablas ami kaj kompreni la senmortan Belon! Diino, kompatu mian mizeron, mian frenezon!“

Sed la senkompata Venuso rigardadis ien malproksimen per siaj marmoraj okuloj

El rusa lingvo esperantigis D-ro Andreo Fiŝer (Tiflis.)



La blua groto sur Kapri.

(Rakonto de Sinjorino A. Löhn-Siegel; el „Geographische Charakterbilder“ de A. W. Grube; la unuan fojon publikigita en la „Leipziger Zeitung“ No. 32, 1888. Esperantigis Alfred Richter.)



Un estas la plej bona tempo, rigardi la bluan groton! oni proklamis de ĉiuj flankoj. La tago estas bela, je tiu ĉi horo la groto estas ombrata de la gigantaj ŝtonegoj, kaj tio kaŭzas la plej grandan bluan kolorspeguligon.“

Mi ŝanceliĝis, ĉar mi fartis ankoraŭ tre malbone kaŭze de la ĵus foririnta marmalsaneco kaj nova, kvankam mallonga marveturo minacis pliiĝon de la suferado.


Sed la konvinkartoj de la feliĉaj marsanuloj venkis; malgranda komercisto el Salerno petis min, se en la boato renkontus al mi homaĵo, serĉi konsolon en liaj brakoj, kaj tiel ni suprenrampis tra vinĝardenoj, densaĵoj de alooj kaj kaktoj al tiu bordejo, de kie beleta barko foriris al la blua groto. Mi estadis kuraĝa; distris min la armeo de multkoloraj meduzoj, kiu sekvis la boaton kaj ŝajnis ludi kun la miliardoj da malgrandegaj sunoj sur la maro.

Majeste la gigantaj membroj de la subkonstruaĵo maldekstre superstaris, nudaj, vertikale dekliviĝantaj kalkŝtonegoj. Kelke da mil futojn ili altiĝas kaj tiel same denove malaltiĝas sub la blua, ridetanta, sed mortpenseganta ondo.

Ni preterpasis la hundgroton, malalta ŝtonegkaverno, el kiu elpenetris rimarkindaj tonoj. Kriegis, bojaĉis, ĝemis, murmuris, kvazaŭ en ĝi la trikapa inferhundo estus alkatendigita. Kiam la ondamaso enfalegis en la truon, la bruego estis plej furioza, reveninte ĝi moderiĝis, kvazaŭ la infera monstro per bojado laciĝis.

La maro onde leviĝis tiel alte al la krutaj ŝtonegmuroj, sub kiuj kaŝiĝis la blua groto, ke ni ne rimarkis la eniron. Laciĝa laboro komencis por la boatestro. Poste ni kuŝiĝis sur la dorson laŭ lia ordono en la barko, li devis kapti la momenton, en kiu alrulanta ondo ĵetegus la ŝipeton en la groton kaj li devis sin apogi per sia tuta forto kontraŭ la ŝtonportego, por ke nia nuksoŝelo ne disfrakasu je la ŝtonoj. Risko, kiu povas prosperi nur al la kuraĝego kaj lerteco de la marinormitaj indiĝenoj.

Tiel do, estintaj kelkfoje balancintaj tien kaj tien antaŭ la pordo de la Hadeso, ni subite enpaŝiĝis la strangan apartamenton de Pluto. Ĉirkaŭe bluiĝantaj stalaktitoj, kiuj malsuprenpendis de la kavernplafono kaj de la muroj, ialoke preskaŭ tiel blujaj kiel la ondo mem, en kiu multkoloraj meduzoj rapidege iris kaj revenis. La blanketaj kalkformoj ŝajnis al mi esti tegataj de blua krepo, sur kiu oretaj lumoj similaj al grandegaj maŝoj ek-tremis tien kaj reen, kaj kiuj malaperis en la malantaŭa parto




Kapri.

de la kaverno. Tie ĉio fariĝis tute bluega, sedmi ne povis partopreni je la veturado en la labirintkoridorojn de la ĝroto. La sovaĝa dancado de la kaptitaj ondoj inter la ŝtonego, la kriego kaj kraketo, kiam ili rompiĝis ĉe la muroj, plue la saltetado de la beleta barko, kiu per iaj ondpuŝoj krakis en ĉiuj partoj, kapturniĝis min. Mi estas sidigita sur malgranda roka rifo, kiu, simila al scenejo, superstaris el la malantaŭa parto kaj rifuzis la pluan akvovojaĝon tra la ĝrotkoridoroj. Ĝi estis finita per

torĉoj, kaj estis fantoma aspekto, kiam la boato kun la du ruĝardantaj okuloj elbriletis el la blueta nokto kiel naĝanta besto el fabelo kaj fine malaperis malantaŭ unu kolono kun multe da stalaktitornamajoj. Pli mallauĉe sonis al mi, al la izolitulino, el la malproksimeco de la malantaŭa parto remofrapoj kaj vokoj, kiuj kaŭzis la sonantan respondon de l' eĥo en la kaverno — fine estis ĉio silenta, kio memorigis al la proksimeco de homo, kaj mi estis sola kun la plaŭdantaj, dancantaj ondegoj, kiuj al mia sceno suprenŝprucigis blublankan ŝaŭmon, kvazaŭ ili volus kapti min je mia vesto kaj malsuprentiri en la abismon.

Tremo de timo kaj maltrankvilega sopiro al la supra mondo perfluetis min. Tiel sidis Ariadno iam sur la ŝtoneĝinsulo — mi al mi diris — sed ŝi tamen vidis la esperplenan astron de la ĉielo, dum ĉirkaŭ mi estas korpemanta lunbrileto. Tamen, post sufiĉe



La blua groto.

longa rigardado de mia restadejo min kaptis festa sento. Ĉu estas la kutimo de bona kristano, imagi malantaŭ la bluo de la etero la dian salonegon, plenan da grandiozaj estaĵoj — sufiĉe — mi kredis, ke kaŭze de la tera bluo mi fariĝis treeĝe meditega, piega.

Kiam tre petolemaj ondoj enverŝis en mian palacosimilan kaverton, ili elŝutis antaŭ mi kvazaŭ kornojn de riĉecoj da ŝaŭmperloj kaj alportis por momento tagradion, mallongan lumigon en la fantoman bluecon. Poste rapide revenis la kolora nokto kaj la unutona muziko de la pli modere dancantaj ondoj, kiuj nur de tempo al tempo, kiam ili fortege puŝis kun la ŝaŭmkapoj kontraŭ la ŝtonegoj, aŭdigis kriegan sonon. Sed ju pli longe mi estis tiel treeĝe solega kiel en la tombo, ju pli ofte la elastaj blujaj vestoj de la Undino malfermis la neesploritan internan

parton apud miaj piedoj, des pli timigaj sentadoj revenis. Kiel loĝanto de mallumeta konko sentiĝis mia menso, bezonanta la sunon, ĉirkaŭondegata per la oceano, kiu minacas pereon al ni, malfeliĉaj ternaskitoj. Fine la grandiozeco kaj pentrinda beleco de la loko fariĝis malagraba al mi, fermegis mian gorgon, kaj la bluo de la kristana ĉielo kun sia armeo da stelo min ne plu konsolis. For! For en la regionon de Helio! For el la antaŭejo de la infero en la sunplenan vivigantan aeron de la supramondo!

Jen plaŭdado per remoj eksonis malantaŭ la blujvualoj, malantaŭ la templokolonoj el stalaktito kaj ellavata prakalko; fulmis ruĝe tra la blua nokto, kaj sub la profundaj arkaĵoj de la ĝrota malantaŭa parto la konko leviĝis, kiu devos liberigi min. Kun ĝojego mi akceptis la marheroojn, kiuj estingis siajn torĉojn kaj rakontis multe da fabelaĵo. La boatestro al ili estis promesinta, montri la travideblan klarecon de la kavernakvo je sia propra korpo. Unu, du, tri — kaj liaj vestoj estis forĵetitaj, kaj statuo de skermisto el la galerioj de la vatikano aŭ de la konservatorpalaco ŝajne viviĝis, kuraĝe kaj elaste ĝi moviĝis en la arĝentklara fluaĵo, kiu, kie la naĝanta homkorpo dividis ĝin, havis apenaŭ ankoraŭ la duonan de sia blua lumeto.

La eliro el la ĝroto estis pli facila ol la eniro. Fine mi povis saluti denove la sunon! Kaj nun ŝajnis al mi la travivaĵoj en la ĝroto kiel revo! —



Reichenberg.



Reichenberg, nomata la metropolo de la germana bohemia lando, kuŝas en la valo de la „Görlitzer Neiße“ ronde ĉirkaŭata de arbaraj montoj. La urbo enhavas 39 000 loĝantojn (96% Germanoj kaj 4% Ĉeĥanoj). Kun la antaŭurbetoj posedas la urbo 65 000 loĝantojn.

Reichenberg estas la plej granda germana industriurbo de l' lando. Ĝi estas la plej granda fabrikurbo por drapo en la




Teatro, ĉefpoŝtoŝicejo kaj magistrata domo (malantaŭa flanko).

tuta monarĥio aŭstria-hungara, sed ĝi estas ankaŭ la centro de la plej grandaj kaj plej famaj lano-kaj duonlanokomercaj fabrikoj. La plej konataj fabrikoj en tiu ĉi speco estas la fabrikoj de la firma Johann Liebieg kaj kompanio, kiuj formas tutan urbdistrikton nomata „Josefenthal“ (Josefinovalo). En ili estas okupataj preskaŭ 2000 da homoj. En la proksimeco de la fabrikoj ni ankaŭ povas vidi la valfluhaltejon. Krom tiuj


Ĉi ĉefindustribranĉoj kompreneble ekzistas en nia urbo ankaŭ aliaj. Ekzemple ni trovas famajn fortepianofabrikejojn, grandajn artlignaĵejojn, unu aŭtomobilfabrikon, kelkajn maŝinofabrikejojn, multajn grandajn kolorigejojn, fero- kaj metalofandejojn, kuproforĝejojn, spruĉilfabrikejojn, grandajn presejojn k. t. p.

Preskaŭ samtempe kun la industrio disvolviĝis ankaŭ la fervojoj. Kvin fervojolinioj estas, kiuj kunvenas en Reichenberg. La „suda-nordgermana-unuiĝofervojo“ unuigas nin unuflanke kun la internaĵo de l' Bohemlando kaj kun la ĉefurbo de la monarĥio



Valfluhaltejo.

Vieno, aliaflanke kun la urbo „Görlitz“ en prusa Ŝlesujo. La Reichenberg-Zittaŭa fervojo kondukas nin en la najbaran Saksujon. La Reichenberg-Gablonz-Tannwalda fervojo alportas nin en tiujn regionojn, kie floras la vitroindustrio, precipe la produktado de falsaj altprezaj ŝtonoj („Simili“ brilantoj) kaj pluen en la belan Riesengebirge (gigantmontaro) kaj ankaŭ en prusan Ŝlesujon. Fine la Reichenberg-Teplitza fervojo veturas per helpo de multaj pontoj kaj tuneloj super la Jeŝkenmontaro kaj unuigas



Magistrata domo.

nin tiamaniere kun la riĉaj brunkarboregionoj en la okcidento de nia lando kaj kun la rivero Elbe. El tio oni povas vidi, ke de ĉiuj flankoj oni tre facile povas veni al Reichenberg.

Pri la prahistorio de Reichenberg oni scias preskaŭ nenion. Do estas certe, ke Reichenberg estis fondata dum la regado-

tempo de la reĝo Prschemisl Ottokar II. (1248—1278) de germanaj enmigrintoj el Ŝlesujo.


Komence disvolviĝis la urbo malrapide. Precipe malhel-panta por ĝia disvolvado estis la tielnomata kontraŭreformacio, ĉar je tiu ĉi tempo tre multaj loĝantoj elmigris. Grandan paŝon antaŭen refaris la urbo en la tempo de la enkondukado de la maŝinoj en la drapindustrion. Nun venis unu fabriko post la alia. La urbo pliĝandiĝis kaj plibeliĝis. En la lasta



Popolĝardeno.

tempo la urbo ankaŭ ricevis multajn novajn konstruaĵojn, ekzemple la teatron, la magistratan domon, la nordboheman metiomuzeon, la konstruaĵon de la komerca kaj metia ĉambro, la belan imperiestro-Francisko-Josefo-banejon, la ŝparkason k. t. p. Preĝejojn posedas Reichenberg 4 katolikajn, 1 evangelian kaj 1 sinagogon.

Sed ankaŭ kiel lernejurbo Reichenberg fariĝis fama. Krom la popolo-kaj burĝolernejoj ĝi ankoraŭ havas gimnazion, real-




Komerco- kaj metioĉambro.

lernejon, metiolernejon, speciallernejon por teksado, instituton por instruistoj, urban komercakademion kaj diversajn specialajn lernejojn.

En plej nova tempo disvolviĝis sur la deklivoj de la Isermontaro, senpere al la arbaro, nova urboparto nomata „Villenviertel“ (vilao-parto).

En senpera proksimeco de la „Villenviertel“ troviĝas la urboparko, kies ĉefornamaĵo estas la monumento de la imperiestro Josefo II. kaj la fontano. En la norda flanko de la parko staras la monumento de la gimnastikistoj: patro Frederiko Ludoviko Jahn. La finon de la parko formas la gastejo „Volksgarten“ (popolĝardeno). Ĉi tie disvolviĝas nun meze en la arbaro, libere de la bruado de la urbo, libere de fulmo kaj polvo la somerfreŝejo Reichenberg. Malantaŭ la gastejo „Volksgarten“ ekkonstruis la urbokomunumo la belan mallacigan hejmon por somerfreŝuloj, kiu enhavas 29 ĉambrojn por fremduloj. De ĉi tie gvidas multaj bele flegitaj promenovojoj multajn horojn tra la belegaj pinglaj arbaroj. Tre oportuna estas, ke oni povas veturi per la elektra tramveturilo mezen en la arbaron.

Antaŭ la urboparko kuŝas en bela arbarvalo la gondololageto kaj malantaŭ tiu ĉi ni trovas la bestobaraĵon, kiu enhavas multajn belajn bestojn.




Gondololageto.

La ĉirkaŭaĵo de la urbo estas ĉarmega. Sur la sudokcidenta flanko etendiĝas la Jeschken-montaro kun la Jeschken (1010 da metroj), kiu estas kronata de bela restoracio. La perspektivo, kiun oni ĝuas de tiu ĉi monto estas treege bela. Sur la kontraŭa flanko de la valo ni trovas la antaŭmontojn de la Isermontaro, kiu ankaŭ atingas altecon de preskaŭ 800 da metroj. La plej fama monto sur tiu ĉi flanko estas la „Schmiedstein“ (forĝistoŝtono), kiu estas ornamata de mezepoka kastelo, nomata „Hohenhabsburg“. Tiun ĉi kastelon konstruigis barono Henriko de Liebieg. Post lia morto heredis ĝin la urbokomunumo. La perspektivo de la kvinangula kastelturo, kiu estas alta 25 da metroj, ankaŭ estas tre bela.

Estas de granda graveco por tiuj ĉi ambaŭ perspektivlokoj, ke oni povas atingi ilin el Reichenberg per tre oportunaj vojoj en mallonga tempo. (La Jeschken dum 2 horoj kaj la Schmiedstein dum 30 minutoj).

Ant. Hübner.





Lenaŭ-monumento en Esslingen a. N.

Primula veris.*)

(Lenaŭ).

Floro aminda,
Ĉu tiel frue
Jam ci revenis?
Cin mi salutas,
Primula veris!

Malpli profunde
Ol ĉiujn florojn
Dormo cin tenis,
Floro aminda
Primula veris!

Ci nur vekiĝis
Per la unua
Dolĉa voketo
De la printempo,
Primula veris!

Ankaŭ en mia
Kor' iam floris,
Multe pli bele
Amaj ol floroj,
Primula veris!

Tradukis G. Flicker-Kolzig.


*) = primolo de l'printempo.

Al printempo.

Printempo iras
Kaj mi suferas,
Kaj mi deziras
Min saniligi;
Mensogaj songoj
Preteriradas,
Kaj mi ĝin volas
Malrapidigi.
Ho printempo ora,
Kiel homoj vin amas!
Ho vi, bonodora,
Pri bono vi famas
Pri amo, espero
Feliĉado hela,
Kaj la nokto luma
Kaj la floro bela
Foje al mi same
Pri, de vi, farato
Vi rakontis, ame,
Mi malamato!

Rememoru! Jam
Diradis vi same!
Al vi mi konfidis,
Kaj konfidis ame.
Sed vi ne plenumis
Permesojn tre dolĉajn . . .
Ĝis nun mi ĝemumis
Tiujn bildojn sorĉajn
Ree vi ripetas,
Ke vi min vivigos . . .
Sed, mi murmuretas,
Ke vi mensogigos!
Mi ne havas fortojn —
Songojn revivigi . . .
Mi ne havas fortojn —
Min resaniligi . . .
Kaj mi suferadas,
Kaj mi jam mortadas
Pro vi, pro doloro,
Printemp'bonodora.

A. Vidihan (Rusujo).



Böcklin.

De Ola Hansson.

(Fino.)

Kaj kia estas spiritstato en la momento, kiam la vidanto rigardas la kurtenon, falantan sur la Ibsen'an dramon, — kia estas la impresoj, kiun la vidanto elportas kun si el la teatro hejmen? Kompreneble ĝi estas kunmetita el diversaj elementoj, kiuj samtempe estas diversaj laŭ ĉiu aparta verko; sed la principa trajto de l' akordiĝo restas ĉiam la sama, ĉar ĉiam tiu sama elemento en la verko superas kaj decidas pri la tuto. Ĝi estas la sento de silenta malkontenteco, sento de maltrankvilo — tiu sama sento, kiun oni ricevas, kiam oni inter tiuj ĉi multegaj, etaj kontraŭaĵoj de ĉiutaga vivo devas stariĝi frunte kontraŭ la komplikajtoj sen la eliro, kontraŭ la konflikto nesolvebla, sed tie ĉi estas ĝi pli forte akriĝita, ĉar komplikajtoj kaj konflikto kuŝas en la sfero de demandoj de l' vivo. Ĝi estas sento de ia pezo — de tiu pezo, kiun oni sentas en la esenco mem de l' individualeco, kiomfoje io en ĝi kurbigis en la tuberon, komplikigis en la volvaĵon kaj ne malvolvigis, ne plilarĝigis jam kaj ne disiros tra la tuta estaĵo kiel fortigantaj nutraĵoj. Ĝi estas certaspeca spirita dispepsio, se estas permesite uzi la tiel vulgaran esprimon. Kvankam Ibsen mem posedas certan trankvilon en la prilaboro kaj formado de siaj temoj, sed tiu trankvilo ne estas de tiu speco, ke li disdonu ĝin ankaŭ al ni senpere, kiel nian propran. Tio ne estas ĉi tiu trankvilo de l' universo, absoluta trankvilo de la mondo, kiu kuŝiĝis al la ripozo kaj kiel kvieti fulmotondra bildo rigidigis en la homa animo; tio estas nur la trankvilo de absoluta skeptikulo, kaj tio ĉi estas nenio alia, nur la plej subtila kaj plej multe noblĝita indiferenteco.

*) En la lasta kajero enŝteliĝis bedaŭrinde kelkaj eraroj:

Paĝo 121, verso (de supre) 9:	ekraĝas	—	devas esti: ekregas.
„ 121, „ „ „ 13:	unue	—	„ „ nune.
„ 121, „ „ „ 23:	ĵetika	—	„ „ ĵetita.
„ 123, „ „ „ 29:	unue	—	„ „ nune.
„ 124, „ „ „ 18:	gravuziĝos	—	„ „ gravuriĝos.
„ 125, „ „ „ 6:	resanigi periodon	—	„ „ resaniga periodo.
„ 125, „ „ „ 9:	elrio	—	„ „ Mio.
„ 125, „ „ „ 11:	pezoj	—	„ „ pecoj.

Ibsen'a mondkompreno estas la signo demanda, fama Ibsen'a signo demanda; povas esti, ke li sentis eĉ certan plezuron, kiam li sian demandon starigis, aŭ eble eĉ sentis dum tio en si trankvilon de spirita kreado, de komenca momento, de bildo de l' tuto; por ni tamen ĉi tio povas esti signo de interna maltrankvilo. Ĉiu dramo de Ibsen estas granda peco de analiza laboro; kaj la tuta vico de tiuj ĉi laboroj estas nur neo de la tuto. Nedisputeble prilaboris Ibsen en pli granda grado ol iu ajn alia poeto nuntempa la tutan enhavon de la tempo kaj nedispoteble, kiel neniu alia, li grupigis ĝin en grandaj proporcioj kaj fortaj kontrastoj; sed samtempe peco post peco li dismetis ĝin, anstataŭ ĉirkaŭpreni en tutecan organismon, en kiu la nova ĝermo de l' estonteco povus libere ĝermi.

Tolstoj, tiu ĉi granda Ruso, aperigas en la disvolviĝo de sia individualeco, en la tuta vico de siaj verkoj kaj idealoj tiun saman temperamenton de la epoko. Li, kiu jam de komenco estis tiel malhela kaj netravidebla, sed samtempe tiel neelĉerpeble riĉa, kiel la virga naturo en la plej malproksimaj partoj de lia grandega kaj mistika patrolando, tamen eĉ li fine per „La Kreŭzera Sonato“, tiu ĉi spektaklo de l' propra senvestigita centro kora, faris sur nin impreson, kvazaŭ dum la solecaj, frenezaj miĝradoj en tiu ĉi lando, kie iam la aregoj da mongoloj konstruis koloniojn, ni subite starigus la piedojn sur la piramido el kadavraj kranioj de Ĝengishan. Ĉar kie en tiu ĉi koro devis esti temperamento, kiu montriĝis tiel fruktodona kaj varma, kiel lia tero ĝepatra, kaj tiel vivplena, kiel ĝia vegetada malkonscio, — kie en tiu ĉi temperamento devis esti la koro, tie troviĝis nur la senaĵa, nigra kiel tomo, malvarma malpleno: emo al detruo, emo al mortigo en si tion, kio estas vivo, instinkta venĝemeco kontraŭ ĉio, kio estas organika en la propra esenco; tiu ĉi venĝemeco antaŭe en formo tre nepreciza turnadis sin rekte kontraŭ la korpaj organoj kaj kondukis al la teruraj vundigoj, sed nune, tie ĉi, en la sfero de tre subtilaj aperoj de la animo esprimas sin per la vundigo de seksuala kaj senta bazo de amrilato inter la viro kaj la virino.

Oni povus citi senfine multajn ekzemplojn. Ĉiu individual-eco reprezentanta por la nuntempa epoko kaj ĉiu menso reprezentanta povus servi kiel nova pruvo. Ni citas ankoraŭ Strindberg'on, ĉar li en precipe puraj trajtoj kaj en sfero tute aparta

prezentas tiun ĉi tipon de la tempo, nome en la sfero intelektuala. Kio do estas tiu ĉi grandega kaj, kvazaŭ magazeno, plenigita cerbo de Strindberg, kio li estas alia, se ne ĥaoso, en kiu ĉio puŝas sin, frapas, premas, renversigas, se ne orgio de ideoj, rondedanco karnevala de ĉiaj pensoj de nunaj tempoj, batalkampo, sur kiu luktas amase pensoj sen estro. Ĉio laŭvice influas tiun ĉi cerbon: unu estas egale por li nova kiel la dua kaj kun la sama potenco lin almilitas; nenio povas kunigi kun io jam ekzistanta; kaj la inteligenteco el ĉiu ideo transiras al ĝia kontraŭaĵo sen ia ajn pero. Nova penso aŭ nova ekobservo, ĉerpita el ia libro aŭ rekte el la vivo, ŝanĝiĝas tuj en tiu ĉi cerbo en novan veron, en absolutan veron, en solan veron, en la „idee fixe“. La monomanio estas la sola formo, en kiu sian forton povas esprimi tiu cerbo nekapabla kapti kelkajn vicojn da pensoj kune, kelkajn grupojn da faktoj. En konsento kun tio ĉi la disvolviĝa figuro de Strindberg prezentis individuale, en neordinara grado, la tipon de ĝenerala figuro disvolviĝa de niaj troŝarĝitaj, senigitaj instinktoj, do ankaŭ de malklaraj tempoj. La tuta verkado de Strindberg prezentas unu grandan bildon de batalo, senĉesa batalo mortiga inter la malamikaj elementoj, la bildon de seninterrompa leviĝado kaj malleviĝado de pesteleroj. Strindberg predikis laŭvice en maniero plej fantazia la plej kontraŭajn mondkomprenojn, por ilin poste egale fantazie kontraŭbatali kaj kondamni. Li estis laŭvice pesimisto, anarĥisto skeptikulo, socialisto kaj Nietzsche'ano. Nune li estas superhomo, kiu batalas kontraŭ la popolamaso kaj Evo, estas memelektita venĝanto de la granda cerbo, kiu estas montronta la laboristajn muskolojn kaj la virinan malicon. Kaj versimile diversajn aliajn li respektos idealojn kaj diversajn ankoraŭ aliajn kontraŭbatalos idealojn, en tiu sama vico, en kiu ili kun la tempo estos aperantaj. Tio estas natura en la jaroj junulaj, sed kiam tio daŭras la tutan vivon, estas signo de interna manko organika, ĝi atestas pri la manko de pezo — kaj egalpezopunkto, kaj de varmo necesa por la ĝermado kaj kreskado de la individualeco. Kaj tiu cerbo, kies la tuta disvolviĝo dependas de la senfina vico de neutralizaj eksplodoj, ligantaj du kontraŭajn elektrofluojn, jen estas kvazaŭ mikrokosmoso de nuntempo, — de tiu sama nuntempo, el kies ondado plena je malkvietoj kaj malpuraĵoj leviĝas la arto de Böcklin, kvazaŭ la fabela insulo antikva, lumigita per

la suno de tagmezo, sub la blua ĉielo suda, plena je brilige blankaj marmoroj sur la fono de la malhela verdaĵo, la insulo, al kiu ni, homoj novepokaj, tiel volonte nin direktas, ĉar la instinkto al ni diras, ke tie interne ni povos trovi nian propran, la plej nian trankvilon en la reva kontemplacio.

III.

Ekzistas unu speco de trankvilo viva, kiun oni povas nomi praktika. La homo sentas en profundo de sia estaĵo la bezonon „aranĝi al si la vivon“; ĉiu plenumas tiun bezonon laŭ sia propra maniero; sed la komenco kaj la celo de tiu ĉi penado estas apud ĉiuj la sama. Karakteriza eco de tiuspeca trankvilo viva estas, ke oni povas ĝin akiri aŭ per helpo de principaj, malgrandaj bezonoj aŭ pere de malrapida, memvola maldezirado de principaj postuloj. La malgranda urbano posedas tiun ĉi trankvilon; kiu unufoje dum la vivo disbatis sin je la roko, povas ĝin akiri.

Ekzistas alia speco de l' trankvilo, kiun oni povus nomi teŝria. Ĉiuj grandaj metafizikistoj, kiuj aranĝis sian vivon en la ĉion enhavanta sistemo, ĝenerale ĉiuj mensoj kaj la tutaj epokoj, kiuj sukcesis kontentigi la universon kun la mio, kaj kiuj per tiu ĉi eltrovo sciis vivi, akiris tiun ĉi trankvilon. Tia historia epoko estis la franca ancien rĝime, la plej supera ekzemplo de tiu ĉi grupo de mensoj individualaj estis Goethe. En verkado de Heyse vagas ankoraŭ pala rebrilo de tiu trankvilo viva, tie ĝi estas tamen jam delikate nuancata kaj dismetita je la nekapteblaj momentaj nuancoj de nuntempa temperamento.

Tiuj ĉi du specoj de viva trankvilo havas tion komunan, ke ilin oni povas akiri kun helpo de la prudento, kun helpo de la plej malsuperaj aŭ plej superaj ĝiaj funkcioj. La trankvilo de Böcklin estas, en kontraŭ al ili ambaŭ, trankvilo de la instinkto, trankvilo de l' vivo.

Nur du poetoj novtempaj havis en sia verkeco kaj en sia temperamento, almenaŭ simile, tion, kion oni nomas trankvilo Böcklin'a — J. P. Jakobsen kaj Turĝeniev. Sed ĉe tiu ĝi estis tremanta, spireganta, suĉanta rapido de la senmove ien rigardanta brilo luma, ĉe la lasta estis melankolia silento de la aŭtuna tago, kiam ĉio agonias, ĉu malsana aŭ sana, ĉu plej

malbona aŭ bona. La trankvilo de Böcklin — jen la varma ripozo de tagmeza horo dum la varmega somero, kiam la suno staras rekte en la mezo de la intensive blua ĉielo.

La trankvilo tagmeza, varmega kvieto somera, trankvilo de l' vivo, trankvilo de l' instinkto.

Tiu speciala trankvilo, kiu senpere, senhelpo de la rigardanto, eliĝas el la pentraĵoj de Böcklin, tio ne estas ia laboro, kiun la artisto konscie en ĝin enmetis; ĝi estas nur la proceso de lia instinkto, ŝanĝita en la kolorojn kaj desegnon. La koloriloj kaj linioj ne estas parto esenca, unuagrada; ili estas nur rimedoj, per kiuj la en la kerno de l' mio troviĝanta maniero de estado kaj sentado donas al si la eksteran, videblan, konkretan esprimon. La trankvilo en liaj pentraĵoj estas nenio per si mem memstara, nenio per si mem ekzistanta, estas nenio alia, nur maniero de ekzistado de Böcklin'a estaĵo, maniero de ekzistado en tiuj sendependaj kaj prabestaj regionoj, kiuj konsistigas la kernon de la individualeco, kaj el kiuj ĉio elkreskas, egale la korpaj formoj kaj spiritalaj proprecoj, kiel tiuj ĉi organismoj nomataj verkoj de l' arto en momento, kiam ili en ia menso ekfloris per sono aŭ koloro.

De kie devenas, ke el unu verko de l' arto eliĝas impresoj agrablaj, el alia malagrablaj? Al tia demando povas doni respondon sole la psikologio de la krea proceso. Ke el unu verko ni havas impreson agrablan, impreson de volupto, ĝi dependas eble de tio, ke la artisto verkis ĝin pro la impulso de volupto; kaj la malagrablaj impresoj, kun kiu ni en alia okazo la verkon akceptas, estas tiu sama impulso, per kies influo la animo de l' artisto estis tuŝita. Kun la verkoj de l' arto estas sama afero, kiel kun la homo: ili havas animon, individuecon, ion nedefinitan, kion oni ne povas ekkapti, kio tamen elvokas ian difinitan impreson; tiu vibrado, eliĝanta el la artverko kaj elvokanta en ni la plujajn ekstrecojn, jen estas ĵus tiu animo. Kaj ĉi tiu ekstreco, kiun ni nun sentas, estas tiu sama tremo, sub kies influo iam la artisto sentis ŝin puŝita al la verkado, nur la artverko transportis ĝin en nian animon.

Ĉe Böcklin tiu unua vibrado estis la sento de volupto. Ĝi konserviĝis en la tuta pureco, nekonfuzita, nemalgrandigita per la daŭro de l' tuta verkada proceso, por fine al ni sin doni en la ĉefa kaj fina impulso. Kaj tiu sento de volupto havas ankoraŭ

unu specialan proprecon: ĝi estas sento de volupto, „par préférence“ pozitiva kaj nekonfuzita sento de volupto.

Estas tre versaĵne, ke ĉiun akton de kreado kaj komenco, tiel en la sfero spirita, kiel fizika, akompanas la sentoj de volupto. Komenco de l' ideo fariĝas inter la volupto; kaj la esenco de l' komencita ideo en tiu ĉi rilato ne bezonas havi ian signifon. Estas afero morale malbona, sed psihologie fakta, ke ankaŭ ĉe la krimulo la malbonaj elpensoj kreiĝas kune kun tiuj fiziologiaj aferoj, kiuj psihologie estas esprimitaj kiel la sentoj de volupto. Kaj mi pensas, ke en tiu ĉi rilato estas tre malfacile montri la limon inter tio, kio estas normala kaj tio, kio estas nenormala; ekzistas eble nur unu seninterrompa skalo, kondukanta de la plej radikala okazo patologia ĝis la plej supra ideala pureco kaj de krimula ago ĝis la pura spirita ideo. Sed tia konvinko ne malhelpas tute starigi kaj prilabori la skalon de valoro; ĝi ĝuste mem kreiĝas, tute nature, sammaniere, kiel oni pli ŝatas virinon, kiu sin tute donas nur al unu viro, ol la Venus'on vulgariziĝantan.

Demandu sin mem iu, sub influo de kiaj sentoj povis esti verkitaj „Pot-bouille“ aŭ „La vampiroj“, „La Kreŭzera Sonato“ aŭ „Fraŭlino Julio“. Mi estas konvinkita, ke la unua momento, momento de komenco, momento de l' inspiro, en kiu la ideo unuafoje aperis en la animo de l' poeto, signifis la grandegan eksplodon de volupto. Sed mi estas ankaŭ konvinkita, ke la posta proceso de verkado miksiĝis kun diversaj sentoj malagrablaj. Kaj se ni duaflanke elirus ekster tiun ĉi saman momenton de komenco kaj spionus tion, kio estas ekster ĝi, tiam sendube ni renkontus volvaĵon de konsciaj aŭ nekonsciaj impresoj malagrablaj, kiu povis elvoki la sentojn de volupto nur momente, do tiam, kiam retroviĝis la fina fadeno, kaj poste ĉe malvolvo revenis al sia propra esenco. Tio estis la procesoj de malkontenteco, procesoj malagrablaj, kiuj la poeton al kreado instigis; la sento de volupto estis apenaŭ apero akompana, duagrada.

Nia epoko estas eble pli multe, ol iu ajn alia, epoko de malagrablaj sentoj. Iliaj fontoj fluas pli abunde kaj profunde ol iam ajn. Neniam la profundegaĵo, dividanta la unuon de la tuto, estis tiel granda aŭ almenaŭ oni ne sentis ĝin tiel forte, kiel hodiaŭ. La kontraŭecoj inter la interna mondo de individualeco kaj la eksteraj aranĝoj fariĝis pli larĝa ol iam ajn. Kaj tiu ĉi fokuso de malagrablaj sentoj: kontraŭeco, konflikto, disigo trans-


portigiĝis ankaŭ en la individualecon mem; ĝi ne povos respieguli la grandan konstruaĵon, harmonie kuŝantan, en si enfermitan, homogenan, sed ĝia vivo fariĝas kvazaŭ individuala eksplodado kaj silentiĝado de la batalo interne de nemezurebla amaso de ideoj kaj sistemoj, solvoj de mondkomprenoj kaj utopioj celantaj ĝian plibonigon. Ĉio ŝanceliĝas kaj diverskoloriĝas ekster ni kaj en ni; neniam la homaro tiel multe estis senigita de la Arĥimedes'a pezopunkto kaj neniam estis de ĝi tiel malproksima. Tio estas ĵus tiu stato, kiun eksentis niaj grandaj poetoj; estis ilia mistera doloro kaj mistera forto eksenti tiun ĉi staton profunde kaj rekrei ĝin klare; ĉar sub influo de tiuj ĵus malagrablaj sentoj ili eksentis sin kreoplenaj; ili fariĝis en ili tono kaj formo, ekŝvelis por kanto kaj elkreskis kiel formoj.

En videbla kontraŭeco al ili ĉiuj staras antaŭ ni Böcklin mem por si. Li estas anoncanto de voluptaj sentoj inter la kreaĵoj de nia periodo. Li ĉerpas el la volupto kaj enokulas al ni la volupton. Ne nur, li ne havas eĉ eron de l' Ibsen'a analiza acido, nek „die Freude zu stinken“ de Zola, nek la volupton de Tolstoj skurĝanta sin mem, nek la Nietzsche'an obstinecon de propra venko, sed eĉ vi ne trovos ĉe Böcklin tiun ĉi dolĉan sopiron, kiu por la hodiaŭaj homoj — ne nur tre konsciencaj, sed ankaŭ tre impresemaj — estas tiel multe karakteriza, kaj kiu pli ĝuste estas nur sento de manko, do maskita sento malagrable, en plej subtila, plej diskreta plej multe novepoka formo. Ĉe li estas pura kaj pozitiva volupto. La sento de volupto estas ĉe li ne nur formo, sed enhavo, materialo; ĝi akompanas ne nur la komenciĝantan ideon, sed estas ideo mem, ĝia propra trunko; ĝi restas do neŝanĝita dum la tuta proceso de verkado, simile kiel ĝi estis antaŭ la proceso kaj ekster la komenca momento, volvaĵo de voluptaj sentoj. Ĝi estas kunigita en unu nedisŝirebla tuto kun la mio de Böcklin, estas en esenco lia la plej ĝusta formo de estado, al li nur propra, en niaj tempoj tute malaperinta, harmonia kaj nobla trankvileco — trankvileco de l' vivo.

Ekzistas aŭtoportreto de Böcklin, kies kopio per la flanka pordeto aperis en la vendejo. La majstro staras kun la supren levita pepiko, kvazaŭ li ĵus estus okupita per la laboro, sed pro ia nekonata kaŭzo subite haltus. Tiu kaŭzo staras tuj post li en la formo de ostoplenta sinjoro kaj ludas sur la violono siajn kantetojn en lian oreilon. La majstro ne ŝajnas tro konfuzita;

kvankam li hezitas pri la plua pentrado, sed duone nur turnas la kapon al la kurbiginta fantomo kaj konvinkiĝas, ke tute ne valoras je li turni la rigardon. Li aŭskultas atentegge, sed ŝajnas, ke la ludado nenian havas forton kaj ne povos lin ekŝanceli en lia mondkompreno. Li aspektas eĉ iom humorplene kaj petole, kvazaŭ li volus diri: Maljunulo, tio ne malhelpas; mi mem unufoje vidis la grandan Pan kaj pentris lin sur la tolo, kiam dume la malsaĝa paŝtisto forflugis terurgita, kaj la dio tute moke lin alrigardis, li estis iom kaprovira, tio estas vero, sed tute simplanima. Mi vidis ankaŭ dum ia okazo la maran dion kun la tuta familio kaj estis lin pentrinta en la momento, kiam ili sidas dum la festeno sub la norda poluso sur la granda rokpeco; kaj ĉiuj estis mirinde bonkoraj, la maljunulo kaj ino kaj infanoj kaj la hejma baleno. Ludu nur viajn kantetojn, ili ne estas tiel teruraj, kiel vi dezirus per via maldolĉa rideto nin pri tio konvinkiĝi; ĉar, sciu, de kiam la patron Pan mi aŭdis ludi la ŝalmon de la akvokano, mi scias tre bone, ke la tuta via instrumento estas nur unu tono de ĝi. Via ludado sonas kiel saltoj kaj krioj kaj laŭta bruo; la samo sonoris ĉe la maljuna Pan, sed tie ĝi dronadis en tiel potenca oceano de sonoj, ke la kunpremitan ĝian zupon mi eksentis nur kiel la trankvilon.

El la verko „Seher und Deuter“ esperantigis Br. Kuhl.



Pri la V^a kongreso.

Sinjoroj Carlo Bourlet kaj Félicien de Ménéil al la Ĉefredaktoro de
„La Bela Mondo“-Dresden.

Altestimata Samideano!

Ni ambaŭ ĵus revenas el Barcelono, kien ni iris por ricevi sciigojn pri la venonta Kongreso.

Ni revenas mirigitaj, entuziasmitaj, ĉar ni kun ĝojo konstatas, ke la tuta urbo Barcelono pretiĝas por fari al la Esperantistoj grandiozan akcepton.

La oficialaj cirkuleroj senditaj de la loka Komitato, kiu pro modesteco ne povas laŭdi sian propran laboron, ne povis doni ĝustan ideon pri la grandeco de l' rezultatoj jam akiritaj, kaj kiujn ni resumas ĉi-sube:

1^o — La Reĝo de Hispanujo akceptis esti honora Prezidanto de la Kongreso; tri Ministroj kaj membroj de la Reĝa familio akceptis esti protektantoj.

2^o — La Urbestro voĉdonis 2500 pesetojn por helpi al la reklamo de la Kongreso, sed tio estas nur malgranda parto de tio, kion faros la urbo; ĉar ĝi intencas organizi grandan luksan feston por oficiale akcepti kaj gastigi la Kongresanojn.

3^o — La alveno de Zamenhof en Barcelono estos io ĝis nun ne vidita. Ĉiuj urbaj gvardianoj kaj municipalaj rajdistoj en festaj uniformoj estos ĉe la stacidomo kun muzikistaro, akompanante la urban konsilantaron, la Deputitaron k. t. p.

Plie, la urbo metos je la dispono de la Kongreso la tutan palacon de la Belartoj por solena malferma kunsido kaj por la balo.

4^o — La Rektoro de la Universitato liveros al ni la tutan Palacon de Universitato, kie okazos ĉiuj laboraj kaj fakaj kunsidoj de la Kongreso.

5^o — La grava literatura Societo „Ateneo“ akceptos dum la Kongreso ĉiujn Kongresanojn kiel membrojn.

6^o — La Societo „Orfeo“ organizos por ni specialan koncerton en sia luksa Palaco.

7^o — La Komerca Ĉambro pruntedonos al ni la antikvan Halon en la Borso kaj la belegan salonon por la festo de l'

Floraj Ludoj, tiel ke tiuj festoj okazos en la sama loko kun la sama soleneco kaj dekoracio, kiel la enlandaj Floraj Ludoj, k. t. p.

8^o — Sinjoro Adria-Gval organizas mem teatran prezentadon de sia verko „Mistero de Doloro“, kiu estos ludita per profesiaj aktoroj.

En Barcelono ekzistas 52 Societoj Esperantaj, kiuj enalkulas almenaŭ 2000 membrojn, kies lertecon en Esperanto kaj fervorecon por nia afero oni neniam tro povas laŭdi.

Ni do kuraĝas, Kara Samideano, plej forte vin instigi, ke per varmegaj artikoloj en via gazeto vi bonvolu alvoki viajn samlandanojn al Barcelono, por ke la ĉiulandaj Esperantistoj inde respondu al la mirinda akcepto, kiu nuntempe pretiĝas.

Cetere, la malmultkosteco de l' vojaĝo kaj restado estas granda allogilo. Ni do esperas, ke ni estos MULTAJ MILOJ en Barcelono.

Koran kaj Samideanan Saluton.

C. Bourlet. F. de Mênil.





Bibliografio.

„La Bela Mondo“ raportas pri novaj verkoj nur, kiam la redakcio donace ricevis du ekzemplerojn. (Adreso: Dro Schramm, Dresden-Ständehaus.)

Kroata Esperantisto. Oficiala organo de la „Druŝtvo Hrvatskih Esperantista“. Monata gazeto. Redakcio kaj administracio: Trg Franje Josipa br. 19, Zagreb. Redaktorino: Danica de Bedeković. Abono: 1 jaro K. 3.—.

Ĝus aperis la unua numero de la unuigorgano de niaj kroataj amikoj. Ĝi volas ne nur disvastigi Esperanton en Kroatujo, sed ankaŭ enkonduki la riĉan apenaŭ konatan literaturon kroatan en Esperantujon. Bone, bone! Malfacila estas la laboro, tial ni ĉiuj helpu kaj abonu la novan ĵurnalon!

Esperanta Biblioteko Internacia. Berlin, Möller & Borel. No. 1. Legolibreto. Tradukis J. Borel. 43 paĝoj. No. 2. Fabeloj de Andersen. Tradukis F. Skeel-Giörling. 42 paĝoj. Prezo: po 0,10 ₧S.

La firmo Möller & Borel intencas eldoni malkaran esperantan bibliotekon internacian. Ĝus ni ricevis la du unuajn libretojn de tiu ĉi biblioteko. Nia ĝojo estis granda. Por nur 0,10 ₧S tiaj bonaj libretoj! Ĉiu esperantisto povas nun aĉeti kaj havi esperantan bibliotekon. La unua libreto enhavas mallongajn fabelojn kaj anekdotojn, kiujn tradukis nia amiko J. Borel el la germana lingvo. En la dua libreto ni trovas kvin fabelojn de Andersen tradukitaj de nia dana samideano Skeel-Giörling. Geĝrupanoj legu tiujn ĉi libretojn kaj vi havas ĉiam por malmulte da mono bonan ekzercadon kaj multe da plezuro dum viaj kunvenoj!

Literatura Almanako de Lingvo Internacia por 1909. Paris, Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. 92 paĝoj.

La redakcio de la „Lingvo Internacia“, kiun espereble ĉiuj ĝelegantoj konas (se ne, mendu ĝin!), eldonis tiun ĉi belan almanakon. Ĝi enhavas resumon de la historio de Esperanto en la jaro 1908, redaktitan de nia lerta kunbatalanto D-ro Corret, la fotografajojn de la dekdu nunaj akademianoj kun biografiaj notoj kaj kelkaj paĝoj speciale verkitaj por tiu ĉi libro de ĉiu el ili; fine kaj tio estas tre, tre amuziga: parton humoran! Legu ĝin!

Ĉu internacia monunuo kaj pagilo estas efektivebla, kaj kiamaniere povas utili la Ĉekbanko Esperantista al ĝia enkonduko kaj ĝenerala akcepto. E. Ĉefeĉ.

Tiu ĉi ĝrava, bonega propaganda broŝuro estas senpage ricevebla de „Internacia Propagandejo Esperantista“ en London, S. W. Merton Abbey. Skribu pri la broŝureto en ĉiuj gazetoj!

Esperantista Surmura Kalendaro por 1910a. Devizo: Neniu tago sen Esperanto.

Gesamideanoj! Subskribinto havas la plezuron informi vin, ke li preparas la eldonon de „Esperantista Surmura Kalendaro“ por 1910. Ĉiutaga kalendaro estas novaĵo en la historio de Esperantismo; pro tio mi ne volas eldoni ĝin, antaŭ ol mi scias viajn diversajn konsilojn, dezirojn kaj proponojn, rilate al tiu-ĉi kalendaro, por ke ĝi iĝu laŭ la gusto de l' granda plimulto el vi.

Ŝildo havos amplekson da 25×32 centimetroj; ĝi estos bele kolor-presata, reprezentante Esperantan simbolon, laŭ desegnaĵo de sperta desegnisto.

Bloketo havos amplekson da 8×18 centimetroj; oni povos forpreni ĉiun folieton, sen difektado.

La antaŭa flanko de l' folietoj surhavas la nomon kaj cifron de l' tago, la nomon de l' monato, kaj kelkajn liniojn por rememordatoj, devizoj, proverboj k. s.

La postflanko de l' folietoj surhavas bonan prozon aŭ poezion.

Ne estas necese diri, ke la enhavo estos tute neŭtrala, tiel ke ĉia Esperantisto povos aprobi kaj ŝati ĝin.

La prezo de l' tuta kalendaro (afrankite ĉien) estos nur 60 spesdekoj aŭ 6 internaciaj respondkuponoj, kun speciala rabato por kluboj k. c. Cetere el la unua 100⁰ da mendintoj (ekster Nederlando), ĉiu ricevos artan objekton el mia patrolando.

Mi alvokas ĉiun, kiu havus ion por konsili, deziri aŭ proponi por la bona aranĝo de l' kalendaro, kiel eble plej baldaŭ sciigi tion al mi.


Ĉar la kalendaro estos presata kaj ekspedata en la komenco de Novembro, mi avertas, ke por mendoj venintaj post Oktobro, mi ne povos garantii la liveradon.

Kun samideanaj salutoj

J. L. BRUIJN, 170 Keppelerstraat,
Hago (Nederlando).

Aprilo 1909a.

D-ro L. Zamenhof, S-ro N. P. Evstiféieff (Bulgarujo) kaj S-ro Dreves Uitterdijk (Nederlando) deziris al mi bonsukceson kaj promesis kunhelpon. Nia Majstro jam sendis poemeton.



Praha, la 20^{an} de Aprilo 1909.

Alvoko!

Karaj samideanoj!

La subskribinto estas petata de S-ro D-ro P. Zenkl, profesoro ĉe komerca Akademio bohem-slava, kiu, kvankam ankoraŭ neesperantisto, tamen fidas servojn liveratajn de nia lingvo en internaciaj rilatoj, havigi al li per Esperanto utilegajn informojn pri temo sube prezentata.

P. T. redakcioj de esperantaj revuoj kaj gazetoj bonvolu afable enpre-sigi ĉi tiun enketon, por ke ĝi estu kiel eble plej konata.

Antaŭe kore dankante salutas samideane

ĉiam servopreta

Jan Hradil, Praha I. 342. „Esperanto-Oficejo“.

Praktikajn kaj teoriajn fakistojn pri ŝtata librotenado (profesorojn kaj docentojn de tiu fako, oficistojn okupatajn per pretigado de budĝetoj ŝtataj, landaj k. s. ĉe kiu ajn nacio) kaj ĉiujn Esperantistojn rilatontajn kun tiaj fakistoj petegas la subskribita delegito, ke ili ne rifuzu sendi al li detalajn sciigojn pri teorio kaj praktiko, kiuj ĉe ili estas uzataj ĉe nova aprobado de tiuj poentoj de kredito, aŭ partoj de ĉi tiuj poentoj, kiuj ne estis eluzitaj en tiu jaro, por kiu ili estis aprobitaj. (Ekz.: por jaro 1907 estas aprobitaj por konstruado de lernejo 800 000 K. kaj dum jaro 1907 oni uzas sole 600 000 K.; kiamaniere oni aprobas en budĝeto por 1908 la restantan parton 200 000 K.). La afero ĉi tie estas pri faka studaĵo kaj estos tre bonvenantaj detalaj iustruoj kaj priskriboj de certaj okazoj (eventuale specialaj) ĉu en Esperanto, ĉu en lingvoj germana, franca, angla, itala aŭ iu slava. Verkoj traktantaj tiujn ĉi demandojn estu afable senditaj kaj la prezo estos tuj pagita (kiel same ĉiuj elspezoj), aŭ oni sciigu almenaŭ, kie oni povas ilin aĉeti. La petanto estas preta rezervi per similaj aŭ aliaj informoj.

Bonvolu adresi:

Jan Hradil, Praha I. 342. „Esperanto-Oficejo“.

